

Beletra Edeno

neregula beletra bit-revuo

n-ro 3 (aprilo 2024)



Ĉiuj kontribuoj estas bonvenaj.

Redaktis Vejdo (vejdo@163.com)

Kontribuis Luiza Carol, Rita Mkrťjan, Pipi, Yin Jiaxin, Lenke Szász, Jado, Wang Chongfang, Guo Zhu, Long Long, Minosun, Yang Dong, Yang Fang, Vejdo, Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser, Lin Bin, Liu Hongyuan, Tiberio Madonna, Lily, Yi Qiao, Honoré Sebuhero, Rovere Emanuele, Du La, Wđington Rocha, Bardhyl Selimi, Yanke, Hu San, Lin Dong, Laimundas Abromas

AI-ilustris John Huang

Enhavo

Originala prozo

Luiza Carol: Aliaj pordoj malfermiĝas.....	3
Rita Mkrtĉjan: Lumradio de feliĉo, k.a. rakontoj.....	6
Pipi: Paro da ledaj ŝuoj.....	11
Yin Jiaxin: Lingvo kiel ponto, Serĉi pretekson por viziti la patrinon.....	14
Lenke Sz �sz: La grilo kaj la formiko.....	16
Jado: Plendo de la hundo.....	21

Tradukita prozo

Du Guangting: La viro kun bukraj vangharoj (trad. Wang Chongfang).....	23
Shen Jiji: Vulpa feino Ren (trad. Guozhu).....	30
Anonima: (mikornovelo) En la vagono de metroo (trad. Long Long).....	38
Bing Xin: Prezfalo, Mlagraanda lanterno oranĝoŝela (trad. Minosun).....	39
Feng Jicai: Altstatura virino kaj ŝia edzo (trad. Yang Dong).....	43
Mo Yan: Tri brasikoj, La patrino, Miaj instruistoj (trad. Yang Fang).....	52
Chiung Yao: En profunda korto (3) (trad. Vejdo).....	60
Fratoj Grimm: Ranoreĝo aŭ fera Henriko, Kato kaj muso kiel kunuloj (trad. Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser).....	66
Anonima: Stranga songvedanta aŭtomato (reverkis Lin Bin).....	72
Zhu Ziqing: �ce la vido de l' patra dorso, Printempo (trad. Liu Hongyuan)..	76

Originala poezio

Tiberio Madonna: Via kaŝita amo.....	80
Lily: Nokta pejzaĝo de monturbo, Soleca arbo, Sopirom, Velkinta petalo....	82
Yi Qiao: Jartempo, Penso pri Pasko, Paska fajro.....	86
Honor� Sebuĥoro: Esperanto, mia ŝatata lingvo.....	88
Vejdo: Mono kaj justeco, Kvarpieda reĝo, Li nesubigebla.....	90

Tradukita poezio

Xue Fenggu: Revizito Baguazhou, Pluvo renkontita en kafejo, Unu guto	
--	--

da akvo (trad. Minosun).....	96
Kanttekstoj: Vi restis sola, Pensu pri mi, Nun aŭ neniam, Manŭela, Ŝin mi amas (trad. Rovere Emanuele).....	98
Gao Huajjun: ni elektas la printempo, la printempo sekvas post la vintro, Jam en la printempo (trad. Du La).....	101
Afonso Lopes Vieira: Ventodanco (trad. W ĉington Rocha).....	104
Rudina Muharremi Beja: La morgaŭo, Mi miras, Mia pento, Venu Printempo, Vi [parolas nostalgie (trad. Bardhyl Selimi).....	106
Du Fu: Naŭ poemoj (trad. Yanke).....	110
Teatro	
Hu San: Rekuniĝo.....	118
Lin Long: Rakonto pri pluvombrelo.....	120
Eseo kaj artikolo	
Laimundas Abromas: Iomete el la vivo de mia familio.....	122
Veĵdo: Ĉinesko el la ĉina saĝo.....	124
La abio de cent jaroj (trad. Yi Qiao).....	137



John Huang (Kanado)

John Huang, prezidanto de internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio (IKEF) nordameriko, ĉefredaktoro de la revuo "La Merkato", estas ĉina-kanada esperantisto kaj komercisto. Li estas la oficiala fotisto por du sinsekvaj Universalaj Kongresoj en 2022 kaj 2023. Li esperantistiĝis jam en la 1980-aj jaroj kaj aktive partoprenis multajn Esperanto-agojn en la sekvaj jardekoj. Li faris la AI bildojn de ĉi tiu numero de Beletra Edeno.

Foto sur la kovrilo: kantanta blankokula birdo sur kapoka floro en la printempo (premiita, fotita de John Huang en Shenzhen, Ĉinio)

Luiza Carol (Israelo)



Aliaj pordoj malfermiĝas

Dorela estis knabino, kiu loĝis en malgranda domo apud bela parko. Ŝiaj gepatroj estis kantistoj, kaj en ŝia familio, ĉiuj ludis diversajn muzikilojn aŭ almenaŭ ŝategis aŭskulti muzikon. Tial, nemirinde ke Dorela ŝatis kanti kaj deziris fariĝi kantistino. Ŝi ankaŭ lernis ludi gitaron.

La domo de Dorela havis tri ĉambrojn. Ĉiuj muroj estis tegitaj per specialaj materialoj, kiuj izolis la sonojn. Ankaŭ ĉiuj fenestroj havis specialajn ŝturojn, per kiuj oni povis izoli la sonojn laŭnecese. Tiel, la patro kaj la patrino de

aŭtorino Luiza Carol

Dorela povis trejniĝi kantante unuope, ĉiu en sia ĉambro, aŭ kantante duope en la sama ĉambro. Dum ilia ĉiutaga ekzercado, Dorela povis ĉeesti por aŭskulti ilin se ŝi volis. Ŝi ankaŭ povis resti en sia ĉambro kaj eventuale aŭskulti muzikon pere de radio. Ŝi povis ankaŭ kanti aŭ ludi gitaron sen ĝeni la gepatrojn.

Ĉe la domo de Dorela troviĝis malgranda korto, kun unu sola maljuna arbo. Multaj birdoj venis el la parko por viziti tiun arbon, je kies branĉoj la knabino pendigis ujojn por grajnoj. Dorela amis la birdojn. Ŝi amikiĝis precipe kun iu muzikema verda papago. Ŝi nomis lin Dodo, kaj li alvenis kiam ŝi alvokis lin. Dorela instruis lin diri “saluton”, por bonvenigi la esperantistajn amikojn de la familio. Kiam ŝi kantis en la korto, Dodo provis imiti ŝin. Kiam ŝi gitarludis, Dodo imitis la sonojn de la gitaro. Dorela eĉ instruis lin kanti ŝian nomon laŭ 3 muziknotoj: “DO... RE... LA...”

Kelkfoje, kiam Dorela revenis el la lernejo, Dodo rekonis ŝin ekde malproksime kaj bonvenigis ŝin kantante ŝian nomon:

“DO... RE... LA...”

Dorela priferis pri sia verda amiketo kaj diradis al siaj gekolegoj:

“Jen mia lernanto Dodo. Mi instruas lin solfeĝi...”

Tiam la infanoj ridis.

Foje, Dorela malsaniĝis, sentis fortan premon en la gorgo kaj komencis flustri anstataŭ paroli. La kuracistoj diris, ke ŝi bezonas nepran operacion. Ili promesis al ŝi, ke ĉirkaŭ du semajnojn post la operacio ŝi jam kapablos paroli normale, tamen ili ne certis ĉu ŝi povos ankaŭ kanti iam ajn.

Dorela ege maltrankviliĝis. Ŝi ĉiam revis fariĝi kantistino. Ŝi estis havinta apartan voĉon kaj tre talentis pri muziko, tial la tuta familio kaj ĉiuj konatoj konsideris ŝin ontanta kantistino... La ideo ke eble ŝi ne plu kapablos kanti estis por ŝi terura ŝoko...

La vesperon antaŭ la operacio, Dorela enlitiĝis kaj ekploris. Ŝi ne povis endormiĝi

pro ĉagreno. Tiam ŝi petis aŭskulti trankviligan rakonton, samkiel ŝi kutimis peti kiam ŝi estis tre malgranda. Ŝia patrino sidigis apud la lito kaj komencis rakonti. Kaj jen tio, kion ŝi rakontis:

Foje, en fora urbo, vivis du ĝemelaj knabinoj en eta domo apud bela parko. Iliaj gepatroj estis kantistoj. La ĝemelinoj nomiĝis Mirela kaj Simila. Ili ambaŭ scipovis kanti kaj ludi gitaron, ili ambaŭ talentis, sed Mirela ja paciencis lerni muzikon kaj deziris fariĝi kantistino, dum Simila malpaciencis pri muzikaj ekzercoj, preferis matematikon kaj revis fariĝi inĝeniero. Ĉe la domo de Mirela kaj Simila, estis malgranda korto kun unu sola arbo. Verda papago kaj ruĝa papagino konstruis neston en tiu arbo. La ĝemelinoj nomis la papagon Mimi kaj la papagino Sisi. La gepapagoj estis tre muzikemaj kaj ĉiutage ricevis kun granda plezuro lecionojn pri solfeĝo. Mirela estis la instruistino de Mimi, kaj Simila estis la instruistino de Sisi. Tagmeze, kiam la ĝemelinoj revenis el la lernejo, la gepapagoj rekonis ilin de malproksime kaj bonvenigis ilin kantante:

“MI... RE... LA...”

“SI... MI... LA...”

La gepapagoj ŝatis ankaŭ imiti vortojn, kaj la knabinoj komencis instrui ilin Esperanton. Unu someron, en ilia urbo okazis Universala Kongreso de Esperanto. La gepatroj de la ĝemelinoj preparis koncerton por tiu evento, kune kun malgranda muzikbando. La knabinoj preparis sin por kanti dum la Infana Kongreseto. Ili instruis ankaŭ al Mimi kaj Sisi etan refrenon de kanto. La gajaj birdoj ŝategis tiun sperton kaj kantis laŭte, movante siajn piedojn ritme, kiel en danco. La ĝojo kreskis, kiam la papaga paro ekhavis 4 papagidojn. Oni nomis ilin Lala, Fafa, Rere kaj Solsol. Ili ŝatis aŭskulti muzikon.

Dum la Infana kongreseto, Mirela kaj Simila ekamikiĝis kun kelkaj infanoj kaj invitis ilin hejmen, por ke ili konatiĝu kun Mimi, Sisi kaj iliaj idoj. La infanoj estis ravitaj pri la talentaj gepapagoj. La ĝemelinoj regalis la geknabojn kaj la gepapagojn per granda fruktosalato kun multaj semoj kaj nuksoj. La gastoj nomis tiun deserton “BBBB”, t.e. “Bela Bunta Bongusta Bonodora”. La gepatroj de la ĝemelinoj proponis al la gastoj partopreni internacian infankoruson pere de interreto, kaj la infanoj konsentis provi tian eksperimenton. Entute, tiu renkontiĝo estis ege agrabla evento kaj por la gastoj kaj por la gastigantoj. Ilia amikeco plifortiĝis en la sekvaj jaroj, dum kiuj ili ofte kantis kune. La gepatroj de Mirela kaj Simila fariĝis alterne la dirigentoj de la interreta koruso.

Iun printempon, la ĝemelinojn trafis kontaĝa malsano, pro kiu ili ambaŭ bezonis operacion je la gorĝo. Post tiu operacio, Mirela estus dezirinta kanti denove, sed ne plu kapablis. Simila daŭre kapablus, sed ne plu volis kanti sen sia fratino. La tuta internacia koruso bedaŭris tiun okazaĵon.

Ankaŭ gitaron la ĝemelinoj ne plu volis ludi, kaj ili rifuzis ludi ajnan alian muzikilon kiun iliaj gepatroj proponis. Tamen ili fariĝis malgajaj, sentis sin kvazaŭ mankas en siaj vivoj io grava...

Tiam, la patro de la ĝemelinoj petis la korusanojn prezenti al Mirela kaj Simila kiel eble pli interesajn muzikilojn el siaj landoj aŭ el aliaj landoj. Li esperis, ke unu aŭ eble kelkaj el la muzikiloj de la tuta mondo fin-fine allogos la knabinojn, por ke la ĝojo de muziko reaperu en iliaj vivoj. La patrino diris al siaj filinoj:

“Kiam unu pordo fermiĝas, aliaj pordoj malfermiĝas. La vivo plenas je surprizoj. Oni neniam scias kie, kiel, kiam malfermiĝas la pordo de tute neatendita sperto...”

Dum kelkaj monatoj, Mirela kaj Simila ricevis filmetojn pri tradiciaj popolaj muzikiloj el la tuta mondo. Iliaj oreloj provis alkitimiĝi al buntaj tradiciaj muzikiloj, kiuj taŭgas al la koncernaj muzikiloj. Fin-fine okazis ĝuste tio, kion la gepatroj esperis: ambaŭ knabinoj trovis sian preferatan muzikilon. Kaj ĝuste la muzikilon ili elektis: la tereminon.

Tiu ĉi ne estas popola muzikilo. Ĝi estas elektronika ilo, kiun inventis rusa fizikisto komence de la 20-a jarcento. Unu el la korusanoj ricevis okaze de sia naskiĝtago skatolon, kiu entenis la erojn, el kiuj oni povas munti tiun fascinan muzikilon. La knabo fotis ĝin kaj poste sendis al la ĝemelinoj filmetojn, pere de kiuj oni povas vidi kaj aŭskulti tre talentajn spertulojn pri teremino. Kaj jen, okazis la miraklo: Mirela kaj Simila ekadoris la tereminson.

La tempo pasis kaj la ĝemelinoj kreskis. Mirela fariĝis komponisto, dirigento kaj spertulo pri teremino-ludado. Simila fariĝis inĝeniero kaj laboris en fabriko de muzikiloj. Ŝi perfektigis la tereminojn kaj kreis novajn variantojn. Ŝi kreis i.a. tereminojn, kiujn oni povas facile agordi laŭ la tradiciaj agordosistemoj de ajnaj muzikiloj de la tuta mondo...

Dorela delonge ĉesis plori. Kiam la patrino finis sian rakonton, Dorela flustris:

“Panjo, ĉu tiu muzikilo... vere ekzistas?”

“Jes, certe. Ĉu vi volas aŭskulti tereminson?”

Dorela jesis. Ŝia patrino alportis sian komputilon kaj tuj la ĉambregon plenigis mallaŭta, trankviliga, rava muziko de teremino. Dorela fermis la okulojn. Rideto aperis sur ŝia vizaĝo.

La patrino malŝaltis la etan lampon apud la lito. Antaŭ ol eliri, ŝi diris:

“Ĉio bonordos, karulino... Bonan nokton...”

Sed Dorela ne plu aŭdis ŝin. Ŝi jam endormiĝis kaj estis sonĝanta pri papagoj...



Rita Mkrtĉjan (Armenio)



aŭtorino Rita Mkrtĉjan

Lumradio de feliĉo

Bela ĝardeneto, dometo, silenteco de naturo.

Sur benko sidas aĝa homo kaj rigardas antaŭen,
ĝuas sunsubiron, belecon de aŭtuna naturo.

Iam li estis ne malbona pentristo kaj skulptisto.
Liaj skulptaĵoj sukcese estis prezentitaj en
diversaj ekspozicioj. Nun ĉio transformiĝis

en tute alian, fremdan vivon, kie li estis nur observanto.

La edzino post forveturo de infanoj ĉiutage koleris pri lia nova ŝatokupo, li faris diversajn bildojn sur ŝtonoj kaj ŝtonetoj.

Ŝi tiel ofte diris al li, ke plu ne povas purigi la domon pro lia stulta, senseca laboro, ke li decidis translokiĝi en someran dometon, kiu situis en monta vilaĝeto, ne malproksime de urbo. Ĉitie ili iam ripozadis somere kun infanoj.

Ĉi matene li kutime vagadis en apuda arbareto kaj trovis malgrandan kalkŝtonon, kiu povus esti taŭga por gravurado.

En lia lando (kiu estas monta) ofte eblis trovi ŝtonojn, precipe en apudmontaj valoj, la ŝtonoj, kiuj eĉ povis esti kun iuj ornamaĵoj.

La ŝtono estis rektangula kaj ne tiel peza. Lin mirigis tio, ke en kelkaj fendetoj de la ŝtono kreskis verdaj ĝermoj. Ĉi tio okazas tre ofte, sed ĉimatenne ĉio lin ravis.

Tutan tagon li laboris, ĉiuj liaj iloj helpis ĉizi skizon de estonta bildo. Li konturis flugantan birdon, manojn, vizaĝon de junulino. Iam li songis similan vizaĝon. Eble estis vizaĝo de edzino, tiam, kiam ili renkontiĝis kaj enamiĝis.

Jam vesperiĝis. Li ripozis kaj, post ioma tempo, alproksimiĝis al la ŝtono por labori tutan nokton.

Venontage elĉizita bildo estis preskaŭ farita: junulino suprenigis birdeton kaj ŝajnas, ke la birdo flugas ĉielon.

Verdaj ĝermoj, kiuj restis sur ŝtono, ornamis ŝian longharan kapon kiel krono.

Restis nur kelkaj detaloj en laboro.

Li sentis sin Pigmalionon, kiu kreis Galateon.

Li imagis, ke homoj, kiuj ekvidos lian laboron, admiros. Li ne pensis pri gloro. Li revis, ke ĉiu sentu la belecon kaj misteron de la bildo.

Li trovis la lokon en doma ĝardeneto, surmetis la ŝtonon, por ke ĉiuj najbaroj aŭ preterpasantoj ekvidu ĝin.

Kiam li ĉion finis, nur tiam li ekmemoris, ke krom kafo li nenion manĝis.

Li sidis ĉe tablo en ĝardeno, tiel, ke la ŝtono estu antaŭ liaj okuloj.

Iu alvokis lin. Estis najbaro, kiu diris, ke li forveturas en urbon kaj povas aĉeti ion, kion li bezonas.

La najbaro ekvidis la ŝtonon, demandis, ĉu estas lia nova laboro kaj... nenion.

Dum tuta tago diversaj homoj alvokis lin por ion demandi, aŭ simple interparoli kaj preskaŭ neniu atentis la ŝtonon.

Pasis kelkaj tagoj. Skulptisto sentis sin feliĉa kaj malfeliĉa samtempe. La junulino sur ŝtono ĝojigis nur la majstron.

Kaj jen denove lia vizaĝo klariĝis pro nova penso, kiu eniris lian kapon.

Li alveturigis ĉareton, per kiu antaŭe li enhejmigis la ŝtonon kaj atenteme surmetis sian "trezoron" en ĉareton.

Li turnis sin al proksima monteto. Li supreniris, sed en iu momento, pro ne tiel rekta vojo, komprenis, ke li devas kunporti sian "Galateon" per manoj.

Bone, ke la vojo al la pinto ne estis tre kruta. Li atingis ĝin kaj eksidis por ripozi. Poste li trovis lokon por la ŝtono inter aliaj multnombraj ŝtonoj kaj teraj altaĵoj.

Li imagis, kiel la homoj, kiuj supreniĝos monteton, ekvidos la ŝtonon kaj ne komprenos ĝian magian aperon. Li estis konvinkita, ke ĉiuj admiros pri tio, kion ili ekvidos.

Ĉi tie, sub blua ĉielo, en sino de naturo, ĉio ŝajnis tute alia. Li plu ne ofendiĝis de najbaroj, de la edzino, de ĉiuj homoj, de la vivo.

Ŝajnas, ke li iĝis kontenta. Post lastaj jaroj de senreviĝo, feliĉo denove plenigis lian animon.

Li malsupreniĝis. Ĉareto atendis lin ĉe monteto.

Malgraŭ laciĝo, li vigle direktis sin al la domo.

La ĉareto ne estis malplena.

Li portis feliĉon, la feliĉon, kiu lumigis lian animon, vivon kaj, ŝajne, tutan mondon ĉirkaŭ li.

Hundaj sentoj

Nigra-blanka hundido aperis apud niaj domoj nerimarkeble, same kiel multaj hundidoj kaj katidoj, kiujn "bonaj" mastroj forĵetas el hejmo, aŭ el siaj kortoj. Laŭ kutimo, mia fratino "adoptis" ankaŭ ĝin.

Ni trovis hundan dometon (per reto) kaj Miki bonege vivis tie, dum pli ol unu jaro.

Ĉiuj najbaroj ŝatis hundeton kaj pardonis ĝian senfinan bojon.

Kiam fratino, aŭ ni eliras kun manĝaĵo, Miki saltadas (kiel ĉiuj hundoj), ruliĝadis sur tero kaj diversmaniere montras la feliĉon, ne nur pro manĝaĵo, sed ankaŭ pro nia apero.

Tamen, en lastaj monatoj ni ĉiuj riimarkis, ke Miki ofte forestas dum tuta tago. Ni maltrankviliĝis, ke ĝi povas resti malsata, kaj ne komprenis, kien ĝi malaperas. Sed unufoje, matene, ni ekvidis, ke ĝi sekvis konatan viron, kiun ĉiuj najbaroj nomis - drinkulo.

Li estis mezaĝa, malbonaspekta, vivis kun sia patrino.

Niaj observadoj konfirmiĝis. Miki trovis novan amikon.

De mateno, post manĝado, ĝi akompanis David-on en proksiman aŭtomobilejon, kie kolektiĝas kelkaj viroj (kaj ankaŭ David) por, kun glaso da vino (aŭ brando) diskutadi diversajn problemojn.

Ĝis nun ni ne vidis similan fidelecon. Miki sidis kaj silente atendis, kiam lia amiko eliros.

Neniam ni aŭdis, ke David ion diru, alvoku hundeton. Miki, kiel lia ombro, ĉien akompanis lin, en vendejojn, en parkon, en domon. Ĝi eĉ ne eniris sian dometon, kiu estis farita kiel unuĉambra loĝejo, kaj nokte dormis apud pordo de David.

Ni ĉiuj ŝanĝis nian opinion pri David.

Neniu plu diris "tiu drinkulo". Miki faris tiel, ke ni kun estimo parolis pri li kaj kun li. Hunda amo faris neeban.

Verŝajne Miki "ekvidis" lian koron, eksentis tion, kion ne ĉiam povas senti aŭ vidi homoj.

Kiu diras, ke katoj ne flugas?

Estis varma somera tago.

Liza de mateno, post sendorma nokto gladis en la ĉambro, kvankam ege doloris la dorso. La katido Sim, kiel multaj ĝiaj «gefratoj» estis enhejmigita el la strato, kie ĝi kuŝis surtere senhelpa, eta kaj belega.

Nun ĝi sidis apud fenestro, flanke de balkono kaj tre atenteme sekvis paserojn, kiuj sidis sur ŝnuroj de tolaĵo. Sim aŭ Simka, kiel nomis ĝin hejmuloj jam iĝis sepmonata, sed la karaktero tute ne ŝanĝiĝis. Ĝi estis malobeema kaj kaprica, sed... ege amata. Liza gladis kaj rigardis tra fenestro la katon.

Kio okazis post unu minuto, memorigis sceneton el la filmo.

Birdeto forflugis el la ŝnuro kaj Liza kun teruro ekvidis en aero piedetojn kaj vosteton de Sim, kiu saltante sekvis paseron. Forgesante elŝalti gladilon, Liza elkuris kaj preskaŭ elflugis per ŝtuparo el domo (de tria ĝis unua etaĝo).

Se najbaroj ekvidus ŝin, ili tre ekmirus, ekvidante Liza-n. Ŝi ne similis al malsana, aĝa virino, ŝi kuris, kiel junulino.

Liza imagis, ke povra kato kuŝas sub balkonoj de la domo, senspira, eble en sango, pensis kun honto, kiel ŝi plendis pri malbona karaktero de katido. Kun tiuj malagrablaj pensoj Liza ĉirkaŭfleksis la domon.

Je unua rigardo ŝi neniu ekvidis, sed pli proksime, rimarkis Sim-on, kiu trankvile sidis sub balkonoj kaj observis ĉion per siaj nigraj brilaj okuloj.

Nenio okazis. Liza kunpremis la katon kaj feliĉe supreniĝis hejmen.

En domo ŝi ankoraŭ foje palpadis katidon kaj konvinkiĝis, ke ĉio estas en ordo.

Helpon bezonis Liza. Ŝi trinkis sian korkuracilon kaj ioman tempon ekkuŝis sur sofo (ĝis tio elŝaltis gladilon).

Sim kaŝe alproksimiĝis al ĝia amata hejma kreskaĵo-florofitum kaj komencis rodi (kiel ĉiam).

Liza karese rigardis la katon, kiu bonege komprenis, ke hodiaŭ neniu insultos ĝin.

Infana sonĝo

Kiam mi estis infanaĝa, mi sonĝis tre interesan fabelan sonĝon:

“Unu granda ĝardeno estis parcelita. En unu parto kreskis arboj kun verdaj folioj, en la dua - kun oraj folioj kaj oraj fruktoj. Unu grupo da homoj elektis ĝardenparton kun verdaj arboj, kiuj bele floris kaj poste fruktodonis belajn maturajn pomojn. Alia parto da homoj atendis, kiam sur branĉoj de oraj arboj multiĝos oraj fruktoj, poste forŝiradis kaj kuris por aĉeti multe da diversaj aĵoj kontraŭ tiu ĉi oro. Sed, neatendinte okazis jaro de malsato en tiu regiono. Ĉio malaperis, nenio estis vendebla, nenio aĉetebla. Homoj, kiuj flegis arbojn kaj laboris en verda ĝardenparto, ne restis sen manĝaĵo. Ili havis pomojn, helpis unu la alian, ĉar dum laborado en ĝardeno ili amikiĝis kaj kuniĝis, preskaŭ kiel unu familio. Sed homoj, kiuj forŝiradis orajn pomojn, pensis nur pri riĉiĝo pere de oraj fruktoj kaj eĉ ne estis konataj unu kun alia.

Estis malgaje, sed senutilaj oraj pomoj radiis en branĉoj de arboj, kiel belega, brila, sed ne taŭga trezoro.

Kiam mi vekigis kaj ekvidis tra la fenestro sunleviĝon, novan tagon kaj verdajn branĉojn de la arbo, kiu kreskis apud nia domo kaj ĉiutage salutis min, ĝoje kriis al la patrino: “Mi ĉiam elektos la verdan ĝardenon en mia vivo”.

“Verda” vilaĝo.

(Ĉu fabelo, aŭ vero?)

En unu granda lando estis la vilaĝo, kiu havis la nomon "Verda".

Pri vilaĝo ĉiuj multe rakontadis, invitis viziti kaj enloĝiĝi, ĉar ĝi vere estis kaj verda (pro belegaj ĝardenetoj), kaj sunplena, ankaŭ pro varma interrilato de la loĝantoj.

Kompreneble, ne ĉio estis sennebulaj, sed, ĝenerale, vilaĝanoj estis amikemaj kaj bonkoraj.

Ili havis revon iam trovi sorĉajn semojn por la ĝardeno.

Oni diradis, ke plantitaj semoj kreskos, kaj en unu belega tago aperos la ĝardeno kun la arboj, kiuj donos magiajn fruktojn la tutan jaron.

Kaj krom manĝaĵo, la fruktoj donacos sanon kaj felicon al la homoj.

Tute neatendite en unu suna tago aperis uragano kaj pluvego.

Post terura okazaĵo, multaj homoj restis sen la domoj, sen ĉio.

Sed ne nur tio estis tragedio por "Verda" vilaĝo, tragedio "aperis", kiam la loĝantoj komencis konfliktadi unu kun alia, kulpigi ĉiujn en okazaĵo, eĉ komencis apartiĝi kaj diri, ke necese forigi multajn loĝantojn el la "Verda" vilaĝo.

Kvereloj daŭris longe, ne helpis eĉ tio, ke multaj loĝantoj akceptis en siajn domojn tiujn, kiuj restis sen la domo.

En la koroj de ĉiuj loĝantoj aperis malpaco kaj malkontento.

Post la tempo, ĉiuj forlasis amatan vilaĝon kaj forveturis.

Pasis jaro, eble iomete pli, kiam unu vaganto, kiu foj-foje vizitis faman vilaĝon, alvenis, sed ekvidis preskaŭ dezerton.

Restis nur kelkaj domoj kaj seka tero.

La vaganto eksidis sur la tero kaj malgaje malfermis sian saketon.

Tie estis sorĉaj semoj, kiujn li finfine trovis por transdoni al la loĝantoj.

Semoj, kiuj jam ne estis bezonataj.



Pipi (Ĉinio)



aŭtoro Pipi

veston kaj kravatton. Post tio mi elhejmiĝis, kaj taksie veturis al la stacidomo. Ĉ. 40 minutojn poste mi atingis la stacion.

Kiam mi atendis trajnon en la atendejo, mi subite trovis, ke mi surhavis vojaĝŝuojjn. Fulmo kaj tondro! Jen mi forgesis porti ledajn ŝuojn! Restis nur ĉ. 30 minutoj ĝis la alveno de la trajno. Estis jam tro tarde se mi iris returne hejmen por ŝanĝi ledajn ŝuojn. Kion fari? Hezitante kelkan tempon, mi decidis aĉeti unu paron da ledaj ŝuoj en magazeno situanta najbare de la stacio. Mi hastis en la magazinon kaj direktis min al la vendotablo por ŝuoj. Post longa okulmezurado, mia rigardo haltis sur paro da purpurruĝaj ŝuoj el dura bovledo, kun la fabrikmarko de "Maljunula Kapo" kaj kun la prezindiko de 380 juanoj. Fingromontrante al la paro da "Maljunulaj Kapoj", la vendistino rimarkigis al mi ke restas nur unu paro da 41-mezuraj ŝuoj en tiu speco kaj ŝi donus al mi rabaton se mi volus. Nee skuante la kapon, mi diris al ŝi ke la mezuro de la ŝuoj, kiujn mi portas, devas esti 43 kaj tiu paro estas du numerojn pli malgranda. La vendistino asertis al mi, ke ledaj ŝuoj ju pli uziĝas, ili fariĝas des pli malstriktaĵ, kaj tio certe ne estos problemo se mi povas enmeti en ilin miajn piedojn. Mi estis konvinkita de la vendistino, kaj provis ilin. Estis vere, ke miaj piedoj eniris. La vendistino petis min fari kelkajn paŝojn por sperti ĉu aŭ ne ili estis oportunaj. Post kelke da paŝoj, mi sentis, ke ili estis komfortaj. Fine mi prenis ilin kontraŭ 300 juanoj.

Paro da ledaj ŝuoj

Dum mia tuta vivo mi ĝuis multajn parojn da ledaj ŝuoj. Kiom da? Mi ne memoris. Sed nur unu paron da ledaj ŝuoj mi neniel povis forgesi eĉ ĝis la morto.

Tiun paron mi aĉetis kiam mi estis en la aĝo de 30 jaroj.

Tio estis aŭtuna frumateno. Mi frue ellitiĝis, ĉar mi planis iri al Dalian* por ĉeesti Esperantan kunvenon. Mi tuj post la manĝo okupis min per vestado. Mi surportis miajn elegantajn okcidentan

Deponinte miajn vojaĝŝuojn en la deponejo, mi envagoniĝis. Sidante sur la kanapo, mi de tempo al tempo mallevis mian kapon kaj ŝate okulkaresis tiun paron da belaj "Maljunulaj Kapoj". Mi sentis ekstazon.

Post ĉ. unu horo, la trajno eniris la stacion de Dalian. Mi elvagoniĝis kaj elstaciĝis. Mi bezonis piediri duonhoron por atingi la kunvenejon. Mi grandpaŝe iris kaj iris, kantetante, iris kaj iris. La ĉielo estis klara kaj la aero estis freŝa. La vetero estis tre bela. Mi estis vigla kaj en gaja humoro.

Post ĉ. dekkelke da minutoj da vojado, mi ricevis la senton, ke la ŝuoj estis iom striktaj. Eble ĝuste kiel la vendistino diris, ke novaj ŝuoj komence estas striktaj! Mi tiel konsolis min mem en la koro. Sed ju pli mi iris, ili des pli kaj pli striktiĝis kaj premis min. Miaj piedoj estis en la dilemo, ĉu iri antaŭen aŭ ne. Kiel miaj piedfingroj, tiel ankaŭ miaj maleoloj ekstreme doloris min. La boranta doloro min draste atakis. Mi havis tian senton, kvazaŭ du monstroj per akraj dentoj ĉirkaŭmordus miajn maleolojn. Mi havis neniun alian elekton, ol malrapidigi la marŝon. Mi paŝo post paŝo lante movis miajn piedojn antaŭen kvazaŭ per tiaj paŝoj, per kiaj iris la virinoj kun vinditaj piedoj pasintece en antikva Ĉinio. Premante la dentojn kaj glutante la mordantan doloron, mi finfine min trenis tra la tuta vojo ĝis la celo ...

Tiun tagon, la ŝuoj terure min ĉagrenis kaj doloris. Ili tiel turmentis min, ke mi apenaŭ volis plu vivi! Mi sentis tian embarason, kian mi neniam antaŭe sentis. Kiel mi volis detiri kaj dispedbati ilin kiel ĉifonojn tre tre malproksimen!

Reveninte hejmen, mi demetis tiun damnindan paron da "Maljunulaj Kapoj". Miaj piedfingroj kaj maleoloj ricevis frotvundojn kaj la sango makulis miajn ŝtrumpetojn. Vidante tion, mia edzino hahae diris al mi:

"Forĵetu ilin! Preferas esti sub miaj ŝuoj ol toleri ilin, ĉu?"

"Ili estas tre novaj kaj karaj. Kiel domaĝe forĵeti ilin!" mi objetis.

"Laŭ vi, kion ni faru pri ili? Ili estas tro malgrandaj por vi. Se vi volas porti ilin plu, estas pli bone, ke vi fortranĉetu viajn kalkanojn por adapti viajn piedojn al ili!" mia edzino rebatis.

"Donacu ilin al via patro!" mi proponis.

"Al mia patro ŝuoj ne mankas. Prefere sendu ilin al via patro. Via patro jam havas grandan aĝon. Li la tutan vivon neniam ĝuis ledajn ŝuojn. Lasu lin ĝui ilin unu fojon! Eble ili bone sidus al via patro!" komentis mia edzino.

"Konsentite!" mi ĝoje kapjesis.

Finfine tiuj ledaj ŝuoj estis tiel ekspeditaj.

Pasis multaj jaroj. Mia patro mortis. Post la funebra ceremonio mi kaj mia patrino ordigis la aferojn postlasitajn de la patro. Mia patrino tiris el sub la vestoŝranko unu paron da ledaj ŝuoj. Tio ĝuste estis la ŝuoj, kiujn mi forsendis. Ili estis trivitaj, plenaj de truetoj. Vidante ilin, mi demandis al mia patrino:

"Ĉu tio ne estas la paro, kiun mi sendis?"

Aŭdinte tion, mia patrino eksnufis, kaj tuj sekve larmoj ŝprucis el ŝiaj okuloj.

"Jes," mia patrino respondis. "Tio ĉi estas la sola paro da ledŝuoj, kiun via patro ĝuis en sia tuta vivo. Ĉiun fojon, kiam la homoj en la vilaĝo vidis, ke via patro surhavante ledajn ŝuojn sur la monto paŝtas azenojn, ili tre enviis lin, dirante, ke li havas bonan filon. Aŭdinte la laŭdojn, via patro sin sentis ne nur ĝoja, sed ankaŭ fiera, kaj rideto tuttage ŝvebis ĉirkaŭ liaj lipoj kaj brovoj."

Mi konfuzite ree demandis:

"Mia patro estis ŝparema la tutan vivon. Li eĉ formetis tolajn ŝuojn por laborado en kampo, ĉar li domaĝas ilin. En ledaj ŝuoj paŝtante azenojn surmonte, ĉu li ne timis erodi ilin?"

Ĉe tio, la patrino ploris pli kaj pli forte. Larmante, ŝi diris:

"Domaĝi ilin estis malŝpari ilin. Kiu alia povus uzi ilin se via patro ne uzis? Sciu, la piedoj de via patro estis malpli grandaj ol viaj, kaj viaj ŝuoj estis tro vastaj, por ke li povu porti ilin. Por ke la ŝuoj firme sidu al li, li estis devigita enŝovi en ĉiun ŝuon po du tavolojn da alplandaĵoj. Malgraŭ tio, la ŝuoj ankoraŭ sentigis larĝaj. Ĉiam, kiam li paŝtis azenojn, li ĉiam kaŝis en la poŝo kanabŝnuretojn."

"Por kio li kaŝis ilin en la poŝo?" mi scivole demandis al la patrino.

"Por kunŝnuri la ŝuojn kaj la piedojn!" daŭrigis la patrino, spasme plorsingultante, "La ŝuoj, tre lozaj, neobeemaj al la piedoj, multe ĝenis lin! Paŝante tien-reen sur la deklivo, via patro ofte stumblis kaj foje eĉ tordis sian piedon. Por submetigi la ŝuojn al li, li eltrovis la bonan rimedon. Kiam li vidis, ke en la ĉirkaŭaĵo estas neniu, li ŝnure kunligis la ŝuojn kun la piedoj. En tia maniero li zorgeme ĝuis ilin kvin jarojn, pro ili ĝojis kvin jarojn kaj ankaŭ suferis kvin jarojn!"

Je tio, miaj larmoj torente fluis.

La patro mortis preskaŭ dek jarojn. Ĉi-jare en la Festo de Klaro kaj Brilo mi veturis hejmen por "balaado de la tomboj**". Kiam mi estis survoje al la tombejo, ĉe la riverbordo de la vilaĝrando mi revidis la ledajn ŝuojn, forĵetitajn post la morto de la patro, kiuj, tute senkoloriĝintaj kaj ŝrumpiĝintaj pro la vento kaj la sunumo, ankoraŭ silente restis kuŝantaj en sovaĝa herbo sub la arbo. Ĉe la vido de tio, mia koro abrupte ekremis. Mi eksentis kvazaŭ pikon en la okuloj, kaj larmoj tuj venis en miajn okulojn ...

Mi pensis, ke, se mia patro nun ankoraŭ vivus, mi certe mendus paron da laŭmezuraj ledaj ŝuoj por li, por ke li surmetu ilin kaj bone frandu la homvivan vojaĝon ĝis la fino.

* Dalian estas fama ĉemara urbo, situanta sude de Liaoning-provinco de nordorienta Ĉinio.

** Festo de Klaro kaj Brilo estas la 5-a (aŭ la 4-a) de aprilo. En tiu ĉi tempo ĉiujare oni en la malnova Ĉinio faris sian filecan devon al siaj prapatroj per "balaado de la tomboj", kaj en la nova ili honoras siajn karmemorajn mortintojn per floroj.

Yin Jiaxin (Ĉinio)



Aŭtoro Yin Jiaxin

Lingvo kiel ponto

Iun printempon, dum mi ĉeestis la ĉinan eksportan foiron en Guangzhou, maljuna komercisto, akompanata de junulino, venis al mia eksponbudo. La junulino en neflua angla lingvo demandis al mi: “Ĉu vi povas paroli la italan lingvon?”

“Ne,” mi respondis en la angla lingvo.

“Ĉu la franca?” ŝi demandis denove.

“Ne,” mi respondis kun bedaŭro.

Hazarde mi ekmemoris, ke fraŭlino Liu de la najbara budo povas paroli la francan lingvon. Mi tuj petis helpo de fraŭlino Liu.

La maljunulo volis mendi de mi du mil kvincent T-ĉemizojn. Nia traktado iris jene: La maljunulo diris al la junulino en la itala, la junulino interpretis al fraŭlino Liu en la franca, kaj fraŭlino Liu interpretis al mi en la ĉina. Poste, en la franca fraŭlino Liu al la junulino interpretis kion mi diris, la junulino al la maljunulo interpretis en la itala. Tiele, ni elspezis tutan matenon pro simpla negoco.

Antaŭ ol mi estis faronta la kontrakton, la maljunulo postulis, ke mi presu desegnon sur la T-ĉemizon. Li montris al mi desegnon de verda stelo.

“Ĝi estas Esperanta stelo, ĉu ne?” mi scivole demandis.

“Jes,” ekbrilis la okuloj de la maljunulo, li en Esperanto demandis al mi: “Ĉu vi scias pri Esperanto?”

“Jes,” mirigite mi Esperante diris: “mi mem estas esperantisto.”

“Ankaŭ mi estas esperantisto.” Li tre ĝojis premante mian manon.

“Kaj ankaŭ mi!” la junulino vortumis ekscitite.

Nia triopo ekridis laŭte, dum apude fraŭlino Liu tute konfuziĝis.

Lingvo funkcias kiel ponto. Esperanto povas la ponton tuj mallongigi.

Serĉi pretekston por viziti la patrinon

Je mia aĝo de kvar jaroj, pro malriĉeco, la gepatroj adoptigis min al la pli juna onklo, kies familio vivis iomete pli bone ol la mia. Nuntempe, la patro kaj la adoptaj gepatroj jam forpasis, dum la patrino fartas sane. Mi kelkfoje invitis la patrinon vivadi en mia familio. Sed ŝi obstine volas nek loĝi kune kun mi nek akcepti mian iun ajn helpon, ĉar, laŭ ŝia diro, ŝi ne vivtenis min antaŭe, do ŝi preferas ne ĝeni min nun.

Post sia eksedziĝo, mia pli juna frato loĝas kun la patrino en luita domo, kiu distancas de mia loĝejo je kvar kilometroj. Mia frato laboras tre malproksime, ĉiutage eliras frumatene kaj revenas malfrue. Kiel introvertito, li malofte interparolas kun la patrino. Do tuj kiam al mi ne mankas tempo, mi stiras la aŭton por viziti la patrinon kaj babiladi momenton kun ŝi. Estas malfacile paroli kun la patrino, kiu iomete surdas. Tamen mi ĉiam sentas min trankvila kiam ŝi al mi parolas tro laŭte, ĉar ju pli laŭte ŝi pridemandas tiun kaj ĉi tiun, des pli montriĝas ke ŝi estas sana. Ja estas feliĉo por gefiloj, ke sanas gepatroj.

La patrino trapasis tre multe da mizeraĵoj, do ŝi neniam konsideras vivan malfacilaĵon kiel malfacilaĵon, ĉiam dirante ke ŝi vivas bonan vivon. Ŝi neniam esprimas sian deziron por vizito de la gefiloj. Mi scias, ke nur kiam ĉiu familio de la kvar gefiloj restas harmonia kaj sekura, la patrino sentas sin kontenta kaj senseleca, ne atentante kiu venas aŭ ne. Ĉiufoje kiam mi ŝin vizitis, ŝi ĉiam provis konstati, ĉu mi venis por iu celo, ripete demandante: “Por kio vi venas?” Ŝi kutime demandas, ĉu mi jam manĝis, eĉ se tiam estis la oka- naŭa horo vespere aŭ la tria- kvara posttagmeze. Traktante min kiel gaston, ŝi intencis elportis al mi manĝaĵojn, kvankam en la kuirejo troviĝis nur preta plado kaj telereto da la de ŝi peklita legomo. Post kiam mi sciigis al ŝi, ke mi venis por nenio, ŝi ĉiufoje rigardis min duondube. Ŝi ĉiam interrompis mian interbabiladon per siaj demandoj: “Ĉu vi venis por io?” “Kio okazis al via familio?” “Kiel via edzino fartas?” “Ĉu via filo bonas en la lernejo?” Ŝajnas al ŝi, ke mi vizitas ŝin certe por io. Mi finfine komprenis, ke ŝi ne kutimas al mia vizito sencela.

Por forigi el la patrino la senton ke mi vizitas ŝin nepre por iu celo, antaŭ ol iri al ŝi, mi unue serĉas pretekston, kiun ŝi sentas konvena: doni ion al la frato, kontroli lian komputilon, alporti la el komparo aĉetitajn legomojn, postuli al la patrino la de ŝi peklitan vegetaĵon (efektive mi neniam ŝatas peklitan legomon) ... Poste, mi vere ne povas eltrovi novan pretekston.

Troviĝas brulligna kuirforno en la domo de la patrino. Por ŝpari monon, ŝi kiel eble plej multe uzas la brulligna kuirforno anstataŭ la fornon de likvigita gaso. Instaligiĝis du novaj klimatiziloj en mia domo, kaj restis eluzitaj pakumoj, kiujn mi donis al la patrino por bruli. Ŝi tre ĝojis, dirante ke mi devas doni al ŝi bruleblajn eluzitaĵojn, kiun mi iam ajn havos. Subite mi cerbumis tion, ke por vidi ŝin de tempo al tempo mi povas alporti bruleblaĵojn. Ekde tiam, mi intence amasiĝas bruleblaĵojn, ekzemple, skatoletojn, malnovajn librojn kaj ĵurnalojn k.t.p. Kiam mi iras al la patrino, mi alportas nur unu parton da la kolektitaĵoj, sed ne ĉiujn, ĉar tiamaniere mi povas plurfoje viziti la patrinon.

Interesa stafetkuro en verkado

Samideanino Lenke Szász verkis fablon kaj ŝi alvokis daŭrigon de la fablo. Du samideaninoj reagis per daŭrigo de la enhavo rilata al la fablo. Fakte la stafetkuro en verkado povas profitigi ambaŭ verkantojn kaj legantojn.

Lenke Szász (Rumanio)



La grilo kaj la formiko

Post la rifuzo de la formiko, la grilo iris hejmen hontigita. Lia hejmo estis malvarma sen hejtado, kaj li rigidiĝis pro frosto sub la flava folio- kovrilo. “Sed mi vivas ankoraŭ”, konstatis li matene. Li ekstaris kaj eliris el sia dometo. Ekstere ĉio estis prujnokovrita, kaj kiam la suno ekaperis, la prujno arĝente brilis sur la herbaro. La grilo ekhaltis por momento, li sentis emon prikanti

tiun belecon. Sed liaj fingroj frostis, kaj tio rememorigis al li la dumnoktajn pensojn: Li devas iri por kolekti ion, kion li trovos sur la kampo kaj en la arbaro: ion manĝeblan kaj hejtilon, antaŭ ol ĉio estos kovrita per neĝo. Eble tiel li ĝisvivos la vintron. Kaj eble la vintro ne estos tro malvarma.

Vigle li ekpaŝis por varmiĝi iomete. Li plukis berojn el arbustoj, sekajn vergetojn por hejtado, kaj ekiris al sia dometo. En lia koro eknestis espereto, kaj li zumkantadis dum paŝado.

Hejme li deponis la kolektitajn aĵojn, kaj ekiris denove, ja ĝis la vesperiĝo li povos ankoraŭ kolekti nutraĵojn. Ĉi-foje li iris pli malproksimen, kaj la sako sur lia dorso pleniĝis.

Subite la silento estis rompita de terura bruego. Ĝi estis bruo de maŝina segilo. Homoj laboris ie en la arbaro, faligis arbojn. La grilo klopodis eviti tiun lokon, sed la bruego ĉie aŭdeblis. Almenaŭ li evitos la homojn irante sur ĉirkaŭvojo. Ja la homoj kun botoj estas grandeguloj, ili povus surpaŝi lin, kaj eĉ ne rimarkus, ke la magra grilo mortis piedpremata sub la botoj.

Pene li portis la plenan sakon tra la arbaro. Subite li ekaŭdis korŝiran ploregon. Kiu ploras tiel senespere? Li ekvidis baldaŭ la formikon apud sia dometo. Kio okazis? La grilo proksimiĝis kun miro al ŝi.

– Kial vi ploras, formiko? Kio okazis al vi? – li demandis.

– Ho ve, mia domo estas ruinigita! Ho ve, miaj havaĵoj estas neniigitaj! Mi mortos pro malsato dum la vintro!

– Sed kial? Kio okazis? - demandis kompateme la grilo.

– Homoj, la malbenitaj arbohakistoj detruis mian domon. Ili trairis ĝin per ĉaro, ruinigis ĝin kun miaj riĉaj proviantoj. Mi mortos pro malsato kaj frosto, ho ve! Sed vi de kie venas? Kio estas en via sako?? – demandis la formiko scivoleme. Eĉ inter larmoj ŝi ekvidis, ke la grilo havas ion en la sako.

– Mi kolektis iom da nutraĵoj por la vintro. Ĝi ne sufiĉos, sed mi kolektos ankoraŭ, antaŭ ol falos neĝo. Sed vi frostotremas. Venu, eniru en mian domon! Mi bruligos fajron en la forno, kaj faros por vi varman teon. – diris la grilo, kaj tiel li faris.

La formiko rigardis ĉirkaŭen en la dometo. “Vere li estas tre malriĉa. La grilo posedas nenion valoran krom violono. Sed ĉu ĝi valoras? Amuzilo por nenifarantoj ĝi estas, pensis la formiko.

Dume la grilo bruligis la verĝetojn, kaj metis teujon kun akvo sur la fornon. La ejo baldaŭ varmiĝis, kaj sentiĝis la bonodoro de la herba teo. La grilo verŝis teon en glanĉapetojn, ili servis kiel tasoĵ por li.

La varma teo estis tre bongusta en tiuj ĉarmaj uĵetoj. La formiko akceptis ĝin iom honteme, sed ŝia humoro iom post iom pliboniĝis.

– Mi dankas vin, grilo. Ĉiam mi pensis, ke vi estas facilanima, mallaborema, pro tio mi ne volis helpi vin. Sed nun mi vidas, ke vi estas bonkora, pli ol miaj parencoj. Ili ĝojis, ke iliaj domoj ne estis tuŝitaj, kaj rifuzis helpi min – ŝi diris.

La grilo ridetis kaj diris, ke verdire ŝi pravis, ja li devintus kolekti provizojn dum la somero. Sed nun li kolektos, kiom li povos por vivteni sin dum la vintro.

– Ne malĝoju, formiko! Restu en mia domo, kaj mi dividos kun vi mian malmulton.

La duan tagon ili kune iris al la kamparo por fari provizon por la vintro. Sur la kampo ili trovis falintajn grajnoj, kaj posttagmeze revenis kun sako plena de nutraĵoj. En la dometo de la grilo mankis kamero, kaj ili cerbumadis, kien meti la kolektitajn aĵojn, kiam subite aŭdiĝis krio el la korto:

– He, formiko! Bofratino!

Li estas la edzo de mia fratino – rekonis la formiko la voĉon. - Kion li volas? Ja ili forpelis min, kiam mi petis helpon de ili.

La grilo eliris el la dometo, kaj invitis lin eniri. Tiu eniris, ekvidis la bofratinon apud la plena sako kaj miris. Li kredis, ke la grilo ne havas tiom da manĝaĵo por sia konsumado, kaj kuŝas senforta en lito. Se li havas liton, kompreneble...

– La formiko demandis: - Kial vi gapas? Diru, por kio vi venis?

La bofrato embarasite balbutis: - Via fratino ... mia edzino diris, ke mi invitu vin loĝi ĉe ni. Ja ĉiuj najbarinoj priklaĉas ŝin, ĉar ŝi lasis sian fratinnon loĝi ĉe mizerulo.

Estas honto por ni, diris la edzino, ja ni estas riĉaj. Vi povus loĝi ĉe ni ĝis la printempo, ni havas liberan ejon apud la kamero. Tie ne estas tro malvarme eĉ sen hejtado. Venu do, ne hontigu nin antaŭ la najbaroj!

– Bone, ke vi havas malvarman ejon por fratino. Por ke oni ne priklaĉadu vin – respondis moke la formiko.

– Mi vidas, ke vi kolektadis proviantojn por la vintro. Kunportu vian parton! Per ĝi vi povos pagi al ni lupagon por la loĝejo – diris la bofrato.

– Forportu vin, fiulo! Iru hejmen al via samspeca edzino! Diru, ke ŝi eltenu la primokojn, ja vi ambaŭ meritas tion. For! For! Mi ne plu volas vidi vin – kriis la formiko.

La bofrato grumblante foriris. La grilo kaj la formiko aŭdis, kion li duonvoĉe diris:

– Stulta virinaĉo!

Ili ridis kaj reiris gaje en la dometon por aranĝi la kune amasigitajn proviantojn.

Adrienne Lászlóné Pásztor (Hungario)



(daŭrigo de ĉi fablo)

... La grilo premata sub ŝarĝo de sia anima doloro, aksele kun lia ne uzebliginta violono, iris tra la pejzaĝo nerigardinta ĝin en la densa neĝfalo. Li iris kien la okuloj rigardis, li iris kien la piedoj portis lin. Li metis piedojn unu post la aliaj, vojon ne vidanta antaŭ si pro la falantaj larmoj. Lia vojo kondukis en la arbaron. Ĉe kverkoarbo li eksentis, ke la neĝo ne falas sur la vizaĝon.

–La arbaro estas bona loko. La hakistoj jam foriris. La arbaron kovras ombro. Regas ĝin silenta sombro. Mi provos serĉi por mi ian lokon por mia vintra loĝejo, se tiu ankoraŭ ekzistas. Mi devas rapidi.

Kaj ĉar li pasigis tempon ĝuste ĉe la dika kverkoarbo al kio li dehakis vojon por si en la arbaro, de la supro ĝis la grundo lia rigardo finkuris sur ĝi. Supre ankoraŭ ĝi havis sian foliaron. – Povas esti savata ĝia trunkosubo – pensis li, – ja ne falis neĝo ankoraŭ ĝis nun tien. Kiam la grilo zorge ekzamenis la ĉirkaŭaĵon de la kverkoarbo, li rimarkis amason da folioj apud la arbo, kiujn certe balais tien la hieraŭvespera forta vento. Tiam ekvidis la grilo iun fendon pro la foliamaso ĝis tiam ne rimarkitan. –La kavaĵo povus servi kiel bona rifuĝejo travintri. Mi enŝoviĝos tie kontraŭ ne frostiĝo – vekiĝis la espero en ĝi. – Mi rigardos: ĉu ĝi povus esti mia estonta hejmo.

Jam li ne plu lacis, scipovis rapide iri al la kverkotrunka subo por rigardi, kio estas tie. Li ne senhaviĝis de la plezuro! Ĉi tiu rifuĝejo aspektis konvena tial, ĉar la blovo

blovis tien ankaŭ kelkajn glanujojn anstataŭ la perditaj teuoj, eĉ fekaĵojn de cervoj por hejti per ili. Plezurigis lin vidi ankaŭ surgrunde kuŝantajn sekajn berojn de ruĝa vakcinio, rozoberojn ĝis tiam ankoraŭ ne disfrostiĝintajn, unu sovaĝpiron kaj grandan bukedon da lanca plantago kun siaj verdaj semoj sukodensaj. Ankaŭ tiujn la ventego blovis tien. Al ĉi tiuj li ĝojegis, ĉar ne nur nutraĵon sed ankaŭ drinkaĵon servos ĉi tiuj dum la longaj vintraj tagoj.

Nun malfrusezone jam malfacile solvebla estus la iro en la neĝa arbaro por kolekti tiujn. Li mem sola, ne kapablus fari tion. Nun ĉio ĉi kuŝas surtere antaŭ li. Li nur devas klini sin por kolekti kaj porti la trezoraĵojn en sian hejmon!

Pro la trovo de nova hejmo la ĝojego multigis la forton. La grilo pene kuntrenadis ĉiun aĵon trovitan antaŭ la kverkoarbo. La trovitajn cervofekajpecojn li metis kiel pardonon al la antaŭo de la fendo de sia ĉambrego. Pere de tiu muro li baris la vojon de la enfajfanta vento, kaj baldaŭ estiĝis konvena varmo.

Li finante la aranĝadon de la bezonataj aĵoj, ekregis lin la fortega laceco. En la nova hejmo mortlace, iom malĝoje sed trankviliĝante li dronis en profunda dormo sub la dika sekfoliaro. Kiam la neĝo kiel mola kovrilo fine kovris la tutan pejzaĝon, jam li dormis senĝene, pace puraanime kiel la justuloj.

Luiza Carol (Israelo)



(daŭrigo de ĉi fablo)

La grilo paŝis malrapide tra la neĝo, sen ajna celo. En lia menso zumis trista melodio, kiun li ne plu povis ludi. La melodio anstataŭis liajn pensojn, ĉar li ne plu havis forton pensi pri la senespera situacio en kiu li troviĝis. Li sentis la froston ĉirkaŭvolvantan lian korpon kaj ankaŭ lian menson. Nur lia neaŭdebla zumado donis al li iom da forto por movi siajn maldikajn kruojn tra la neĝo, laŭ pli kaj pli malrapida ritmo...

Kaj tiam aperis ŝi la grilino. Li rekonis ŝin. Ŝi estis la gaja nepino de lia iama instruisto pri muziko. La plej gaja el ĉiuj grilinoj, kiuj dancis dum la somero laŭ lia muziko... La rememoro pri la somero varmigis la koron de la grilo, kvazaŭ milda sunradio karesis lin denove. Sed kial la grilino estis tiom malgaja nun? Kaj kial ŝi rampis tra la neĝo tremante samkiel li?

La grilino rakontis, ke ŝia avo malsanas, kaj ŝi venis al lia domo por zorgi pri li. Ŝi ĵus trovis lin tremantan en sia domo, sen ajna kovrilo kaj sen kuseno. En lia kamero estis nenio, krom kelkaj violonoj, gitaroj kaj mandolinoj. Ŝi despere estis serĉanta

molajn sekajn muskojn, por fari matracon kaj kovrilon al sia avo.

La novaĵoj pri sia kara instruisto ekflamis subite la tutan korpon de la grilo. “Mi scias kie troviĝas molaj sekaj muskojn” li diris. Kaj la duopo rapidis por kolekti muskojn kaj enmeti ilin en la domon de la maljunulo. Tiu ĉi estis ravita rekoni sian plej talentan lernanton. Li invitis lin ekloĝi kun ili dum la tuta vintro. La grilo konsentis, kaj la grilino eksaltis pro ĝojo.

La loĝejo de la instruisto estis modesta, sed forta kaj varma, konstruita ene de seka arbotrunko. La grilo jam akiris multan sperton pri domkonstruado kaj kolektado de manĝaĵo. Li nun uzis tiun sperton por prepari ĉion necesan antaŭ ol la granda frosto komenciĝos. Li kaj la grilino tapiŝis la tutan loĝejon per muskoj, kaj preparis etan ŝrankon por iom da manĝaĵo. Sed la maljunulo konsilis ilin ne akumulu tro da manĝaĵo, ĉar la grila tradicio estas dormi dum la tuta vintro, sur seka varma matraco kaj sub seka varma kovrilo. Li diris: “Plej saĝe estas dormi kaj ne muzikumi dum la vintro, por ne altiri la atenton de la strigo aŭ de alia birdo aŭ besteto.” Do, ili ĉiuj ekdormis lacaj kaj feliĉaj.

Printempe, la grilo kaj la grilino geedziĝis. La grilo ricevis novan bonegan violonon de sia kara instruisto, kiu nun fariĝis lia boavo. Kaj ĝojaj grillantoj denove aŭdiĝis...



Jado (Ĉinio)



Plendo de la hundo

Antaŭ kelkaj jaroj mi bredis hundon. Li estis tre aminda, sagaca kaj inteligenta. Mi donis al li nomon Koboldo. Mi ĵuras al la ĉielo kun plena certeco, ke li estas vere purrasa luphundo. Tamen iutage li perdiĝis. Mi serĉadis lin ĉien sub la ĉielo, mi tamen ne sukcesis trovi eĉ lian hareton. Pro tio mi falis

aŭtoro Jado

en melankolion kaj somnambulecon.

Iutage la perdiĝinta hundo neatendite aperis, ankoraŭ tiel harbrila kaj fortika kiel antaŭe. Kiam li preterpasis mian pordon, mi voke haltigis lin, kun granda ĝojego.

"He! Ĉu vi ne estas mia Koboldo? Kie estis vi en la lastaj jaroj? Kiel mi morte sopiras al vi!"

"Ha! Mia malnova mastro, ĉu vi ne informiĝas pri mia stato? Nun mi oficiĝas kiel asistanto de la district-estro." li bojis aroganten levita kapo, svingante la voston.)

"Mia kara hundo, mi ne komprenas, kial vi restis ĉe li. Ĉu mi iam faris malbonon al vi?"

Aŭdinte tion, la hundo iom hontiĝis.

"Post via foriro, longe mi manĝas sen gusto, dormas sen dolĉo. Efektive mi ne riĉas kaj potencas kiel via mastro. Sed estas fakto ke mi vin amas, kaj neniam ofende traktis vin. Malgraŭ ke mi kunvivis en malabundeco, ni certe ĝuis egalecon. Kiom mi manĝis, tiom vi englutis. Kial vi ne komprenas mian korsenton?" mi plendis.

La hundo jelpis:

"Mia kara sinjoro, mi ne estas sendankemulo, kreu! Via bono gravuriĝis en mia cerbo. Sed mian utilecon mi povus montri, se mi servus ĉe vi. Vi scias, ke mi estas luphundo, vere purrasa luphundo. Sed kiu agnoskis mian raspurecon kiam mi estis ĉe vi? Por defendi mian dignecon vi preskaŭ disputis kun ili kiel en sangverŝa batalo, tamen tion ĉiuj ignoris. Tiuj viaj najbaraĉoj kaj amikaĉoj daŭre rigardis min kiel bastardon kaj neniam donis al mi estimon. "

La hundo sentis sin maljuste traktita, kaj bojante li rigardis ĉirkaŭen kvazaŭ esprimante sian grandan indignon al la mondo, kaj li daŭre diris:

“Kiel aliaj kapablaj luphundoj, mi lojale laboras samkiel domgardisto, protektante riĉaĵojn kontraŭ ŝtelistoj, kaj helpas la mastron flegi infaneton. Kiu vidis ĉion ĉi tion! Ne plu povante toleri tion, mi decidis serĉi novan mastron.

La hundo pasis de kolero al ĝojo, “Post kiam mi ekservis ĉe la district-estro, mia famo tuj restariĝis, kaj neniuj plu nomis min bastardo. Eĉ tiuj homaĉoj ĵus menciitaj, kiuj antaŭe ofte min kalumniis, laŭdas mian raspurecon kaj senkomparan kapablon, pepante, ke mi estas plej plej bona luphundo en la mondo, kaj eĉ en la kosmo, se sur aliaj planedoj estus hundfamilio. Komike, vere komike, ĉu tia estas la homaro?”

Skuante sian kapon li arogante rigardis min kun malestima mieno. Li diris, “Kara sinjoro, se mi daŭre lojalus ĉe vi ĉu mi povus akiri tiel altan honoron?”

Senvorte mi klinis la kapon kun ruĝiĝanta vizaĝo. Kaj vidinte ke mi estas embarasita, la hundo min ekkompatis, “Kara sinjoro, vian situacion mi bone konas, tio iam ankaŭ ĝenis min. Sed nun ĉio venas al la fortuno. Vi renkontis la favoran stelon jam brilanta super vi. Mi jam diris, ke mi ne estas sendankemulo. Mi nepre serĉos altsalajritan postenon por vi. Ne estu singena, vigligu vin!”

Ŝajne ion ekmemorinte, la hundo levis la antaŭan dekstran kruron kaj ĵetis seriozan ekrigardon al io brilanta ligita per bovleda ŝnuro sur la dekstra maleolo. Ĝi estis ora horloĝo. “Ha! jam estas la tempo. Ni vere babilemas. Mi preskaŭ forgesis pri la grava afero. Do ni finu...” La hundo sin turnis kaj foriris.

“Kara hundo, kien vi volas iri?”

“Sinjoro, ne plu malŝparu mian tempon. Mi havas ofican laboron. Mi ne povas ĝin prokrasti. Multaj altranguloj ankoraŭ min atendas. Sed...”

La hundo haltigis siajn paŝojn, “sed, kiel diri? konsiderante vin kiel mian malnovan mastron, mi malkaŝas al vi la sekreton. Mia district-estro devas partopreni en diversspecaj festenoj ĉiutage, kio ja enuigis lin. Do li sendas min al tiuj festenoj anstataŭe. Mi nun iras al festeno. Adiaŭ!”

Tion dirinte la hundo turnis sin kaj rapide forkuris

“Hundo mia, ne forlasu min! Hundo mia, hundo mia!” Mi plenvoĉe vokis.

“Vekiĝu! Vekiĝu! Absurdaĵo!”

Mia edzino pinĉis mian nazon, kaj tiris min el la sonĝo.

Du Guangting (850–933)

La Viro kun Buklaj Vangharoj

Kiam la imperiestro Yang (*jang*) de la dinastio Sui (*sui*) (581– 618) faris vojaĝon por viziti la urbon Jiangdu (*ĝjandu*) (la nuna urbo Yangzhou (*jangĝou*)) en la provinco Jiangsu (*ĝjansu*)), Lia Majesto ordonis al la duko Yang Su gardi la Okcidentan Urbon (t.e. la tiama ĉefurbo Chang'an (*ĉang'an*)). Yang Su estis persono aroganta kaj trudema, rigardante iun ajn alian nekonsiderinda kaj opinianta sin senrivala krom la suvereno en la imperio dum tiu ĥaosa tempo. Donante nenian bridon al sia luksemo kaj fiereco, li kondukis tute ne dece kiel ministro. Li akceptis kiel la oficialulojn, tiel ankaŭ gastojn, duone kuŝante sur kanapo kun junaj belulinoj lin permane subtenantaj apude. Grupoj da belaj servistinoj viciĝis ambaŭflanke de li, pretaj lin servi en iu ajn momento. En siaj konduto kaj ĝuo de la viv-plezuroj li jam senrajte proprigis al si la imperiestrajn privilegiojn. En la lastaj jaroj de la dinastio Sui, li fariĝis eĉ pli kaj pli aŭdaca kaj senskrupula, tute forgesante sian devon al sia suvereno, kun la intenco uzurpi la tronon profitante la ĥaoson, kiu tiam regis en la tuta lando.

Iun tagon, Li Jing (*li-ĝing*), kiu poste fariĝis la Duko de Wei (*vej*) sed tiam li estis nur simpla popolano, venis peti intervidiĝon kun Yang Su, por proponi konsilon pri regna politiko, kaj tiu, kiel kutime, akceptis lin duone kuŝante sur kanapo. Li Jing alproksimiĝis kaj diris kun riverenco: “Nun la imperio estas en tumulto kaj la bravuloj konkuras por potenco. Kiel grava ministro de la kortego, Via Moŝto devus nutri la penson pri la kolektado de bravuloj el la tuta lando kun ĝentileco, anstataŭ akcepto de vizitantoj kun duonkuŝo sur via kanapo.”

Yang Su estis impresita de lia parolo kaj, moderigante sian arogantecon, leviĝis por esprimi sian dankon. Konversaciinte kun Li Jing kelkan tempon, li tre ĝojiĝis kaj akceptis lian konsilon.

Dum Li Jing elokvente paroladis, unu el la servistinoj de Yang Su — tre bela knabino, kiu staris antaŭ ili tenante senpolvigilon kun ruĝa viŝfasko — fikse rigardis Li Jing. Kiam li foriris, ŝi diris al la malaltranga oficisto ĉe la pordo: “Bonvolu iri demandi lian nomon kaj kie li loĝas.” Li Jing respondis al la oficisto. La knabino ripetis en si lian respondon kaj retiriĝis, kaj Li Jing revenis al sia gastejo.

Tiunokte, ĝuste antaŭ tagiĝo, aŭdiĝis mallaŭta frapado sur la pordo de la ĉambro de Li Jing, kaj, kiam li ellitiĝis kaj malfermis la pordon, li trovis, ke tie staras fremdulo, kiu, kun ĉapo sur la kapo kaj purpura robo sur la korpo, portas lignan bastonon kaj vojaĝsakon. Demandite, kiu li estas, la nekonato respondis: “Mi estas

la servistino tenanta senpolvigilon kun ruĝa viŝfasko en la domo de la duko Yang Su.”

Li Jing do rapide invitis ŝin eniri en la ĉambron. Post kiam ŝi demetis la eksteran robon kaj la ĉapon, li vidis, ke ŝi estas bela knabino en la aĝo de ĉirkaŭ dek ok jaroj kun ĉarmaj vizaĝtraĵoj sen ŝminko, vestita per brillkoloraj vestoj. Ŝi riverencis lin kaj li, mirkonsternite, reciprokis ŝian riverencon.

“Mi servis Yang Su jam longan tempon,” diris la knabino, “kaj vidis multajn eminentajn vizitantojn. Sed mi trovis neniun, kiu egalus vin. Kiel kuskuto al kroĉiĝanta al usneo, mi bezonas kroĉiĝi al arbo. Jen kial mi venas al vi.”

“Sed la duko Yang havas grandegan potencon en la ĉefurbo; kiel tio povus efektiviĝi?” diris Li Jing.

“Donu nenian atenton al li, kiu ne estas timinda,” ŝi respondis. “Li estas kvazaŭ kadavro, kvankam li ankoraŭ malforte spiras. Multaj el liaj favoratinoj jam forkuris sciante, ke li certe venos al malbona fino; kaj li faris preskaŭ nenan persekuton, por ilin revenigi. Mi jam zorge pripensis tion. Ne estu maltrankvila pri tio.”

Demandite pri sia familinomo, ŝi respondis al Li Jing, ke ĝi estas Zhang (*ĝang*), kaj ke ŝi estas la plej aĝa infano en la familio. Li trovis en ŝi perfektan anĝelon en manieroj, parolo, kaj aspekto. Tiu ĉi neatendita gajno faris lin treege ĝoja kaj samtempe timiĝinta, tiel ke li havis neniun momenton da paco en la menso. Scivolaj homoj venis unu post alia, por kaŝrigardi ŝin tra la pord-fendeto, kaj dum kelkaj tagoj, kvankam oni faris serĉon de ŝi, tamen ĝi ĉesis senrezulte. Poste Li Jing kaj la knabino, kiu estis en vira vesto, rajde forkuris el la ĉefurbo al Taiyuan (*taj-ĵuan*).

Sur la vojo ili haltis en gastejo en la loko Lingshi (*lingŝi*). La lito estis aranĝita, la viando estis kuirata en la potoj, la knabino kombadis ĉe la lito siajn harojn, kiuj estis tiel longaj, ke ili falis preskaŭ ĝis la planko, dume Li Jing okupiĝis je striglado de la ĉevaloj ĉe la pordego. Ĝuste tiam subite iu viro de mez-alta staturato kun bukklaj ruĝaj vangharoj rajdis al ili sur azeno. Li ĵetis sian ledan sakon antaŭ la fornon, prenis kapkusenon kaj kuŝiĝis sur la lito por observi la harar-kombadon de la knabino. Kun forta koleriĝo, sed necerta, kiel agi kontraŭ la viro, Li Jing daŭrigis la strigladon. La knabino ekzamenis la viron per la rigardo, kaj, kun siaj haroj tenataj en unu mano, ŝvingis la alian malantaŭ sia dorso, por fari al Li Jing signon, ke li ne koleru kontraŭ li. Poste, rapide finaranĝinte siajn harojn kaj ĝustiginte sian veston, ŝi ĝentile demandis la fremdulon pri lia nomo. Ankoraŭ kuŝante sur la lito, li respondis, ke lia



familinomo estas Zhang.

“Ankaŭ mia familinomo estas Zhang,” ŝi diris. “Ni povas esti gekuzoj kun la sama familinomo.”

Kun riverenco ŝi do damandis pri lia ordo de pliaĝeco inter la gefratoj, kaj li diris al ŝi, ke li estas la tria infano. Kiam ŝi informis lin, ke ŝi estas la plej aĝa inter la infanoj de la familio, la fremdulo ekridis kaj respondis: “Ĉi-vespere mi estas feliĉa renkontiĝi kun vi, la plej aĝa inter miaj pli junaj gekuzoj.”

“Venu do renkontiĝi kun mia kuzo,” ŝi vokis al Li Jing, kiu alproksimiĝis kaj riverencis lin kaj sidiĝis kun ili ĉe la forno.

“Kion vi kuiras en la potoj?” demandis la fremdulo.

“Ŝafajon. Ĝi probable jam estas sufiĉe kuirita.”

“Mi malsatas,” diris la viro kun bukraj vangharoj.

Dum Li Jing eliris por aĉeti bakitajn platkukojn kun sezamgrajnoj, li elprenis ponardon el la zono ĉirkaŭ lia talio kaj tranĉis la ŝafajon. Post la reveno de Li Jing, ili kune manĝis la viandon. Fininte la manĝon, la fremdulo distranĉis la restaĵon kaj donis ĝin al la azeno por manĝi. Liaj agoj estis tre rapidmovaj.

“Vi ŝajnas malriĉa klerulo,” diris la fremdulo al Li Jing. “Kiel vi prenis al vi tiel mirinde belan edzinon?”

“Kvankam malriĉa, mi estas viro ne sen ambicio,” diris Li Jing. “Mi dirus nenion, se iu ajn alia demandus pri tio, sed mi ne kaŝos ion antaŭ vi.”

Kaj li detale rakontis al li ĉion, kio okazis al li.

“Kien do vi intencas iri nun?” demandis la alia.

“Al Taiyuan,” respondis Li Jing.

“Nu, ŝajnas, ke mi certe ne estas persono, kian vi nun bezonas.”

Kaj li daŭrigis: “Ĉu vi havas vinon?”

Li Jing diris al li, ke okcidente de la gastejo sin trovas vin-vendejo, kaj li mem tuj iris aĉeti vazegon da vino.

Kiam ili komencis drinkadon, la fremdulo diris al Li Jing:

“Mi havas ion frandan por manĝi kun la vino. Ĉu vi povus ĝui ĝin kun mi?”

“Ho jes, kompreneble!” diris Li Jing.

La viro kun bukraj vangharoj do malfermis la ledan sakon, elprenis el ĝi ies dehakitan kapon kun ties koro kaj hepato, sed li remetis la kapon en la sakon. Post kiam li tranĉis la koron kaj la hepaton per sia ponardo, la tri kune manĝis ilin.

“Tiu ĉi homo estas la plej senkonsciencia perfidulo sub la ĉielo. Mi nutris fortan malamon kontraŭ li dum dek jaroj, kaj hodiaŭ mi finfine kaptis lin kaj min venĝis.”

“Juĝate laŭ viaj aspekto kaj teniĝo,” li daŭrigis, “vi estas vera nobla viro. Ĉu vi iam informiĝis pri tio, ke en Taiyuan sin trovas iu persono tre distingita?”

“Mi konatiĝis kun iu, kiun mi konsideras kiel veran grandulon,” respondis Li

Jing. “Miaj ceteraj amikoj taŭgas nur kiel ordinaraj generaloj aŭ kapitanoj.”

“Kia estas lia familinomo?”

“Lia familinomo estas Li, la sama, kiel la mia.”

“Kian aĝon li havas?”

“Nur dudek jarojn aĝa.”

“Kio li nun estas?”

“Li estas la filo de prefektuja generalo.”

“Probable li estas la homo, kiun mi serĉas,” diris la fremdulo. “Sed mi devos propraokule vidi lin, por certiĝo. Ĉu vi povus aranĝi renkontiĝon por mi?”

“Mi havas amikon nomatan Liu Wenjing (*liŭ venĝing*), kiu estas en intimeco kun li,” diris Li Jing. “Ni povos aranĝi intervidiĝon pere de Liu. Sed kial vi volas vidi lin?”

“Iu astrologo diris al mi, ke tie sin trovas stranga aŭguro en Taiyuan. Jen kial mi devos lin propraokule vidi. Vi ekiru morgaŭ, kaj kiam vi atingos tien?”

Li Jing kalkulis, kiel longe daŭros la vojaĝo, kaj la fremdulo diris:

“Renkontiĝu kun mi ĉe la mateniĝo de la dua tago post via atingo tien sur la ponto Fenyang (*fenjang*).”

Tion dirinte, li surzeniĝis kaj foriris tiel rapide, kiel fluge, kaj tuj li perdiĝis el la vido de Li Jing.

Li Jing kaj la knabino ambaŭ sentis sin mirigitaj kun granda ĝojo. Post longa silento ili diris al si:

“Tia brava viro certe ne trompos nin. Ni ne bezonas esti maltrankvilaj.”

Poste ankaŭ ili surĉevaliĝis kaj ekrajdis sur la vojon, vip-stimulante siajn galopantajn ĉevalojn.

En la tago interkonsentita ili eniris en la urbon Taiyuan, kaj, kiel atendite, ree renkontiĝis kun la fremdulo kun granda ĝojo. Ili kune iris viziti Liu, kaj trompe diris al li:

“Iu lerta fiziognomikisto volus renkontiĝi kun Li Shimin (*li-ŝimin*). Ĉu vi povus sendi venigi lin ĉi tien?”

Liu ĉiam alte taksis Li Shimin, sekve li tuj sendis iun, por peti lin veni. Apenaŭ la sendito revenis, Li Shimen alvenis. Neglekte vestita, li portis peltan jakon kun suprenfalditaj manikoj, sed li estis radianta kaj plena de vikleco kaj havis distingitan aspekton.

La viro kun bukraj vangoharoj, sidante sur la lasta ŝidilo en silento, estis frapita de la impona aspekto de Li Shimin. Trinkinte kelkajn pokalojn da vino, li vokis Li Jing flanken kaj diris: “Tiu ĉi sendube estas la estonta imperiestro.”

Kiam Li Jing transdiris tion ĉi al Liu, tiu eĉ pli ĝojis kaj havis ankoraŭ pli altan opinion pri si mem.

Post kiam Li Shimin foriris, la viro kun bukklaj vangoharoj diris: “Mi estas preskaŭ plene certa pri mia konjekto, sed estas nepre necese, ke mia amiko, la taŭista pastro, persone vidu lin. Vi du reiru al la ĉefurbo, sed renkontiĝu kun mi ĉirkaŭ la tagmece de iu tago en la vintrinkejo oriente de la ĉeval-komercejo. Se vi vidos tiun ĉi azenon kaj ankoraŭ unu malgrasan, tio signifos, ke mia taŭista amiko kaj mi estas tie, kaj vi povos supreniri sur la etaĝon.”

Tion dirinte, li diris adiaŭ kaj foriris, kaj refoje Li Jing kaj la knabino promesis fari tion, kion li diris al ili.

En la difinita tago ili iris al la vintrinkejo kaj vidis la du azenojn tie. Levinte ĉiu sian baskon de la robo, ili supreniris sur la etaĝon kaj trovis tie la viron kun bukklaj vangoharoj trinkanta kun la taŭista pastro. Tiuj du tre ĝojis vidi Li Jing kaj petis lin kaj la knabinon sidiĝi kaj kune trinki dekkelkajn pokalojn da vino.

“Malsupre en la ŝranko,” diris al Li Jing la viro kun bukklaj vangoharoj, “vi povos trovi cent mil moneroj. Loĝigu vian edzinon en iu kvietita loko dum kelkaj tagoj, kaj ree renkontiĝu kun mi en iu alia tago ĉe la ponto Fenyang.”

Kiam Li Jing iris al la ponto, li trovis la taŭiston kaj la viron kun bukklaj vangoharoj, kiuj jam estis tie, kaj ili kune iris vidi Liu. Ili trovis tiun ludanta ŝakon, kaj, post reciproka saluto, ili sidiĝis kaj komencis babilon. Liu tuj sendis invitilon al Li Shimin por rigardi la ŝakludon. La taŭisto ludis kun Liu, dum la viro kun bukklaj vangoharoj kaj Li Jing spektis la ludon flanke.

Baldaŭ Li Shimin alvenis. Lia aspekto imponis ilin ĉiujn. Li riverencis kaj sidiĝis, aspektante tiel serene kaj parolante tiel vigle kaj sprite, ke la atmosfero estis tuj animita. Li havis paron da brilaj, penetrantaj okuloj, kiuj rigardis ĉirkaŭen al ĉiuj ĉeestantoj. Ĉe la vido de li la taŭista pastro paliĝis, kaj, farinte sian sekvan ŝakmovon, li diris: “Mi jam perdis tiun ĉi ŝakludon, kaj restas al mi nenia espero ĝin savi. Kion plian do mi povas diri?”

Li finis la ludon kaj tuj foriris. Elirinte el la domo, li diris al la viro kun bukklaj vangoharoj: “Sin trovas neniun loko por vi en tiu ĉi lando. Estus preferinde por vi provi vian ŝancon aliloke. Faru vian plejebulon kaj ne perdu vian esperon.” Tion dirinte, ili decidis iri al la ĉefurbo.

La viro kun bukklaj vangoharoj diris al Li Jing: “En la dua tago post via atingo tien, venu kun via edzino al mia modesta domo. Mi scias, ke vi du vivas en absoluta senhaveco. Mi volas konigi mian edzinon al vi du por babilado kaj diskuto pri via estonteco. Estu certa kaj ne vanigu mian atendon.” Fininte la diron, li foriris kun suspiro.

Li Jing rajdis al sia loĝejo. Poste li ekiris kun sia edzino al la ĉefurbo, por viziti la viron kun bukklaj vangoharoj. La domo de tiu havis malgrandan pordon el maldikaj lignaj tabuloj. Kiam ili frapis sur la pordo, iu venis malfermi la pordon, riverencis

ilin kaj diris: “La mastro atendas vian alvenon jam longatempem.”

Ili estis kondukataj tra internaj pordoj, el kiuj ĉiu estis pli grandioza, ol la antaŭa. Kvardek junaj servistinoj staris en du vicoj en la antaŭa korto, kaj dudek viraj servistoj gvidis ilin sur la vojo al la orienta salonego, kie ili trovis elmontron de raraj kaj grandvaloraj objektoj. Sin trovis tiom multe da fajnaj kestoj, tualet-tabloj, kap-ornamaĵoj, speguloj kaj juveloj, kiuj ĉiuj estis en tia perfekteco, ke ili sentis, kvazaŭ ili enirus en mirlandon. Post kiam ili sin banis, ili ŝanĝis siajn vestojn en lukse silkajn, kaj tiam oni anoncis pri la veno de ilia gastiganto. Li venis, portante gazan ĉapon kaj peltan jakon kun suprenfalditaj manikoj, kaj lia tuta aspekto radiis senegalan heroecon. Post kiam ili reciproke sin salutis kun ĝojo, li urĝis sian edzinon elveni, kaj ili trovis, ke ŝi estas feine belega. Ili estis invititaj en la centran halon, kie estis pretigita la bankedo, kiu estis pli riĉa, ol la bankedoj donitaj de princoj, kaj dum ili bankedis, dudek muzikistinoj ludis muzikon, kiu sonis tiel bele, kvazaŭ ĝi estus ludata en paradizo. Manĝinte ĝis plena satiĝo, ili estis plenplezure regalataj per fajna vino. Poste servistoj portis el la orienta halo dudek kestegojn kovritajn per broditaj silkaj tukoj. Post kiam la tukoj estis forigitaj kaj la kestegoj malfermitaj, Li Jing vidis, ke ĉiu el ili estas plenplena de kontolibroj kaj ŝlosiloj.

“Tio ĉi estas la tutaj trezoroj, kiujn mi posedas,” diris al Li Jing la viro kun bukklaj vangoharoj. “Mi donace transdonis ilin ĉiujn al vi. Kial do? Mi havis la ambicion entrepreni ion brilegan en la mondo kaj volis bataladi kun bravuloj dum dudek aŭ tridek



jaroj, por konkeri la imperion. Sed nun kiam la estonta vera suvereno jam estis trovita, kial do mi devus plu resti ĉi tie? Via amiko Li Shimin en la urbo Taiyuan estos vera granda reganto, kiu restarigos pacon al la imperio post tri aŭ kvin jaroj. Kun via elstara talento, se vi faros vian plejblon sub lia brila gvido, vi certe atingos la plej altan ministrecon. Kaj via edzino kun siaj granda beleco kaj rara distingiteco certe gajnos famon kaj honoron dank’ al sia glora edzo. Nur tia virino, kia ŝi estas, povus rekoni vian talenton, kaj nur tia viro, kia vi estas, povus porti al ŝi gloron kaj feliĉon. Estonta kapabla ministro estas certe destinita por trovi saĝan monarkon en la unuaj jaroj de ties fondo de nova dinastio, kaj ilia renkontiĝo okazas tiele, kvazaŭ

ili antaŭe jam interkonsentus. Estas ja ne hazardo, ke kiam la tigro blekas, ventego leviĝas, kaj kiam la drako kantas, la nuboj kolektiĝas. Vi povos uzi miajn donacojn por helpi la veran monarkon kaj peni atingi sukcesojn en via kariero por akiri al vi meritojn. Penu kaj strebu! Ekde nun, post dek jaroj, sudoriente de Ĉinio je miloj da lioj for de ĉi tie, se okazos neordinara evento tie, certe tiam mi jam plenumos mian ambicion. Kiam tiu tempo venos, ĉu vi ambaŭ povos drinki kaj ankaŭ verŝi vinon al la sudoriento, por min gratuli?”

Li do ordonis al siaj geservistoj, ke ili esprimu ĉiu sian respekton al Li Jing kaj lia edzino, kaj diris: “Ekde nun ili estas viaj gemastroj.”

Tion dirinte, la viro kun bukklaj vangoharoj kaj lia edzino surmetis militistan uniformon kaj tuj foriris surĉevalo, akompanate de nur unu servisto. Baldaŭ ili jam malaperis el la vido.

Transpreninte la domon kaj la posedaĵon de la viro kun bukklaj vangoharoj, Li Jing fariĝis riĉega kaj, uzante la riĉaĵojn, helpis al Li Shimin konkeri la tutan imperion.

En la deka jaro de la regperiodo de Zhenguan (*gēngūan*) (627–649), Li Jing estis titolita Maldekstra Ministro kaj funkciis kiel ĉefministro. Tiam la sudlandaj tribanoj raportis, ke mil grandaj ŝipoj kaj armitaj trupoj el cent mil soldatoj jam eniris en la reĝlandon Fuyu (*fūyú*), mortigis la reĝon kaj okupis tiun landon, kaj ke nun ĉio estas ree en paco tie. Li Jing ekkomprenis, ke la viro kun bukklaj vangoharoj jam sukcesis en la plenumo de sia ambicio. Reveninte el la kortego li diris al sia edzino, kaj ili ambaŭ metis sur si ceremoniajn vestojn kaj solene verŝis vinon al la sudoriento por gratuli sian malnovan amikon kun dankemo.

El tio ĉi ni povas vidi, ke la imperiestra potenco ne estas akirita de iu ajn bravulo, kiu ĝin aspiras, por ne paroli pri iu ajn ordinarulo. Ĉiu regato, kiu vane provas ribeli, estas kiel la febla manto, kiu penas haltigi ĉaron per siaj antaŭaj kruroj, ĉar la Ĉielo volas, ke la imperio de nia dinastio prosperu dum miriadoj da generacioj.

Estas onidiro, ke multo el la militaj strategio kaj taktikoj de Li Jing estis instruita al li de la viro kun bukklaj vangoharoj.



tradukinto Wang Chongfang (Ĉinio)

Shen Jiji(ĉ.750-800)

Vulpa feino Ren

Ren (*jen*) estis eksterordinara virino.

Prefekto s-ro Wei (*vej*) havis propran nomon Yin (*jin*), kiu viciĝis la naŭa inter gefratoj en sia familio. Laŭ patrinflanka geneologio li estis nepo de Li hui (*li-huj*), princo de Xin'an (*ŝi-an*). Junaĝe li estis senbride diboĉa kaj drinkema.

Zheng (*ĝeng*), la edzo de lia kuzino, viciĝis la sesa inter siaj gefratoj, kies nomon oni forgesis. Zheng lernis luktarton junaĝe kaj ankaŭ ŝatis drinkadon kaj voluptuon. Sed li estis malriĉa, kaj vivtenata de edzina parenco. Zheng kaj Wei fariĝis intimaj amikoj nedisigeblaj ĉu en ekskurso ĉu en la ĉiutaga vivo.

Somere en la sesa monato de la 9-a jaro (750 p.K.) de Tianbao(*tjanbaŭ*)-erao, Wei Yin, en akompano de Zheng, promenis en la ĉefurbo Chang'an (*ĉang-an*) kaj volis iri al la kvartalo Xinchang (*ŝinĉang*) por drinki. Kiam ili venis suden de la kvartalo Xuanping (*sŭanping*), Zheng petis portempan forpermeson, pretekstante privatan aferon, kaj ili interkonsentis renkontiĝi poste en la drinkejo. Wei Yin rapidis sur blanka ĉevalo orienten. Zheng rajdis sur azeno suden al la norda pordo de la kvartalo Shengping(*ŝengping*).

Zheng ekvidis survoje tri knabinojn piedirantajn, inter kiuj estis ĉarm knabino en blankaj vestoj. Zheng miris pri ŝia beleco, vipis sian azenon jen antaŭen jen malantaŭen. Li volis diri flirtemajn vortojn, sed ankoraŭ ne kuraĝis. La blanke vestita knabino okulumis al Zheng de tempo al tempo, kvazaŭ volante akcepti lian amon. Zheng ekparolis al ŝi ŝerce:

"Kial vi, tiel bela knabino, iras piede?"

"Kion fari se ne piediri?" ridetis la knabino, "ĉar vi havante azenon ne servigas ĝin al mi."

"Ho, mia rajdobesto estas tro malbona, tute sentaŭga por servi al belulino." diris Zheng. "Nun mi donas ĝin al vi kaj volonte mem piediros sekvante vin kun granda kontento!"

Li kaj ŝi rigardis unu la alian kaj ambaŭ ridegis. Ankaŭ la du aliaj knabinoj ĵetis al li tentajn okulumojn. Baldaŭ ili fariĝis tre familiaraj. Zheng sekvis la knabinojn



orienten. Kiam ili atingis la ĝardenon Leyou (*lejoŭ*), jam vesperiĝis. Tie staris domo, kun tera muro kaj granda pordo por trapaso de ĉaroj, la konstruaĵoj viciĝis bonorde kaj impone.

Antaŭ ol eniri la domon, la blanke vestita knabino sin turnis dirante al Zheng: "Atendu ĉi tie momenton!" kaj mem eniris. Unu el ŝiaj servistinoj restis gardanta ĉe la pordo kaj demandis pri lia nomo kaj vico inter gefratoj. Zheng respondis kaj ankaŭ demandis al ŝi same pri la blankevestita knabino.

La servistino respondis: "Ŝi nomiĝas Ren Shi (Ren Ina) kaj estas la dudeka infano de ŝia familio."

Post momento, oni invitis lin en la domon. Zheng ligis sian azenon ĉe la pordo kaj metis sian ĉapon sur la ŝelon. Eliris por bonvenigo pli-ol-30-jara virino, pliaĝa fratino de Ren Shi (*jen-ŝi*).

Oni bruligis kandelojn kaj surtabligis pladojn. La mastrino proponis al li foje refoje drinkojn. Post nelonge Ren Shi eliris alvestite. La knabino kaj Zheng drinkis gaje ĝis profunda nokto. Ambaŭ kundormis en sama lito. Zheng trovis ke ŝiaj beleco, kantado, rideto kaj konduto estas nekompareblaj en la homa mondo.

Antaŭ la tagiĝo Ren diris: "Vi devas foriri. Miaj gefratoj estas membroj de la reĝa konservatorio sub la reĝa gvardio. ni eliros ĉe la tagiĝo. Vi ne devas resti ĉi tie pli longe." Post interkonsento pri rendezuo Zheng foriris. Kiam Zheng venis al la strata fino, la kvartala pordo ankoraŭ estis fermita. Apud la pordo troviĝis vendejo de bakitaj farunaĵoj de fremdulo, kun lanterno lumanta kaj forno brulanta. Zheng sidiĝis ĉe kurteno por atendi malfermiĝon de la pordo je matena tamburado kaj komencis babili kun la mastro.

Montrante sian tranoktejon, Zheng demandis: "Se vi iras orienten de ĉi tie, vi venos al granda pordo — kies domo ĝi estas?"

"Tie estas nur ruino, nenia loĝdomo." respondis la mastro.

"Sed mi ĵus preterpasis ĝin," insistis Zheng. "Kial vi diras ke nenia loĝdomo troviĝas tie?"

La mastro ekkomprenis. "Ha! Mi scias!" li eksplikis. "Tie vivas vulpa feino. Ŝi ofte logis virojn tranokti. Tion mi vidis trifoje. Ĉu ankaŭ vi renkontis ŝin?"

Hontante konfesi la veron, Zheng ruĝiĝis kaj mensoge respondis: "Ne." Je la tagiĝo li refoje iris al la tranoktejo kaj vidis ke la tera muro kaj la pompa pordo restas kiel antaŭe, sed rigardante internen, Zheng vidis nur forlasitan ĝardenon kun veproj. Reveninte, Zheng renkontiĝis kun Wei, kiu riproĉis lin, ke li ne iris al la rendezuo. Zheng tenis la sekreton, preteksante ion alian. Tamen, rememorante pri ŝia ĉarmo, Zheng arde deziris ŝin revidi kaj tenis tion ĉiam en sia koro.

Post dekelkaj tagoj, Zheng promenis al la Okcidenta Foiro kaj iris en vestovendejon. Li subite vidis Ren Shi, akompanatan de la antaŭaj servistinoj. Li tuj

vokis ŝin. Ŝi haste sin kaŝis en homamaso por lin eviti. Sed Zheng vokis plu kaj postkuris ŝin. Ŝi turnis la dorson al li kaj, ŝirmante sian vizaĝon per ventumilo, diris: "Vi jam konas kiu mi estas, kial ankoraŭ sekvas min?"

"Kio gravas eĉ se mi scias?" demandis Zheng.

"Sed mi hontas montri mian vizaĝon antaŭ vi." ŝi respondis.

"Mi amas vin tiel forte, ĉu vi toleras forlasi min?" Zheng protestis.

"Mi ne kuraĝas forlasi vin, sed nur timas ke vi abomenos min."

Zheng ĵuris al ŝi per sincera tono. Ŝi returnis sin kaj mallevis la ventumilon. Antaŭ li staris rava belulino kiel antaŭe.



"Estas multaj vulpaj feinoj kiel mi," ŝi diris, "vi ja ne konas ilin. Tial ne miru pri tio."

Zheng petis ŝin kune ripeti la malnovan ĝuon. Ŝi diris: "Vulpaj feinoj havas malbonan famon, ĉar ili ofte damaĝas virojn, sed mi ne tiel kondutas. Se vi ne abomenas min, mi volonte servos vin

dum mia tuta vivo."

Kiam Zheng konsentis serĉi loĝejon, ŝi sugestis: "Oriente vi trovos domon kun granda arbo. Ĝi sidas en kvietaj loko de la urbo. Prefere lui ĝin por nia loĝo! En tiu tago, kiam mi renkontis vin, alia s-ro rajdis sur blanka ĉevalo oriente al la suda parto de la kvartalo Xuanping. Ĉu li ne estas kuzo de via edzino? En lia hejmo estas diversaj mebloj, kiujn vi povas pruntpreni."

Okazis tiel: onkloj de Wei Yin oficis en diversaj lokoj. Iliaj mebloj estis konservitaj en tri kortoj ĉe li. Laŭ konsilo de Ren, Zheng vizitis al la domo de Wei Yin por pruntpreni meblojn.

Demandite pri la uzo, Zheng diris: "Mi ĵus akiris belan fraŭlinon, jam luprenis loĝdomon kaj volas pruntpreni meblojn por ĉiutaga uzo."

"Belulino, ĉu vere?" Wei ridetis. "Laŭ via aspekto, vi akiras certe monstran virinon!"

Wei pruntdonis al li kurtenojn, liton, litaĵojn, maton kaj aliajn objektojn kaj samtempe sendis saĝan kaj ruzan serviston por subrigardi. Post nelonge la servisto kuris returnen, ŝvitante kaj anhelante.

"Ĉu vi vidis?" renkonte al li Wei demandis. "Kia ŝi aspektis?"

"Mirinde!" respondis la servisto. "Mi neniam vidis tiel belan fraŭlinon!"

Ĉar Wei havis multajn boparencojn, ŝatis ekskurson kaj aktivadon en grupo, li konis multajn belulinojn.

Wei citis nomon de unu el tiuj belulinoj kaj demandis al la servisto: "Ĉu ŝi estas tiel bela?"

"Nekompareble!" diris la servisto.

Wei do citis ankoraŭ aliajn kvar aŭ kvin nomojn por kompari ilin kun la belulino de Zheng, sed ĉiam ricevis negativan respondon.



Siatempo la bofratino de Wei, la sesa filino de la princo de Wu (wu), estis senkompare ĉarma kiel feino, kies beleco superis ĉiujn siajn gekuzojn. Wei do demandis: "Ĉu estas komparebla kun ŝi la sesa filino de la princo de Wu?"

Sed la servisto ankoraŭ respondis: "Nekompareble!"

Ege surprizite Wei

manklakis dirante: "Ho, ĉu ekzistas tia belulino en la mondo?"

Wei ordonis pretigi akvon, lavis la vizaĝon kaj kolon, portis kaptukon, ŝmiris la lipojn kaj iris al la domo de Zheng.

Kiam Wei venis la lokon, okaze Zheng foriris. Wei eniris la domon kaj vidis servoknabon balaanta, servistino ĉe la pordo kaj nenium alian.

Wei demandis al la servoknabo pri la belulino, sed tiu nur neis ridetante.

Wei ĉirkaŭrigardis la domon kaj vidis parton de ruĝaj vestoj sub la pordoklapo. Li aliris kaj esploris. Li trovis knabinon kaŝita post la pordoklapo, do elkondukis ŝin al hela loko kaj vidis ŝin multe pli bela ol li aŭdis. Wei ekamis ŝin pasie, prenis ŝin en siajn brakojn kaj intencis perforti.

Sed ŝi rezistis. Wei forte premis ŝin. En kriza momento, ŝi petis: "Mi obeos vin, sed lasu min retrovi mian spiron."

Kiam Wei ne uzis la forton, ŝi rezistis denove. Tio ripetiĝis plurajn fojojn. Wei kaptis ŝin per tuta forto kaj alpremis ŝin al si krude. Ŝi senfortiĝis, ŝvitis pluve. Pensante ke ŝi ne povos eskapi la perforton, ŝi forlasis la reziston, sed draste paliĝis.

"Kial vi tiel malĝojas?" Wei demandis.

Kun longa veo ŝi respondis: "Ho ve, vere kompatinda estas Zheng la sesa!"

"Kion signifas via diro?" Wei demandis.

"Kun forta korpo de pli ol ses futoj Zheng tamen ne povas protekti sian virinon — ĉu li ankoraŭ rajtas nomi sin viro? Vi estas juna kaj riĉa, posedas plurajn

belulinojn kaj vidis multajn knabinojn kiel mi. Sed Zheng, malriĉa kaj humila, havas nur min kiel solan amatinon. Kun abundo ĉu vi volas prirabi aliulon en mizero? Zheng estas malriĉa, ne povas vivi memstare. Li akiris vestojn kaj manĝaĵojn de vi, sekve ĉiam estas sub vi. Se li povus vivteni sin ne tiel mizere, li ne falus en la nunan staton." Wei estis kavalireca kaj justama. Aŭdinte la vortojn, li tuj lasis ŝin. Li reordigis sian baskon kaj respektoplene petis ŝian pardonon: "Mi ne kuraĝos."

Post nelonge, Zheng revenis. La du viroj babilis gaje. De tiam Wei liveris al Ren ĉiujn vivbezonaĵojn.

Ren ofte vizitis al Wei, kaj eliris kun li jen per kaleŝo, jen per ĉevalo, jen per palankeno aŭ simple piedire. Wei pasigis preskaŭ ĉiun tagon kun ŝi, sentante grandan ĝojon. Ili fariĝis tre intimaj geamikoj kaj ŝi donis al li ĉion escepte de amoro. Pro tio Wei pli amis kaj respektis ŝin, avaris al ŝi nenion kaj ne forgesis ŝin ĉu en drinkado ĉu en manĝado.

Konante lian amon, foje Ren diris al Wei: "Mi hontas akcepti vian tro multan favoron, sed mi, sentaŭga, neniel povas rekompenci vian grandan komplezon, kaj, mi ankaŭ ne devas perfidi Zheng, tial mi ne povas kontentigi ĉiujn viajn dezirojn. Mi naskiĝis en Shaanxi (*ŝanŝi*) kaj kreskis en la ĉefurbo. Miaj familianoj estas aktoroj. Multaj el miaj kuzinoj estas kromedzinoj de altranguloj kaj riĉuloj. Pro tio mi bone konas la bordelojn kaj similajn domojn en la ĉefurbo Chang'an. Se vi ŝatas, sed ne sukcesis akiri belulinon, mi povas helpi vin kaj per tio iom rekompencos vian favoron."

"Bonege!" kun ĝojo Wei akceptis ŝian proponon.

Vestovendistino nomata Zhang la Dekkvina en la foiro havis kreme glatan haŭton kaj tre plaĉis al Wei. Li demandis al Ren, ĉu ŝi konas la vendistinon.

"Ŝi estas mia kuzino." respondis Ren. "Mi povos facile kontentigi vin."

Post ĉirkaŭ dek tagoj ŝi kondukis la knabinon al Wei.

Post kelkaj monatoj, Wei enuis. Ren diris: "Knabinoj en foiro estas facile akireblaj. Mi ne povas elvolvi mian kapablon de servo. Prove menciu aliajn ĉarmajn knabinojn malfacile akireblajn, mi volonte faros por vi plej grandan klopodon."

"En la Tago de Malvarma Manĝado antaŭ tagoj," diris Wei. "mi ekskursis kun kelkaj amikoj al la Templo de Mil Feliĉoj kaj vidis orkestron aranĝitan de generalo Diao Mian (*djaŭ-mjan*) en la halo. Tie troviĝis lerta ludanto de ŝeng-o (blovinstrumento), knabino en la aĝo de ĉ. 16 jaroj kun du bukloj ĉe la oreloj. Ŝi havas ravan aspekton — tre amindan! Ĉu vi konas ŝin?"

"Ŝi estas favoratino de la generalo." Ren respondis. "Ŝia patrino estas mia kuzino. Mi provu."

Wei danke riverencis al ŝi. Ŝi promesis doni helpon.

Ren do frekventis al la domo de la generalo Diao (*djaŭ*). Pasis pli ol unu monato. Wei urĝe demandis ŝin pri la afero. Ŝi postulis de li du rulojn da silkaĵoj por subaĉeto. Wei donis tiom. Post du tagoj, dum Ren kaj Wei estis en kunmanĝado, la generalo sendis sian intendanton kun nigra ĉevalo inviti Ren al lia domo. Informiĝinte pri la alvoko, Ren diris al Wei ridetante: "Sukcesis mia plano!"

Okazis tiel: Ren unue malsanigis la knabinon, al kiu neniam kuracilo helpis. En granda ĉagreno la patrino de la knabino kaj la generalo intencis peti konsilon de sorĉistino. Sed Ren anticipe subaĉetis la sorĉistininon kaj postulis ke ŝi tiu sugestu ke la loĝloko de Ren estas taŭga por forigi la malfeliĉon.

Kiam la sorĉistino estis alvokita por kuraci la malsanan knabinon, ŝi diris laŭ plano de Ren al la generalo: "La knabino ne devas plu resti en sia hejmo, sed transloĝiĝi al domo sudoriente por ricevi vivigan medion."

La generalo kaj la patrino de la knabino esploris la sugestitan lokon kaj trovis, ke tie estis la loĝejo de Ren. La generalo do petis ŝian konsenton akcepti la knabinon en la hejmo. Ren afekte rifuzis, preteksante malvastecon de sia loĝejo. La generalo insiste petegis, nur tiam Ren konsentis. La generalo do veturigis la knabinon per kaleŝo al la domo de Ren, akompanatan de ŝia patrino kun vivbezonaĵoj. Atinginte la loĝejon de Ren, la knabino tuj resaniĝis. Post kelkaj tagoj, Ren sekrete kondukis Wei reveni al ŝi. Post unu monato, la knabino gravediĝis. Tiam ŝia patrino ektimis kaj rapide revinigis la knabinon al la generalo Diao. Tiel finiĝis la afero.

Iun tagon, Ren demandis al Zheng: "Ĉu vi povos pruntepreni kvin aŭ ses mil monerojn? Mi profitigos vin."

"Jes." Zheng respondis kaj eliris pruntepreni ses mil monerojn.

Ren diris al li: "Iru al la foiro. Se vi vidos ke oni vendas ĉevalon kun cikatro sur la postaĵo, aĉetu ĝin!"

Laŭ ŝia instruo Zheng iris al la foiro kaj vere vidis iun kondukanta ĉevalon por vendi. Sur ĝia maldekstra postvango vidiĝis cikatro. Zheng aĉetis la ĉevalon kaj kondukis ĝin hejmen. Liaj bofratoj ĉiuj mokis lin: "Ĝi estas forĵetita bruto. Por kio vi aĉetis ĝin?"

Poste, Ren diris al Zheng: "Estas tempo por vendi la ĉevalon. Pri ĝia prezo vi postulu 30 mil monerojn!"

Zheng do kondukis la ĉevalon al la foiro por vendi. Iu proponis 20 mil monerojn. Zheng ne konsentis vendi.

Ĉiuj homoj en la foiro miris: "Kial unu volontas pagi tiel altan prezon sed la alia ankoraŭ rifuzas?"

Zheng rajdis sur la ĉevalo hejmen reveni. Ankaŭ la kliento sekvis lin ĝis lia pordo kaj iom post iom levis la prezon al 25 mil moneroj. Zheng ne konsentis, dirante: "Mi insistas je la prezo de 30 mil moneroj."

Liaj bofratoj kolektiĝis kaj insultis lin. Vole-nevole Zheng devigite vendis la ĉevalon kontraŭ apenaŭ 30 mil moneroj. Poste, Zheng kaŝe sekvis la aĉetanton por informiĝi, kial li aĉetis tiel altpreze. Zheng trovis, ke la viro estis ĉevalisto de Zhaoying (*ĝaŭ-jing*)-gubernio, kie unu imperiestra ĉevalo sub lia bredo kun nigra makulo sur la postaĵo mortis jam tri jarojn. Li devis baldaŭ ekŝiĝi antaŭ plenumo de sia mandato kaj pagi 60 mil monerojn por la mortinta ĉevalo. Se li aĉetis la ĉevalon kontraŭ 30 mil moneroj, li jam povis ŝpari multe. Krome, se li havas la ĉevalon kiel anstataŭanton de la mortinta, li gajnos la pagon pro la trijara furaĝo, tiel li kompensas nur tre malmulte, tial li insistis en la aĉeto.

Foje Ren petis de Wei vestojn pro eluziĝo de siaj malnovaj vestoj. Wei intencis aĉeti por ŝi rulon da silkaĵo, sed Ren rifuzis, dirante: "Mi volas konfekciajn vestojn." Wei alvokis komerciston Zhang Da, donis al li la taskon kaj ordonis, ke li intervidiĝu kun Ren kaj demandu ŝin, kiajn vestojn ŝi ŝatas.

Vidinte Ren, Zhang Da miregis kaj poste diris al Wei: "Ŝi estas feine bela, tre eble el nobela familio, sed nun ŝtelakirita de via moŝto. En la homa mondo ne devas esti tia belulino. Tuj revenigu ŝin, ke ŝi ne okazigu plagon al vi!" Ŝia beleco eĉ atingis tian gradon.

Tamen, oni ne povas kompreni, kial ŝi insiste petis konfekciajn vestojn, sed ne volas mem kudri ilin. Unu jaron poste, Zheng estis nomumita kapitano de Huaili (*hŭajli*)-prefektujo en Jincheng (*ĝinĉeng*). Tiam Zheng havis edzinon. Tage li ekskursis kun sia amatino, sed nokte li devis reveni hejmen, tial li ofte bedaŭris, ke li ne povis ĉiam kun Ren tranokti. Antaŭ ol iri al la ofico, Zheng petis Ren akompani, sed ŝi rifuzis.

"Kunvojaĝo dum tagdeko aŭ monato ne taŭgas por nia sufiĉa ĝuo." Ren diris. "Estas pli bone, ke vi donu al mi vivbezonaĵojn laŭ tagoj de via foriro, kaj lasu min trankvile atendi hejme ĝis via reveno."

Zheng refoje petegis, sed Ren estis pli firmvola. Tiam Zheng devis peti monhelpon de Wei. Ankaŭ Wei alvenis persvadi ŝin kaj demandis ŝin pri la kaŭzo. Post longa hezito Ren respondis: "Sorĉisto avertis al mi, ke ĉijare mi renkontos malfeliĉon en vojaĝo al la okcidento, tial mi ne volas iri tien."

Sed Zheng estis en arda deziro pri ŝia kunvojaĝo kaj tute ne pensis pri io alia. Ambaŭ viroj ridegis, dirante: "Tiel saĝa knabino eĉ kredas la superstiĉan vorton de sorĉisto, strange!" Ili insiste petis ŝin kune vojaĝi. "Se la sorĉista diro fariĝos vera," diris Ren, "kaj mi mortos pro la kunvojaĝo, ĉu vi bedaŭros?" "Sensencaĵo!" la du viroj ankoraŭ persistis en sia peto, fine Ren vole-nevole konsentis.

Wei pruntedonis al ŝi ĉevalon, aranĝis al ili adiaŭan festenon ĉe Lingao (*lingaŭ*), kaj disiĝis mansvinge salutante. Post du tagoj ili atingis Mawei (*mavej*). Ren rajdis surĉevalo antaŭe, Zheng rajdis surazene malantaŭe kaj ili sekvis rajdantaj servistinoj.

Tiam ĉevalbredistoj ekster la Okcidenta Pordego trejnigis ĉashundojn en Luochuan (*lǔochuān*) jam dek tagoj.

Kiam Ren preterpasis la lokon, hundoj elsaltis el veprejo. Zheng vidis ŝin ekfali surteren. Ŝi aperis tuj en sia propra formo de vulpo kaj rapidegis suden. Ŝin persekutis la hundoj. Zheng plenforte postkuris, kriante al la hundoj sed ne sukcesis haltigi ilin. Kurinte ĉ. unu lion, ŝi estis mortigita de la hundoj.

Kun larmoj en la okuloj Zheng elpoŝigis monon, aĉetis ŝian kadavron, enterigis ŝin kaj starigis lignan stangon ĉe ŝia tombo por signi la lokon.

Retrorigardante, Zheng vidis ŝian ĉevalon maĉanta herbojn apud la vojo. Ŝiaj vestoj kuŝis sur la selo. Ŝiaj ŝuoj kaj ŝtrumpoj ankoraŭ pendis en la piedingoj, kvazaŭ ili estus ŝelo de cikado. Nur la ornamaj juveloj disfalis teren, malaperis ŝiaj aliaj posedaĵoj. Malaperis ankaŭ ŝiaj servistinoj.

Post dekkelkaj tagoj, Zheng revenis al la ĉefurbo. Vidinte lin, Wei ĝoje demandis: "Ĉu Ren fartas bone?"

Kun larmoj Zheng respondis: "Ŝi mortis."

Aŭdinte tion, ankaŭ Wei falis en grandan malĝojon. Ili ploregis, brakumante unu la alian en ĉambro. Poste Wei demandis, kia subita malsano forrabis ŝian vivon.

"Ŝi estis mortigita de hundoj!" respondis Zheng.

"Kvankam hundoj estas ferocaj, tamen kiel ili povus mortigi homon?"

"Ŝi ne estis homo," respondis Zheng.

Ege surprizite, Wei demandis: "Se ne, kio do ŝi estis?"

Zheng rakontis al li la tutan historion. Wei tre miris kaj senĉese suspiris.

En la sekvanta tago, ili kune veturis per kaleŝo al Mawei, malfermis la tombon, rigardis la kadavron kaj revenis post longa funebro. Ili rememoris pri la pasintaĵoj kaj rimarkis ke ĉiuj ŝiaj kondutoj estis samaj kiel tiuj de homo; escepte nur de tio, ke ŝi ne faris vestojn per si mem.

Poste Zheng fariĝis inspektoro de ŝtataj salbasenoj, imperiestraj palacoj kaj paŝtado de brutoj. Li vivis tre riĉe, kun dekkelkaj ĉevaloj en stalo de sia hejmo. Li mortis en la aĝo de 65 jaroj.

En Dali-erao (766-779p.K.), mi loĝis en Zhongling kaj ofte ekskursis kun Wei Yin. Ni plurfoje interparolis pri la afero, tial mi bone konis tion.

Poste Wei fariĝis ĉefurba inspektoro de la kortego kaj samtempe prefekto de Longzhou (*lóngzhōu*). Fine li mortis sur sia posteno en la nordokcidento senrevne. Ho! Ankaŭ en la konduto de la besto sentiĝis homa naturo! Rigardu al tiu de la vulpa feino Ren, kiel ŝi batalis kontraŭ perforto por gardi sian ĉastecon kaj eĉ oferis sian vivon por la amato. Eĉ inter la nunaj virinoj troviĝas tiuj kiuj kondute malpli indas ol ŝi! Bedaŭrinde Zheng ne estis inteligenta homo. Li ŝatis nur ŝian belecon, sed ne esploris ŝian naturon. Se li estus pli prudenta, li certe konus la leĝon de ŝanĝiĝo,

sondus la forton de la supernatura estaĵo kaj per lerta plumo prezentus la esencon de la mistero, anstataŭ nur amuziĝi kun ŝi je amorĝuo! Tio estas ja vere granda bedaŭro! En la dua jaro (781 p.K.) de Jianzhong (ĝjanĝong)-erao, oni ekzilis al sudorientaj provincoj min, kiu oficis kiel Maldekstra Admonisto, Gvardian Generalon Pei Ji (*pej ĝi*), Ĉefurban Vicestron Sun Cheng (*sun ĉeng*), buroestron de la Ministerio de Financaj kaj Civilaj Aferoj Cui Xu kaj Dekstran Admoniston Lu Chun. De Shaanxi al Suzhou (*su ĝou*) ni veturis kune per ter- kaj akv-vojoj. Al nia grupo aliĝis ankaŭ la eksa admonisto Zhu Fang (*ĝu fang*), kiu vojaĝis por turismo. Ni veturis per du ŝipoj laŭ la riveroj Yingshui (*jing ŝuj*) kaj Huaishui (*hŭaj ŝuj*), tage bankedis kaj nokte babilis pri diversaj strangaĵoj. Tiuj sinjoroj estis profunde kortuŝitaj kaj forte mirigitaj de mia rakonto pri Ren. Ili petis min registri la strangaĵon. Tial mi, Shen Jiji (*ŝen ĝiĝi*), verkis la rakonton.



elĉinigs **Guozhu** (Ĉinio)

Mikronovelo

Anonima

En vagono de metroo

En vagono de metroo knabo manĝetas. Lia patrino rakontas al li: “Filĉjo, tri ŝafoj troviĝas en vagono de metroo. Dumvoje eniras lupo. Do kiom da ŝafoj restas?” La knabo memfideme respondas: “Neniu ŝafo restas, ĉar ili estas formanĝitaj de la lupo. Tion mi jam scias.” Sed la patrino replikas: “Vi malpravas. Restas ankoraŭ tri ŝafoj, ĉar estas malpermesite manĝi ion ajn en la vagono de metroo.”

elĉinigs **Long Long**

Bing Xin (1900-1999)



aŭtorino Bing Xin

Prezofalo

Kiam nia maljuna vartistino estis revenanta al la naskiĝloko por edzigi sian filon, ŝi diris al mi: “Instruisto Song, mi eble ne revenos post tiu ĉi foriro. Mi ĉiam sentis min tre malstreĉe kaj komforte, laborante en via hejmo. Mia nevino hieraŭ alvenis de

la vilaĝo. Ŝi ĵus finis la lernadon en malsupera mezlernejo. Mortis ŝia patrino, kaj ŝia patro prenis al si duan edzinon, kiu traktis ŝin ofende, kaj de tempo al tempo vokis ŝin al kampa laborado. Aŭdinte tion, mi ŝin vere kompatis, kaj sekve mi petis al mia samvilaĝano alvenigi ŝin por anstataŭi min ĉe la okupo. Ŝi ĉion scipovas, kulturita kaj pli multe kapabla ol mi.” Parolante, ŝi tiris el malantaŭ si pli-malpli-20-jaran knabinon, kun vizaĝo flava kaj magra, en ĉifonaĵoj, kaj diris ke ŝi nomiĝas Fang Yufeng. Antaŭenpuŝante tiun ŝi aldonis: “Vidu, jen ŝi estas instruisto Song, do via mastro!” Timide Fang faris al mi profundan riverencon.

Tiam mi ankoraŭ ne emeritiĝis, kaj mia filino Zhen antaŭ nelonge diplomiĝis el universitato kaj nun ankaŭ instruis mezlerneje. Ne mankis diversspecaj aferoj interne kaj ekstere, kiujn Fang mastrumos helpe. Mi tre ĝojis.

Fang estis gracila, sed facilmovata. Malpli ol unu monaton ni ĉiuj jam ŝatis ŝin. Delonge sen varmeco de familio, en nia nesto malgranda kaj simpla ŝi verŝajne rericervis la guston de harmonia “familio”. Zhen foj-foje donacis siajn uzitajn vestojn al Fang por ŝanĝo. Ili ambaŭ estis tiel intimaj kiel fratin-paro. Krome, ĉiuvespere Zhen instruis ŝin pri la angla lingvo, matematiko kaj aliaj, instigante ŝin fari eniran ekzamenon al mezgrada specialigita lernejo.

Pasis du jaroj. Lutage, Fang sinĝene diris al mi, ke ŝia samlokano rekomendis al ŝi esti komizo en magazeno, ĉiumonate lukronta 190 juanojn plus rekompenco. Preskaŭ larmante, ŝi parolis al mi: “Mi vere ne volas foriri de vi, sed se mi deziras frekventi lernejon, mi devas akiri pli da mono por lernokotizo...” Ĉar tiam mi jam emeritiĝis kaj tial tute povis fari mastrumadon. Mi kaj Zhen tuj rimarkis: “Tion ni komprenas kaj ĝojas por vi. Do vi iru kaj, se vi estos libera, ofte nin vizitu.”

Kiel revenante sian hejmon, ĉiudimanĉe Fang faris viziton al ni. Restinte du jarojn en nia hejmo, ŝi jam estis graseta kaj brile bela. Kiam ŝi sin vestis per gajkolora robo, ŝi aspektis pli ĉarme. Ni ŝercis, ke ni apenaŭ rekonas ŝin.

Ĉiufoje ŝi kunportis donacon, precipe kelkiom da freŝa sud-gusta toŭfujo. Ŝi diris: “En libro mi legis, ke por maljunulo ĝenerale facilas havi ostan lozecon, do estas pli bone, ke viprenu nutraĵon, en kiu enestas ‘kalcio’. Ekzemple, lakto, ovoĵoj, kaj precipe sojfabaj produktoj. Kiam vi iras al legombazaro, estas malfacile tie aĉeti delikatan toŭfuon.” Kiam ni adiaŭis ŝin dankeme, ŝi okulsignis al Zhen, ride dirante: “Mia salajro pli altas ol vi ambaŭ, tiuj objektoj estas bagatelaj.” Ni do lasu ŝin.

Unu tagon ŝi portis kun si malgrandan kvadratan radioricevilon kaj metis sur mian librotablon, dirante: “Ĝi kostas nur 18 juanojn, do dekonon de mia salajro. Kun ĝi vi ambaŭ povos matene aŭskulti ‘novaĵojn kaj ĵurnalajn elтираĵojn’. Ĉu tio ne estas pli bona ol abonado de ĵurnaloj? Antaŭe, kiam mi mendis tiun kaj tiun ĵurnalon por vi ĉe poŝtoficejo, ŝajnis al mi ke tio estas malŝparo. Efektive, la frontpaĝaj titoloj de tiuj ĵurnaloj gurdas same.” Mi kaj umis la etan radioricevilon kaj ride diris: “Sur ĵurnalo ne ĉiuj estas novaĵoj, kaj multas ankaŭ aliaj rubrikoj. Cetere, ĵurnaloj legitaj kaj ordigitaj povas akumuliĝi al stako, kiun ni povas vendi al ĉifonkolektisto por iom da mono.”

Fang interrompis min: “Vi ne scias, ‘forĵetaĵoj’ ja kostas preskaŭ neniom. Nun ĉiuj diras: ‘Ĉiutage ĉio kariĝas, kaj nur du aferoj malkariĝas, unu estas ‘forĵetaĵo’, alia estas scio...’” Fang prompte ne parolis plu.

Mia koro sinkis abrupte. Mi flustris en mi: same kiel ĉifonaĵoj, ni preze falas, kaj tion mi scias jam delonge.

Malgranda Lanterno Oranĝoŝela

Tio okazis antaŭ dekkelkaj jaroj.

Posttagmezon tuj antaŭ la Printempa Festo mi iris al la antaŭurbo de Chongqing por viziti mian amikininon. Ŝi loĝis suretaĝe super la vilaĝa oficejo. Suprenirinte la malluman kaj mallarĝan ŝtuparon kaj trapaŝinte la ĉambbron kun kvadrata tablo, kelkaj bambuaj taburetoj kaj telefonilo muntita sur la muro, mi eniris ŝian loĝejon, kiu estis apartigita disde la ekstera ĉambro per ŝtofa kurteno. Ŝi forestis. Sur la tablo antaŭ la fenestro restis paperslipo, kiu informis, ke ŝi eliris pro afero kaj ke mi atendu ŝin.

Mi sidiĝis antaŭ ŝia tablo kaj pretervole prenis ĵurnalon por legi. Subite mi aŭdis, ke la pordklapoj de la eksterĉambro malfermiĝas kun krakbruo, kaj iom poste, ke iu movas la bambuan tabureton. Mi deflankigis la kurtenon kaj vidis knabineton ĉifonvestitan kaj sandalportitan sur la nudaj piedoj, verŝajne ok- aŭ naŭ-jaraĝan, kun malgrasa kaj pala vizaĝo, palegaj lipoj pro frosto kaj mallonga hararo, surpaŝantan la tabureton por preni la aŭskultilon. Ekvidinte min, ŝi verŝajne surpriziĝis kaj retiris

sian manon. Mi demandis ŝin: “Ĉu vi volas telefoni?” Descendante la tabureton, ŝi kapjesis, dirante: “Mi konektas al hospitalo por serĉi Doktoron Hu. Mia panjo ĵus multe sputis sangon.” Mi demandis: “Ĉu vi scias la telefonnumeron de la hospitalo?” Ŝi kapneis dirante: “Mi ĝuste volas peti la numeron el telefoncentralo...” Mi tuj konsultis la telefonlibron apud la telefonilo por serĉi la telefonnumeron de la hospitalo kaj refoje demandis: “Al kies hejmo mi petos lin iri, se mi sukcesos serĉi la doktoron?” Ŝi diris: “Nur diru, ke la edzino de Wang Chunlin malsaniĝas, kaj li alvenos.”

Mi konektis la telefonon, kaj ŝi emocie dankis min kaj turniĝinte volis foriri. Mi tiris ŝin demandante: “Ĉu via hejmo estas malproksima?” Fingromontrante eksteren de la fenestro ŝi diris: “Jen sub la granda oranĝoarbo en la valo, tuj proksime.” Tion dirinte, ŝi tuj descendis la ŝtuparon.

Mi denove revenis en la loĝejon kaj foliume tralegis la ĵurnalon. Post tio, mi prenis *Tri cent Poemoj el Tang-Dinastio*, kaj kiam mi ellegis duonon de ĝi, des pli malheliĝis. Mia amikino ankoraŭ ne revenis. Mi stariĝis enue kaj rigardis el la fenesto eksteren la montaran pejzaĝon vualitan per densa nebulo. Kiam mi vidis la kabanon sub la oranĝoarbego, ekleviĝis en mi la deziro, ke mi vizitu la knabinecon kaj ties patrino malsaniĝantan. Mi descendis la ŝtuparon kaj ĉe la pordo aĉetis kelkajn grandajn kaj ruĝajn oranĝojn, kiujn mi enmansakigis. Laŭ la zigzaga kaj malebena vojeto pavimita per ŝtonplatoj mi atingis la pordon de la kavano.

Mi leĝere frapis je la klapo. Malfermis la pordon knabineco, kiun mi ĵus konatiĝis. Kun levita kapo, ŝi ekvidis min. Je tio ŝi konsterniĝis en momento, kaj poste ridetis kaj mansignis al mi ke mi enriu. La ĉambro estis tre malgranda kaj tre malhela. Sur la tabullito ĉe la muro kuŝis ŝia patrino kun fermitaj okuloj, verŝajne en dormo. Ĉe la kapo de la litkovrilo restis sangaj makuloj. Ŝia vizaĝo flankiĝis internen, kaj videblis nur la taŭzigitaj haroj sur ŝia vizaĝo kaj la granda hartubero sur la postkranio. Ĉe la pordo estis malgranda karboforno, sur kiu staras argila poteto el kiu senforte ŝprucis varma vaporo. La knabineco lasis al mi sidi sur la tabureto antaŭ la forno kaj ŝi mem kaŭris apud mi, ekzamenante min de tempo al tempo. Mi mallaŭte demandis ŝin: “Ĉu la doktoro alvenis?” Ŝi diris: “Jes, li venis kaj donis injekton al mia panjo... ŝi nun pli multe bonas.” Ŝi kvazaŭ konsole diris al mi: “Trankviliĝu. Morgaŭ la doktoro ankoraŭfoje revenos.” Mi demandis: “Ĉu ŝi manĝis ion? Kio estas en la poteto?” Ŝi diris kun rido: “Kaĉo kun batatpecoj — la frandaĵo por nia jarfina vespero.” Mi ekmemoris la oranĝojn, kiujn mi kunportis, kaj elprenis kaj surmetis ilin sur la tabulotableto apud la lito. Nenion ŝi eldiris kaj nur eletendis unu manon kaj elektis la plej grandan. Ŝi detranĉis la ŝelon de ĝia supra parto kaj milde fosetis per ambaŭ manoj la senŝeligitan parton.

Mi duonvoĉe demandis: “Ĉu aliaj anoj estas en via familio?” Ŝi diris: “Nun estas neniu alia ano, mia paĉjo estas for...” Ŝi ne plu daŭrigis. Ŝi nur malrapide elprenis la oranĝopecojn unu post la alia kaj metis ilin ĉe la kapkuseno de la patrino.

La lumeto de la fornofajro iom post iom malheliĝis. Jam vesperiĝis. Kiam mi stariĝis por foriri, ŝi tiris min kaj, preninte kudrilon trairitan de tolfadeno, rapidmove

simetrie treĉis la fadenon tra la rondon de la bovloforma oranĝoŝelo, tiel ke ĝi similis korbeton, kaj ĝin pendigis per maldika bambua stangeto. Post tio ŝi prenis stumpon de kandelo, enmetis ĝin en la oranĝobovlon, bruligis kaj transdonis al mi. Tiam ŝi diris: “Vesperigis kaj la vojo estas glita. Lasu tiun ĉi malgrandan lanterneton prilumi vian vojon kiam vi ascendas monton!”

Mi admire akceptis ĝin kaj dankis ŝin. Ŝi akompanis min ĝis ekstere de la domo. Mi ne sciis kion mi devas diri. Ŝi diris, kvazaŭ denove konsolante min: “Nelonge, mia paĉjo nepre revenos, tiam mia panjo jam boniĝos.” Ŝi desegnis cirklon antaŭ si per sia maneto, kaj post tio enpremis ĝin sur mian manon: “Ankaŭ ni ĉiuj boniĝos!” Evidentiĝis, ke “ni ĉiuj” inkluzivas ankaŭ min.

Tenante tiun ĉi delikatan lanterneton, mi malrapide iris sur la obskura kaj humida montvojo. La nebula oranĝruĝa lumo efektive ne povis atingi pli malproksimen, tamen la aplombo, kuraĝo kaj optimisma spirito stimulis min, kaj mi kvazaŭ viziis antaŭ mi senliman brilon.

Vidinte la lanterneton en mia mano, mia amikino, kiu jam revenis, demandis, de kie mi venas. Mi diris: “De... la hejmo de Wang Chunlin.” Ŝi surprizite diris: “Wang Chunlin, tiu ĉarpentisto. Kiel vi konas lin? Lastajare en la medicina kolegio ĉe montpiedo kelkaj studentoj rigarditaj kiel kompartianoj estis arestitaj for kaj poste ankaŭ Wang Chunlin perdiĝis. Laŭdire, li ofte transdonis mesaĝojn por la studentoj...”

Tiunokton mi foriris de la montvilaĝo kaj de tiam mi aŭdis nenion pri la knabineto kaj ŝia patrino.

Sed de tiam, okaze de ĉiu Printempa Festo, mi ekmemoras la malgrandan lanterneton el oranĝoŝelo. Pasis dek du jaroj. La paĉjo de la knabineto certe rehejmiĝis jam delonge, kaj ŝia panjo ankaŭ certe boniĝis? Ĉar “ni ĉiuj” jam “boniĝis”!



elĉinigis Minosun (Ĉinio)

Feng Jicai (1942-)



aŭtoro Feng Jicai

Altstatura virino kaj

ŝia malalta edzo

Elĉinigis **Yang Dong**

En la korto de via hejmo kreskas arbeto kun glata trunko vi jam kutimas vidi ĝin aprezte. Sed iun tagon ĝi subite fariĝus kurbeta kun kelkaj tordiĝoj, kaj ju pli vi vidus ĝin, des pli vi sentus malkomfortecon en la koro. Tamen post longa tempdaŭro, vi jam kutimus vidi ĝin, agrablan al la okuloj, kvazaŭ ĝi devus sin prezenti tia. Se iun tagon ĝi denove fariĝus rekta, vi ree sentus nedireblan malkomfortecon en la koro. Ĝi aspektus monotona, sengusta, simpla, similante al kalva stango! Fakte ĝi nur revenus al la antaŭa aspekto, kial vi sentus tordiĝon en la koro?

Ĉu tio estas kutimo? Ha, ne malalte taksu ĝin! Ĝi troviĝas ĉie en diversaj aferoj en la mondo. Kvankam ĝi ne estas necesa leĝo, kiun oni devas obei, tamen, se vi kontraŭstaras ĝin, ĝi kaŭzas al vi ĝenaĵon kaj malbonŝancon. Sed ne plendu pri ĝia strikta limigo al vi, kelktempe vi senkonscie observas ĝian normon. Ekzemple, ĉu vi povus arogi al vi prelegantecon antaŭ viaj estroj? Ĉu vi povus senbride elmeti viajn nedecajn opiniojn antaŭ la veteranoj? Dum fotado, ĉu vi povus, puŝante famulojn flanken, impone starigi vin kun ridetaĉo meze de fotatoj? Ne, kompreneble ne. Ni ĉesu kun tiuj supozoj. Se vi prenas virinon kiel vian edzinon, ĉu vi kuraĝus edzinigi la virinon, kiu aĝas dek jarojn pli ol vi, grandas en korpo pli ol vi, kaj altas je unu kapo pli ol vi? Ne repliku per parolaĉo. Jen antaŭ niaj okuloj staras paro de geedzoj. Ŝi altas je unu metro kaj sepdek-kvin centimetroj, jam altas multe pli ol aliaj virinoj, kiel gruo staranta inter kokoj. Ŝia edzo altas nur je unu metro kaj kvindek-ok centimetroj, kun moknomo “pigmeo”. Kvanlam li kaj ŝi havas same longajn orel-lobojn, ŝajnas, ke ŝi estas je du kapoj alta pli ol la edzo.

Temas pri iliaj aspektoj. La virino estas seka, malgrasa kaj plata, kaj ŝia vizaĝo similas al dorsflanko de la nelakita tablotenisa batilo. Ŝia kvin sensorganoj pli aŭ

malpli plaĉas al okuloj, sed ili estas kaj malgrandaj kaj plataj, similante al tiuj de bareliefo. Ŝia brusto neniom elstaras, ŝia talio rigide maldikas kaj la pugo malpufiĝas kiel malmola lavtabulo. Dume ŝia edzo ŝajnas mallonga kaj dika kaŭĉuka stango. Ĉio sur lia korpo—kruroj, buŝo, nazo kaj fingroj—estas pufaj, solidaj kaj brilantaj, kiel rondaj kaj elastaj karnobuletoj. Lia haŭto estas delikata kaj glata, kiel bonkvalita maldika felo. Sub lia haŭto superflua graso radias lumon kaj plensufiĉa sango penetras eksteren per freŝa kaj rozeta ruĝo. Liaj okuloj vere ŝajnas paro da malgrandaj lampopiroj nutrataj de sufiĉa elektro. Sed la okuloj de lia edzino similas malhelajn vitroglobojn. Inter ili mankas akordiĝantaj trajtoj kaj nur videblas kontrasto. Tamen ili estas interligitaj kune per ŝnuro, unu sekvas la alian kiel ties ombro.

Unufoje okazis rekumiĝa manĝo en najbara hejmo. Pro ebrieco ties maljuna familiestro kunmetis longan malplenan vinbotelon kaj malaltan ladskatolon de porkaĵo kaj demandis al ĉiuj familianoj, “Kion ĉi tio similas?” Antaŭ ol ili respondis, li mem solvis la enigmon, “Ĉi tio ja similas al la alta virino kaj ŝia stumpa edzo, kiuj loĝas sub nia etaĝo!” Ĉiuj eksplodis per ridegoj, kiuj daŭris eĉ en postmanĝa babilado.

Do, kiel ili fariĝis paro de geedzoj?

Tio jam frue estis la demando, pri kiu zorgis la kelkdeko da familioj loĝantaj en ĉi tiu loĝdomego Tuanjie (*tūangje*), Ekde tiam, kiam la novgeedzoj transloĝiĝis en la domegon, la malnovaj loĝantoj ĉiuj en la domego direktis al ili scivoleman kaj nekompreman rigardon. Sed kelkaj preferis reteni la demandon en sian ventron, aliaj emis elbuŝigi ĝin nereteneble kaj triaj babilemis malfavore al ili. Precipe, dum pluvado, kiam la geedzoj eliris, la alta virino ĉiam tenis la pluvombreton. Se io ilia falis sur la teron, estis tre oportune por la stumpa viro ĝin levi el la tero. Je ekvido de tiuj drolaj scenoj, tiuj virinoj, kiuj loĝis en la domego, babilaĉis kun nedecaj gestoj, starante flanke. Retenitaj ridoj gluglis en ilia gorĝo. La sensencaj agoj de la plenkreskuloj instigis infanojn fari koboldaĵojn. Kiam ili vidis la paron, ili eksplodis per ridego kaj ekĉantis: “Ŝultrovekto longas, la benko larĝas...” Sed la paro ŝajnis ne aŭdi la versojn. Ili ne koleriĝis je la brua petolado de la infanoj nek donis atenton al la infanoj. Eble pro tio ili tenis tre flegman rilaton kun la loĝantoj en la domego. Tiuj, kiuj ne ŝatas ŝovi sian nazon en aliulan vazon, nur balancis la kapon kaj salutis ilin, preterpasante ilin ĉe la horo iri al aŭ reveni de la laboro. Tio kompreneble malebligis sciiĝi pli multe pri ili al tiuj, kiuj interesiĝis pri la geedzoj. Ekzemple, kian rilaton ili tenas? Pro kio ili geedziĝis? Kiu el ili du obeas al la alia? Ne ekzistas respondoj konfirmitaj de ili, tial oni faras malseriozajn divenojn.

La domego estis eksmoda apartamento, kies ĉambroj havis vastan spacon kaj larĝajn koridorojn en malhelo. Ekster la domego troviĝis granda korto kun malgranda

pordistejo ĉe la enirejo. Loĝis tie unu familio, kies estro estis honesta tajloro. Kaj lia edzino, vigloplena, babilema kaj vizitemaj al aliaj familioj, ŝatis esplori la privatajn aferojn kaj kaŝitaĵojn de aliuloj. Ŝi bone konis la rilaton inter geedzoj de ĉiu familio, la kverelojn inter fratinoj kaj bofratinoj, laboremon aŭ pigrecon de ĉiuj loĝantoj kaj salajrojn de ĉiuj laborantoj. Pri tio, kion ŝi ankoraŭ ne sciis, ŝi penis ĉiurimede informiĝi. Tia scivolemo povus ŝanĝi stultulon al talentulo. Ŝia kapablo en tio superis ĉiujn ordinarulojn. Pere de observado al aliulaj vizaĝtraĵo ŝi povis sukcese sondi aliulajn pensojn kaŝitajn en la menso, kaj pere de flarsenso ŝi povis juĝi, kiu familio ofte manĝas viandon, kaj plue kalkuli ties enspezojn. Oni ne scias, kial, de la deksejaj jaroj de la lasta jarcento, multaj tiaspecaj uloj estis varbitaj kiel aktivuloj en diversaj kvartaloj. Tio igis, ke tia esploro interveni aliulajn aferojn fariĝis laŭleĝa kaj la kapablo kaj intereso de tiuj intervenantoj prospere disvolviĝis. Ŝajnis, ke la Kreinto vere utiligas ĉiujn kapablulojn.

Kvankam tre kapabla, la edzino de la tajloro ne povis informiĝi pri la kaŭzo, kial tiu paro da strangaj kaj neparigeblaj geedzoj povis kuniĝi, kio tre afliktis ŝin. Ŝajnis, ke ŝia kapablo trafis fortan defion. Sed post pena cerbumado ŝi, depende de sia riĉaj spertoj, elteris konvinkan konkludon: unu el la geedzoj certe suferas de fizika difekto, alie kial ŝi edzininiĝis al la ulo, kiu malaltas je unu kapo pli ol ŝi. Ŝia konkludo estis fidinda, ĉar tiu paro ankoraŭ ne ekhavis infanon tri jarojn. Pro tio ĉiuj loĝantoj de la domego kredis je la saĝa juĝo de la tajloro edzino.

Sed la faktoj donas kompaton al neniu kaj ili venkis la tajloran edzinon! La altstatura virino gravediĝis. Oni senĉese ĵetis rigardojn al la pufiĝanta ventro de la alta virino. Ŝia ventro, pro plia alteco super la tero, ŝajnis treege elstara. Kiel ajn oni miris aŭ dubis aŭ perpleksiĝis, la bebo fine naskiĝis kun plora voĉo. Ĉiufoje dum la sunarda aŭ pluva vetero, kiam la geedzoj eliris, la alta virino portis bebon en la brakumo kaj stumpa edzo levis ombrelon. Vidante la drolan scenon, ke la edzo paŝas per la rondaj kruroj kaj duonalte levante la ombrelon, strikte sekvas ŝin, oni kovis pli fortan scivolemon ol antaŭe, pri tio, ke eĉ ili fariĝis geedzoj kaj neniam disiĝas unu de la alia. Diversaj eldiroj pri la geedzoj sonis ŝajne racie, sed ili ne povis esti pruvitaj de la geedzoj. Tiuj onidiroj, kiel la birdoj, kiuj ne havas lokon por fali, frape flugis tra la ĉielo.

La tajloro edzino diris, "Certe ili kaŝas ion dubindan de la aliaj. Se ne, kial ili ne volontas proksimiĝi al aliuloj? La puso sur la korpo elfluos pli aŭ malpli frue. Ni atendu kaj vidu!" Vere, iun nokton ŝi aŭdis bruon de ĵet-disrompiĝo el la ĉambro de la alta virino. Per preteksto pri kolektado de pagoj por kortpurigo de la domego, ŝi iris frapi je ŝia pordo. Ŝi certigis sin, ke finfine malkovriĝos la longe kaŝita krizo inter la geedzoj. Ŝi volis propraokule vidi, kiel ili malpaciĝas kaj kapti la vivecajn detalojn. La pordo malfermiĝis. La altulino renkontis ŝin kun ridmieno kaj la stumpa

edzo ankaŭ montris ridetan vizaĝon. Sur la tero kuŝis pecetoj de disrompita telero. Ŝi nur kaptis ĉi ĉion per siaj okuloj. Hasteme ŝi kolektis la pagon kaj eliris. Ŝi dum longa tempo ne venis al la kompreno, kio diable okazis inter la geedzoj. La telero estis disrompita, sed ne okazis kverelo kaj la paro male ĝojigis. Kia strangaĵo!

Poste la edzino de la tajloro fariĝis la reprezentanto de la domegaj loĝantoj. Kiam ŝi asisit al policano en kontrolado de registro-libreto de la familio, ŝi finfine trovis la solvon de la demando, kiun dum multaj jaroj ŝi penis malkaŝi, la solvon aŭtente fidindan kaj neniel renverseblan. Origine la paro de la geedzoj laboris en Esplora Instituto de Kemia Industrio. La stumpa edzo funkciis kiel ĝia ĉefinĝeniero kun alta salajro de pli ol cent kaj okdek juanoj, dum la alta edzino laboris kiel ordinara laboratoria helpanto kun salajro malpli ol sesdek juanoj, kaj cetere ŝi devenis de la famlio de leterportisto, kiu perlaboris malmulte da mono en pena klopodado. Alie, kial ŝi edziniĝis al la viro malpli alta je unu kapo ol ŝi? Jes, ŝi strebis por liaj posteno, mono kaj pli bona vivo! Ŝi tuj raportis la informon al tiuj virinoj en la domo, kiuj vivis malkomforte pro enuiĝo de senlaboreco. Oni ĉiam interpretas la aferojn en la mondo laŭ sia propra penskutimo kaj penas tiri ĉiujn aferojn al la nivelo de sia komprenpovo. Do, oni sendube konvinkiĝis de ŝia eldiro. Tuj solviĝis la enigmo restanta multajn jarojn en onia koro. Oni subite venis en la plenan lumon, ke la stumpa viro estas riĉulo kun denaska malforteco, dum la alta edzino malriĉa virino, kiu, monavida, trafas fortunon. Kiam oni menciis la altan virinon, kiu simile al impona ĉevalo, posedas bonan sorton, ili, precipe la tajloro edzino, parolis kun plendemo.

Ĉu la sorto bonas aŭ malbonas, ne dependas de unu momento, sed de posta tempopaso.

En 1966 sur la domegon, kiu similas al miniatura mondo, falis diversaj plagoj kaŭzantaj malfeliĉon aŭ feliĉon. Ĉiuj loĝantoj de la domo ricevis la ŝancojn de "sortoŝanĝo". La stumpa viro, kiel ĉefinĝeniero, renkontis neatenditan sinistron. Lia hejmo estis traserĉita kaj la mebloj plene forportitaj. Li mem suferis publikan kritikadon kaj enfermiĝis en punlaborejon.

Sed la sinistro ne ĉesis. Oni diris, ke multajn jarojn li laboris en la instituto dumtage, vespere li reiris hejmon kaj sekrete skribis libron per tiuj esploraj atingoj, kovante planon fuĝi alilanden kaj loĝi tie ĉe lia riĉa malproksima parenco. Oferti la sciencajn kaj teknologiajn informojn de la ŝtato — tiun absurdan aserton eĉ multaj homoj konsideris vera. Tiam la mondo dronis en tumulto kaj homoj perdis la normalan animstaton. Ili preferis sensciecon kaj malmolkorecon kaj naskis multajn mirindajn fantaziojn, por, ekzemple, eltrovi Hitleron ĉirkaŭ si. La homoj de la instituto strikte alkiĉigis al la ĉefinĝeniero por timigi lin, pugnobati lin kaj samtempe doni al li diverstipajn premiojn, kaj samtempe devigis lian edzinon submeti la manuskripton,

kiun neniu iam vidis, sed ĉi ĉio ne efikis. Iu proponis, ke oni okazigu publikan kritikadan kunvenon en la korto de la domo, kio formiĝos alispeca premo, ĉar ĉiuj timis, ke ili perdos vizaĝon antaŭ la parencoj kaj konatoj. Tiu proponon, post fiasko de diversaj metodoj, oni povos provi kaj ĝi eble efikos.

Tiutage la spektaklo plena je hombruo okazis en la korto de la domo, unuafoje en ties historio...

Posttagmeze grupo da homoj venis el la instituto. Inter du arboj pendis sur dika jutŝnuro rubando, sur kiu skibiĝis la nomo de la malaltulo kun desegnita kruco sur ĝi. En kaj ekster la korto algluiĝis etaj kaj grandaj sloganoj kun agresiva tono kaj sur la korta muro videblis dek ok paperoj, kiuj eksponis la “krimojn” de la malaltulo. La kunveno estis okazigota post vespermanĝo. La instituto alsendis elektriston por aranĝi cirkviton kaj instali kvar ampolojn de kvin cent vatoj.

Tiam la tajlora edzino jam promociiĝis de la reprezentanto de la kvartalo al la direktoro pri publika ordo kaj sekureco de tiu kvartalo. Kun iom da potenco en la mano ŝi, pli multe grasa ol antaŭe, aspektis fieraĉe kaj kontenteme. Tiutage ŝi estis morte okupita. Ŝi gvidis kelkajn virinojn de la domo glui paperojn kun sloganoj sur la muroj kaj alportis teon al la revolucioj de la instituto. La elektro por la kunveno venis eĉ el ŝia hejmo. Verŝajnis, ke ŝi mem aranĝis la geedziĝan feston en sia propra familio!

Post vespermanĝo ŝi pelis en la korton ĉiujn loĝantojn de la domo por partopreni la kunvenon. La kvar amporegoj ŝaltiĝis, prilumigante la korton tiel neĝe brile kaj klare kiel en nokta pilkoludejo. Multaj homombroj, kvazaŭ kelkoble larĝigitaj, projekciĝis sur la dommuron. Tiuj homombroj sin tenis senmove kaj serioze, kaj eĉ infanoj ne kuraĝis agi laŭvole. Ŝi gvidis grupon da homoj, kun ruĝa brakbendo sur la maldekstra brako, la brakbendo, kiu tiam simbolis potencon kaj dignecon, kaj gardis la pordon, ne permesante eniron de fremduloj.

Post nelonge granda bando da homoj el la instituto, ĉiu kun ruĝa brakbendo, alvenis majeste, eskortante la altstaturan virinon kaj ŝian stumpan edzon. Sur la brusto de la viro pendis kartontabulo, sed ne la alta virino. Oni eskortis ilin ambaŭ al la antaŭo de la podio kaj starigis ilin kun mallevita kapo. La tajlora edzino alkuris kaj diris, “Tiu ulo estas tre malalta, tiel ke la malantaŭa revolucia popolamaso ne povas vidi lin. Mi elpensu ion por lin trakti.” Dirante, ŝin sin ĵetis kun elano antaŭen, skuante du pecojn da karno sur siaj ŝultroj, kaj elportis sapkeston el sia hejmo kaj renversis ĝin, ordonante la viron stari sur ĝin. Tamen tiumomente tre malmultaj homoj interesiĝis plu pri la malproportia alteco inter la geedzoj, sur kiujn tuj falos katastrofo.

La kunveno okazis laŭ furora procezo. Deklarado pri komenciĝo de la kunveno, plengorĝa kriado de sloganoj, emocplenaj paroladoj de kritikantoj pri la kritikatoj

kaj denove plengorĝa kriadado de sloganoj. Oni komencis doni sufiĉan premon elvringi konfeson el la buŝo de la alta virino. Por la manuskripto de la libro oni atakis ŝin per buŝa batalo. Vi demandis, mi demandis kaj li demandis. Aŭdiĝis akuta krio, dikvoĉa hurlo, raŭka jelpo, laŭta riproĉo, premanta kaj persista pridemandoj... sed la virino nur ekskuis sian kapon, sincere kaj elkore. Tamen sincereco estas tre malmultekosta. Kredi je sincereco signifas nei ĉion en la mondo.

Ĉu flamiĝemaj viroj alsaltis kaj svingis pugnon por minaci ŝin, ĉu artifikuloj pridemandis ŝin per ruzaj vortoj, ŝi sincere kaj decideme rifuzis, skuante la kapon. Se la kunveno irus tiel, ĝi rikoltus nenian atingon, nenian rezulton kaj venus al nebona fino. La homoj el la instituto eksentis embarason, timante, ke ili venis kun ĝojo, sed foriros kun malĝojo.

Starante flanke la tajlora edzino aŭskultis longan tempon. Ju pli ŝi aŭskultis plu, des pli ŝi sentis sin deprimite. Ĉar ŝi ne povsciis legi kaj skribi, ŝi ne interesiĝis pri tia "manuskripto de la libro" kaj konsideris, ke la vortoj de tiuj homoj el la instituto vere malkuraĝigis ŝin. Subite ŝi alkuris al la antaŭo de la podio, kaj levinte sian brakon kun ruĝa brakbendo, kolere demandis al la alta virino, "Diru, kial vi edziniĝis al li?"

Tiu neatendita demando ekstoporigis la homojn el la instituto. Ili ne sciis, kian delikatan rilaton tiu demandon havas al la afero, kiun ili priatentas.

Ankaŭ la alta virino stuporiĝis. Ŝi ne sciis, kiel la tajlora edzino elmetis tian demandon, kiun la mondo ne prizorgas. Kun mieno plena je miroj ŝi levis la malgrasan vizaĝon, kiu estis turmentata kiel velkinta folio dum kelkaj monatoj.

"Nu, vi ne kuraĝas respondi! Mi respondu por vi! Ĉu vi edziniĝis al li pro lia monabundo? Se li maĥavus monon, kiu volus edziniĝi al li?" laŭte diris la tajlora edzino kun ioma fiereco en la tono, kvazaŭ ŝi tre bone konus ĉion de la alta virino.

Tiu nek kapjesis nek kapnenis. Ŝajne ŝi venis al la kompreno pri kion la tajlora edzino celas. Ŝiaj okuloj radiis orgilan, mokan kaj obstinan lumon.

"Bone, bone, vi ne subiĝas! Nun via edzo jam estas finita. Ĉu vi ankoraŭ povas dependi de li! Tion, pri kio vi pensas en via koro, mi tute konas!" Eksvinginte la brakon, la tajlora edzino frapetis sian bruston, kaj kelkaj virinoj kuraĝigis ŝin de flanke. Ŝi fieraciis ĝis la ekstremo.

La homoj el la instituto aŭskultis kun konfuziteco. Do lasu tiun konfuzitan aferon iri plu. Kvankam tiuj virinaĉoj fuŝis la kunvenon per devia temo, la kunvenejo tuj ekbruis.

Se ne estus tia etoso, kiel la kunveno bone iros al la fino? Pro tio la homoj el la instituto ne faris malhelpon kaj lasis tiujn virinojn disvolvi sian kapablon. Aŭdiĝis la kriaj demandoj de tiuj virinoj:

"Kiom da mono li donis al vi entute? Kion valoran li aĉetis por vi? Eldiru!"

“Ĉu du cent juanoj ne sufiĉas por viaj elspezoj, kaj vi volas vojaĝi alilanden! Kiel bela sonĝo!”

“Ĉu Deng Tuo¹ subtenas lin post kulisoj?”

“Iutage vi telefonis al Pekino. Al kiu vi telefonis? Ĉu al “Tripersona Vilaĝo²?””

La sukceso tute dependis de la etoso en la kunvenejo. La prezidanto de la kritika kunveno el la instituto, kaptante la ŝancon kiam la kunvenejo dronis en hombruado, gvidis ĉeestantojn laŭvoĉe krei sloganojn, kaj poste ili hasteme finis la kunvenon. Tuj poste la homoj el la instituto traserĉis la hejmon de la alta virino, perforte disigis la plankon kaj disŝiris la murpaperojn, sed ili rikoltis nenion. Fine ili foreskortis la malaltan viron, lasante la altan virinon hejme.

La virino restis hejme la tutan tempon, sed kiam noktigiĝis, ŝi sola eliris. Ŝi ne imagis, ke kvankam la hejmo de la tajloro en la pordistejo jam malŝaltis la lampon, tamen lia edzino ĉiumomente gvasis ŝin ĉe la fenestro. Vidinte ŝin eliri, la edzino de la tajloro strikte sekvis ŝin. Trapasinte la pordon de la korto, la alta virino preteeriris du domblokojn en la okcidenta direkto kaj transirinte la straton, ŝi haltis kaj malpeze frapis kelkfoje je la pordtabulo. La tajlora edzino sin kaŝis malantaŭ elektra fosto ĉe la strato, kaj kun gapantaj okuloj kaj retenita spiro, kvazaŭ kaptis la leporon elirontan el la kavo. Ŝi volis kapti la virinon, sed ŝi estis pli nervoza ol la kaptoto.

Krak! la pordo malfermiĝis. Maljunulino kunportis infanon el ĝi, dirante:

“Ĉu la kunveno finiĝis?”

Aŭdiĝis neniam vortoj el la alta virino.

La maljunulino aldonis, “La infano satmanĝis kaj jam havis dormon. Rapidu reiru!”

Abrupte la tajlora edzino ekmemoris, ke la maljunulino helpas al la alta virino prizorgi ties infanon, kaj ŝia bonhumoro tuj perdiĝis. Tiam la alta virino sin turnis kaj reiris, kondukante sian infanon. Sur la vojo aŭdiĝis nur paŝbruo, sed ne voĉo de ilia interparolo. La tajlora edzino sin kaŝis senmove malantaŭ elektra fosto. Kiam ili iris longan distancon, ŝi sola rehejmiĝis kun malbonhumoro.

Sekvan matenon, kiam la alta virino, kune kun sia infano eliris el la domo, videble ŝiaj okulrandoj iom ruĝiĝis. Kvankam neniuj en la domo kuraĝis ŝin alparoli, ili tamen vidis ŝiajn ruĝiĝintajn okulojn, precipe, tiuj, kiuj ĉeestis al la kunveno, sentis iom da neordinara kulpemo en la koro, kaj turnis sian vizaĝon por eviti ŝian rigardon.

Ekde kiam la malalta viro estis foreskortita, li ne revenis. Poste laŭ la boninformita edzino de la tajloro li enprizoniĝis pro novaperintaj problemoj. La alta virino fariĝis la edzino de malliberulo kaj falis al la malpleja tavolo de la socia vivo. Nature ŝi ne rajtis loĝi en la spaca ĉambro de la domo kaj devigite ŝanĝis sian ĉambron por la pordistejo-loĝejo de la tajlora edzino. Ŝi transloĝiĝis al la izolita pordistejo dekkelkajn metrojn malproksima de la domo. Tio ja estis ne malbona afero, ĉar ŝi

povis eviti la embarason, ke ŝi ofte renkontiĝis kun la loĝantoj sen diri saluton reciproke. Tamen oni povis tra la fenestro vidi la izolitan pordistejon kaj ŝian solecan figuron. Oni ne sciis, kien ŝi lokis sian infanon, kaj ŝi okaze kunportis lin hejmen por loĝi kelkajn tagojn. Ŝi silenteme vivis solecan kaj pezan vivon. Jam pli-ol-tridek-jara ŝi malfacile aspektis juna. La tajloro edzino faris la jenan aserton:

”Laŭ mi tiu virinaĉo atendas maksimume unu jaron. Se tiu malaltulaĉo ne plu erevenos el la karceroj, ŝi certe reedziniĝos al alia viro. Se mi estus ŝi—nun mi ekdezidiĝas kaj reedziniĝos al alia viro. Kial atendi la malaltulaĉon? Eĉ se li liberiĝus, li jam ne plu estus deca homo, kaj sen neniom da mono!”

Unu jaro forpasis. La malaltulo ankoraŭ ne liberiĝis el la prizono. La altulino restis vivanta sennese: iri al la laboro, reveni al la hejmo, eniri kaj eliri. Post kiam ŝi faris fajron en la forno, ŝi iris aĉeti legomojn portante grandan flavan eluzitan korbon plektitan el herbo.

En ĉiu el 365 tagoj de la jaro ŝi vivis tiele... Sed iutage la malalta viro subite aperis. Tiam estis postaŭtuna tempdaŭro. Kun brosfarmaj haroj kaj tre maldika vesto li aspektis tute alia ol li estis. Lia korpo magriĝis kvazaŭ malpliĝinte je unu tavolo da karno kaj lia haŭto jam perdis brilecon kaj sangkoloron. Li rekte iris al sia antaŭa loĝejo, sed la honesta tajloro akompanis lin al la pordistejo. La altulino disfendis hejtlignon, kaŭrante ĉe la pordo. Je ekaŭdo de lia voko ŝi tuj stariĝis kaj stupore gapis al li. La geedzoj, kiuj ne intervidiĝis unu la alian dum du jarojn, tre surpriziĝis de reciproka sangiĝo. Unu aspektis velka kaj maldika, kaj la alia pala kaj malgrasa. Unu des pli altis, kaj la alia des pli maltis. Dum kelka momento ili gapis unu la alian kaj tuj poste turnis la kapon. La virino sin direktis en la ĉambron kaj eliris post longa tempo. La viro, kaŭriĝinte, levis la hakilon kaj komencis dishaki hejtlignon ĝis li fine disfendis du korbegojn da hejtligno en mincajn splitojn. Ŝajne, se ili ambaŭ rigardus vid-al-vide plu por momento, inter ili eksplodus la afero forta kaj neeltenebla. De tiam ili iris al kaj revenis hejmon el laboro kiel homo kaj ombro. Ĉio iris rutine kiel antaŭe. La loĝantoj de la domego ne trovis en ili ion strangan kaj perdis iom post iom intereson pri ili. Ilia ekzistado aŭ forestado jam ne plu rilatis la aliulojn.

Iun matenon io okazis al la alta virino. La malalta viro elkuris panike el la hejmo. Post nelonge venis ambulanco, kiu ŝin forportis. Sinsekve dum kelkaj tagoj ne homo estis hejme kaj ne lampo lumis dumnokte. Post pli ol dudek tagoj la malalta viro kaj fremdulo revenis, portante brankardon, sur kiu la alta virino kuŝis, kaj eniris la malgrandan pordistejon. Ekde tiam la alta virino ne plu eliris. La malalta viro regule iris al la laboro. Kiam li rehejmiĝis, li hasteme faris fajron en la forno kaj poste aĉetis legomojn, tenante la korbon el herbo, ĝuste kiun ŝi uzis ĉiutage antaŭ unu aŭ du jaroj. Nun la korbo ŝajnis tro granda por la viro kaj ĝia fundo preskaŭ tuŝis la teron.

Ĉe jarturniĝo, kiam la vetero denove varmiĝis, la alta virino eliris. Pro longatempa manko de sunradiado ŝia vizaĝo aspektis malbele blanka, kvazaŭ ŝmirita per tavolo da kalkpolvo. Ŝi, ĵus forŝirinte de la lito, ŝanceliĝis dekstren aŭ maldekstren. Bambua stango en dekstra mano ŝin apogis, ŝia maldekstra brako fleksiĝis sur la brusto, ŝia

maldekstra kruro estis rigida, ke ŝi paŝis malfacile. Videblis ke ŝi suferis de cerba infarkto. De tiu tago la malalta viro subtenis ŝin per brako iri po du ĉirkaŭiroj en la korto ĉiumatene kaj ĉiuvespere. Ili paŝis malrapide kaj malfacile. La viro streĉis siajn brakojn por subteni ŝian fleksiĝintan brakon. Pro sia troa malalteco, kiam li subtenis ŝian brakon, li devis levi alten siajn ŝultrojn. Kvankam li faris gandan penon, li montris rideton por ŝin kuraĝigi. Pro tio, ke ŝi ne povis levi la maldekstran kruron, li ligis ŝian maldekstra kruron per jutŝnuro kaj li tenis la alian ekstremon de la ŝnuro. Kiam ŝi volis levi la maldekstran kruron, li levtiris la ŝnuron forte. Tiu sceno estis mirinda, kompatveka kaj impona. Vidante tion, la loĝantoj de la domego eksentis kortuŝitecon. Kiam tiuj loĝantoj renkontis ilin, ili memvole kaj amike balancis la kapon al ili ambaŭ.

La alta virino ne havis sufiĉan feliĉon esti longe kun sia malalta kaj plejkara edzo. Morto kaj vivo same senkompatis: la vivo ŝin ruinigis kaj la morto ŝin fortiris. Nun resti nur la viro sola.

Nur post kiam la altulino forpasis, la Fortuno kisis la frunton de ŝia edzo. Li rehabilitiĝis kaj oni redonis la meblojn, kiuj estis konfiskitaj, kaj la salajrojn, kiuj estis retenitaj. Nur lia antaŭa ĉambro, kiun la tajlora edzino okupis, ankoraŭ ne estis redonita al li. Kelkaj loĝantoj de la domego ankoraŭ donis atenton al li, por ke ili povu vidi la okazaĵojn en lia vivo. Laŭdire multaj homoj el la instituto venis persvadi al li reedziĝi, sed li rifuzis ilin ĉiujn. La tajlora edzino diris:

“Mi scias, kian virinon li volas. Vidu, kion mi faros!”

Post kiam la edzino de la tajloro jam pasigis siajn plej fierajn tagojn, nun ŝi fariĝis multe pli humila. Ŝia potenco perdiĝis kaj ŝi devis porti ridmienon. Kun foto de bela kaj juna virino en sia sino, ŝi iris serĉi la malaltan viron en la pordistejo. Tiu virino sur la foto estis ŝia nevino. Sidante en lia hejmo kaj ekzamene ĉirkaŭrigardante la meblojn, ŝi svatis ĉi tiun malaltan riĉulon. Kiam ŝi blablais fervore kun larĝa rideto sur la vizaĝo, ŝi subite trovis, ke li sin tenas muta kun livida mieno kaj dorse de li pendas lia geedziĝa foto kun la alta virino. Ŝi ne kuraĝis elpoŝigi la foton de sia nevino kaj retiris sin eksteren.

Kelkaj jaroj forpasis. Ĝis nun la malalta viro vivas sola kiel vidvo. Nur en ĉiu dimanĉo li prenas sian infanon hejmen kaj vivas kune kun la infano. Vidante la solecan figuron de la stumpa viro, la loĝantoj de la domego rememoras pri la pasintaj okazaĵoj, iom post iom perceptante, kial li insistas pri la soleca vivo... Dum pluvado, kiam li iras al laboro, tenante ombrelon, li, pro la kutimo, ankoraŭ levi la ombrelon pli alten. Tiam oni ekhavas la mirandan senton, ke sub la ombrelo ekzistas longa spaco malplena, kiun io ajn en la mondo ne povas pleniĝi.

Notoj:

1. *Deng Tuo: tiama tiel nomata reakciulo en Pekino.*
2. *“Tripersona Vilaĝo” aludas bandon de tri personoj, kiuj estis kritikataj kiel reakciuloj kontraŭ la tiama revolucia registaro.*

Mo Yan (1955-)

(*Mo Yan, ĉina fama moderna verkisto, kiu fekundas en kreado de romanoj, noveloj, teatraĵoj k.a. En 2012 li gajnis Nobel-premion pri literaturo.*)



Tri brasikoj

Vintre de la 1967-a jaro, matene proksime al la Printempa Festo, mia patrino, suspirante, levis sian rigardon de tempo al tempo al tiuj tri brasikoj pendantaj sur la muro. Tiujare mi estis dekdu-jara. Fine ŝi fiksas la rigardon sur la tri brasikojn kaj okule ekzamenis ilin.

verkisto Mo Yan

Farinte decidon, ŝi petis al mi alporti korbon.

“Panjo...” mi triste demandis: “ĉu vi volas...”

“Hodiaŭ okazas vilaĝa foiro,” mia patrino peze diris.

“Sed vi promesis, ke ni konservu ilin por la Printempa Festo...” Antaŭ ol mi finis la vortojn, miaj larmoj torente elfluis. “Ni kreskigis cent kaj kvar brasikojn, forvendis cent kaj unu, kaj nun restas nur tri... Vi diris, ke ni konservu ilin por prepari raviolojn dum la Printempa Festo...” mi diris plorsingulte.

Proksimiĝinte al mi, ŝi levis la baskon kaj forviŝis larmojn de sur mia vizaĝo. Tra miaj okuloj vualitaj de larmoj, mi vidis la patrinon demeti la du pli grandajn brasikojn de la muro. Fine la plej malgranda brasiko, ronda kiel bonza kapo, demetiĝis de la ligna hoko sur la muro kaj enŝoviĝis en la korbon. Mi bone konis la brasikon. Kvankam ĝi estis malgranda, ĝi tamen kunvolviĝis tre plene kaj strikte. Kiam ni kolektis ĝin, la patrino, frapetante ĝin, emociplene diris al mi: “Jen vidu ĝin, vidu ĝin...” Tiumomente la vizaĝo de la patrino radiis de ĝojego, kvazaŭ ŝi frapetus la infanon jam elkreskintan post multe da suferoj.

Sur la vojo al la foirejo vento blovis ostpike kaj la suno lumis malforte, kvazaŭ estingiĝonte en ajna tempo. Miaj manoj baldaŭ fariĝis sensentaj pro frosto. Kaj pro tio la korbo falis de miaj manoj sur la teron, kaj la malgranda brasiko saltis el la

korbo, ruliĝis en la blanke glaciĝintan sulkon apud la vojo, kaj difektis al si la radikon. La patrino donis manfrapon al mia kapo, hastis al la sulka fundo, zorgeme levis ĝin ambaŭmane kaj metis ĝin en la korbon. Konsciiĝinte pri mia kulpego, mi plore diris: “Mi ne intence faris tion, vere ne intence...” Ŝia kolermieno mildiĝis, kaj anstataŭ bati kaj skoldi min, ŝi diris per varma tono: “Kia sentaŭgulo nur ŝtopita per nutraĵoj!”

Fine ni atingis la bazon. Ŝi metis la korbon apud Avo la Sepa kaj urĝis min al la lernejo. Kiam mi volis foriri, mi vidis maljunulinon iri al niaj brasikoj. Ŝi demandis pri la prezo de la brasikoj per delikata kaj raŭka voĉo kaj ekskuis la kapon. Ŝajnis, ke ŝi konsideris la prezon pli alta. Sed anstataŭ foriri ŝi kaŭriĝis, levis la eluzitan ŝaffelon kaj elekte turnis tiujn tri brasikojn. Ŝi deŝiris de la plej malgranda brasiko la radikon, kiu, kvankam difektita, estis ankoraŭ ne rompita, kaj poste ŝi pikis la brasikojn unu post la alia per sia fingro simila al sekiĝinta bastoneto, dirante kun tordita buŝo, ke niaj brasikoj ne tre strikte kunvolviĝas. La patrino diris per trista voĉo: “Ho, bofranĝo, se vi malŝatas, ke tiuj brasikoj ne strikte kunvolviĝas, do ĉirkaŭiru en la bazon kaj trovu, kie ankoraŭ troviĝas la brasikoj, kiuj kunvolviĝas pli strikte ol la niaj.”

Mi ekbrulis de abomeno al la maljunulino, pensante, ke ŝi ne nur fingre pikis niajn brasikojn, sed ankaŭ grimacmiene plendis pri nestrikta kunvolviĝo de niaj brasikoj. Mi nereteneble elspulis tiujn vortojn: “Se ili kunvolviĝus pli strikte, ili fariĝus rondaj ŝtonoj!” La maljunulino rigardis min surprizite. Mia patrino, turninte la kapon, riproĉis al mi: “Vi infaneto, ne diru tiel krude al la maljunulino!”

La maljunulino provis deŝiri la velkintan eksteran folion de la plej malgranda brasiko. Pro tio mi tre koleriĝis kaj akre diris: “Ne deŝiru ĝin, alie al kiu ni vendu ĝin?”

“Kia infano! Kial vi parolas tiel eksplodeme?” la maljunulino murmure diris, sed ŝi ne ĉesis deŝiradon.

Finfine ŝi sukcesis deŝiri la velkintan eksteran folion kaj riveligis la delikata kaj blanka interno de la brasiko. Se oni elfaros raviolojn per tia brasiko, kiel bongustaj ili estos! La maljunulino stariĝis kun la brasiko en la manoj kaj petis al la patrino pesi ĝin. Post pesado ŝi diris: “Mi ne scipovas kalkuli.”

Pro kapdoloro, la patrino ne sukcesis ĝuste kalkuli kaj diris al mi: “Shedou, vi kalkulu.”

Mi trovis herbotigon kaj kalkulis per ĝi sur la tero laŭ la multipliko, kiun mi ellernis antaŭ nelonge. Mi anoncis la rezulton kaj la patrino komunikis ĝin al ŝi.

“Ĉu vi ne miskalkulis?” la maljunulino diris, fiksante sian nefideman rigardon sur min.

“Do vi mem kalkulu,” mi kontraŭdiris.

“Kiel krude vi infano parolas!” murmurante, ŝi elpoŝigis malpuran mantukon, malfaldis ĝin kaj malkovris ligajon da monbiletoj. Ŝi ŝmiris la fingron per salivo kaj nombris monbiletojn unu post la alia. Poste ŝi enmanigis la nombritajn monbiletojn al la patrino.

Post lernohoroj, mi apenaŭ transpasis la sojlon, kiam mi vidis la patrino sidantan stupore antaŭ la forno. Tiuj tri brasikoj kuŝis en la korbo. Tiu plej malgranda brasiko, pro la foliokovro deŝirita, jam multe difektiĝis de frosto. Mi tuj sentis sinkon de la koro, sciante, ke io plej malbona okazis. Levinte la kapon, ŝi min rigardis per ruĝetaj okuloj. Post longa momento ŝi diris per la voĉo, kiun mi neniam forgesis: “Kiel vi povus fari tion, infano? Kial vi povus kalkuli pli je dek cendoj?”

“Panjo!” Mi plore diris: “Mi...”

“Hodiaŭ vi humiligis min,” ŝi diris, kun du larmeroj sur la vango.

Tio estas la unua fojo, ke mi vidis la firman patrino faligi larmojn. Ĝis nun, kiam mi pensas pri tio, mi ankoraŭ sentas pezan doloron en la koro.

La patrino

Mi naskiĝis en malproksima kaj postiĝinta vilaĝo en Gaomi-gubernio de Shandong-provinco. Kiam mi estis kvinjara, Ĉinio troviĝis dum la malfacila tempdaŭro en la historio. La vivo lasis al mi la komencon rememoron pri mia patrino, kiu, sidante sub pirarbo kun pompantaj blankaj floroj, batadis sovaĝajn legomojn sur blanka ŝtonego per purpurruĝa lavbatilo. Verda likvo fluis sur la teron kaj ŝprucis sur ŝian bruston. En aero ŝvebis la amara kaj acerba odoro de la likvaĵo de sovaĝaj legomoj. La batado de la lavbatilo sonis obtuze kaj humide, tiel ke mi sentis ondojn da kunpremiĝo en la koro.

Tiu bildo kun sonoj, koloroj kaj odoro servas kiel la delirpunkto de mia rememoro de la homa vivo kaj ankaŭ la delirpunkto de la vojo de mia literatura kreado. Per la oreloj, nazo, okuloj kaj korpo mi konas la vivon kaj spertas aferojn. La memoroj konservitaj en mia cerbo senescepte estas tiaj tridimensiaj memoroj kun koloroj, odoroj kaj formoj, kiuj prezentas vivecajn kaj sintezajn figurojn. La maniero, per kiu mi spertas la vivon kaj enkapiĝas la aferojn, iagrade decidas la fizionomion kaj trajtojn de miaj romanoj. Tio, kion mi malfacile forgesas en tiu bildo, estas, ke, kiam mia patrino pene laboris, ŝi eĉ zumis arion! Tiam inter niaj multaj familianoj la patrino estis la plej penema kaj plej malsatsufera. Estas laŭ normala racio, ke ŝi devus ploradi, batante sovaĝajn legomojn. Sed ŝi kantetis anstataŭ plori. Pri tiu detalo mi ankoraŭ ne komprenas la sencon implicitan en ĝi eĉ ĝis nun.

Mia patrino ne lernis en lernejo nek scipovi legi. La mizeroj, kiujn ŝi suferis, estas vere malfacile nombreblaj. En tiaj mizeroj, kiaj milito, malsato kaj malsano, kia forto subtenis ŝin pluvivi kaj kia forto ebligis ŝin kanteti, kiam ŝi malsatis kun

murmuranta stomako kaj suferis malsanon? Dum mia patrino ankoraŭ vivis, mi ofte volis paroli kun ŝi pri tiu demando, sed mi ĉiam sentis, ke mi ne rajtas elmeti tian demandon al ŝi. Dum tempeco okazis serio da memmortigoj de virinoj en nia vilaĝo, mi sentis timegon pro nenio. Tiam mia familio troviĝis en la plej kriza tempo: mia patro estis misakuzita, la stoko de greno en la hejmo ne multis, kaj la patrino suferis de malnova malsano kaj ne povis ricevi kuracon pro manko de mono. Mi ĉiam maltrankviliĝis pro tio, ke mia patrino iros la senelirejan vojon de memmortigo. Ĉiufoje, kiam mi hejmenrevenis el laboro, mi tuj ekkriis enirinte la pordon. Nur post kiam mi aŭdis ŝian voĉan respondon, mi eksentis, kvazaŭ ŝtono falus teren de sur la koro. Unufoje, kiam mi revenis jam ĉe vespero, la patrino ne respondis al mia voĉo, mi hasteme kuris al bovstalo, muelejo kaj necesejo por serĉi ŝin, sed mi ne sukcesis trovi ŝin. Mi eksentis, ke okazis la plej terura afero, kaj mi laŭvoĉe ploradis. En tiu momento la patrino eniris el ekstere. Kun granda malkontento pri mia plorado ŝi diris, ke homo, precipe viro, ne devas plori laŭvole. Ŝi pludemandis, kial mi ploras, kaj mi evitemis per senrilataj vortoj kaj ne kuraĝis eldiri mian zorgemon pri ŝi. Ŝi komprenis, kion mi havas en la koro. Ŝi diris al mi: “Trankviliĝu, filĉjo. Mi ne irus al li, se la Reĝo de Infero ne alvokus min!”

Kvankam ŝi parolis ne laŭte, mi tamen tuj akiris de ŝi ian senton de sekureco kaj esperon al la estonteco. Post multaj jaroj, je ekmemoro pri ŝiaj tiuj vortoj, mi fariĝas des pli emociplena. Tio estas la solena promeso, kiu la patrino faris al sia zorgoplena filo: vivi plue, kiel ajn malfacile kaj mizere! Nun, kvankam mia patrino jam estas alvokita de la Reĝo de Infero, ŝiaj tiuj vortoj, kiuj entenas la kuraĝon vivi plue, baraktante spite malfaciloj kaj mizeroj, ĉiam akompanas min kaj spronas min.

Iam mi vidis bildon sur la televidilo, kiun mi neniam forgesas dumvive: post intensa bombardo de Israelo al Bejruto, densa eksplodfumo ankoraŭ ne disiĝas kaj maljunulino kun vizaĝo pala kaj marasma, kaj kotmakulita korpo elportas el la domo kesteton, en kiu troviĝas kelkaj freŝverdaj kukumoj kaj kelkaj freŝverdaj celerioj; ŝi prikras siajn legomojn ĉe la vojrandoj; kiam reportero celis la kameraon al ŝi, kun alte levita pugno, ŝi deklaras raŭke sed firme: “Ni vivas sur ĉi tiu terparto generacio post generacio. Eĉ se ni manĝus ĉi-tiean sablan grundon, ni povus vivi plu!”

Tiuj vortoj de tiu maljunulino skuas mian animon. Virino, patrino, tero kaj vivo, tiuj nocioj kirligas en mia menso, sentigante min ekhavi neelimineblan spiritan forton. Kaj tiu ideo vivi plu depende de manĝado de sabla grundo estas ĝuste la fundamenta garantio por la homaro sukcesi vivadi eĉ spertinte sennombrajn katastrofojn. La domaĝo kaj respekto al la vivo ĝuste estas la animo de la literaturo.

Dum tiuj malsataj tagoj mi vidis multajn kazojn, en kiuj oni perdis sian personan dignon pro malsato. Ekzemple, por akiri pecon da fabkuko grupo da infanoj penis imiti bojadon ĉirkaŭ la grenstaplisto de la vilaĝo. Li diris, ke li donos la fabkukon al

tiu, kiu plej bone imitos bojadon. Ankaŭ mi estis inter tiuj infanoj. Ĉar ĉiuj infanoj bojis tre bone, li ĵetis la fabkukon malproksimen. La infanoj konkure kuris por kapti ĝin. Tion mia patro vidis. Post hejmeniro mia patro rigore kritikis min, kaj ankaŭ mia avo. La avo diris al mi: “La buŝo estas nur kanalo. Estas egale, ĉu frandaĵo ĉu herbradikoj kaj arbŝeloj, iras tra ĝi en la ventron. Ĉu indas imiti bojadon por akiri pecon da fabkuko? Homo devas havi sian propran karakteron.” Iliaj vortoj tiam ne sukcesis konvinki min, ĉar mi sciis, ke estas malsame manĝi frandaĵojn aŭ herbradikojn kaj arbŝelojn! Tamen mi sentis, ke iliaj vortoj entenas specon de digno, la homa digno kaj homa konduto. Homoj ne devas vivi kiel hundoj.

Mia patrino admonis al mi elteni mizerojn kaj neflekseble vivi plu, kaj miaj patro kaj avo postulis, ke mi vivu kun digno. Kvankam iliajn konsilojn mi ne povis bone kompreni, mi tamen havigis al mi el ili valoran kriterion por juĝi gravajn aferojn.

La malsataj tagoj igis min sperti kaj bone observi kompleksecon kaj simplecon de la humaneco, ekkoni la plej minimuman kriterion de humaneco, kaj travidi certajn facetojn de la homa esenco. Post multaj jaroj, kiam mi verkas, tiuj spertoj fariĝas miaj valoraj resursoj. En miaj romanoj troviĝas multe da priskriboj pri rigora realo kaj multe da senkompataj malkaŝigoj pri la mallumo de humaneco, kio estas strikte neapartigebla kun miaj pasintaj travivaĵoj. Kompreneble, kiam mi malkaŝas la mallumon de la socio kaj analizas la kruelecon de humaneco, mi ne forgesas la noblan kaj solenan flankon de humaneco, ĉar miaj gepatroj kaj geavoj, kaj aliaj multaj homoj kiel ili, starigas al mi brilan modelon. La noblaj kvalitoj de tiuj ordinaraj homoj estas la fundamenta garantio por unu nacio, kiu ne povas degeneri en mizeroj.

Miaj instruistoj

Tiu ĉi titolo estas temo, kiun miloj kaj miloj da homoj jam skribis kaj miloj kaj miloj da homoj daŭre skribos. Ĝenerale, se oni verkas per tiu ĉi temo, li kovas dankemon. Kompreneble mi ne volas esti escepto. En reala vivo troviĝas bonaj kaj malbonaj lernantoj, kaj same ankaŭ instruistoj. Dum mia mallonga vivo en lernejo kelkaj el la instruistoj, kiuj donis lecionojn al mi, estis tre bonaj, kaj aliaj tre malbonaj. Tiam mi ne povis kompreni la malbonecon de tiuj instruistoj, sed nun mi jam havas lumon pri tio.

Mi ekvizitis lernejon, kiam mi estis kvinjara. En la urbo infanoj kun tia malgranda aĝo, kiuj vizitas lernejon, multe videblas, sed en tiama kamparo preskaŭ mankis tiaj infanoj.

Kompreneble ne estis, ke miaj gepatroj volis klerigi min pere de fruperioda edukado por ekspluati mian intelekton, sed tiam nia vilaĝo estis metita sub la

administrado de la ŝtat-posedata Jiaohe-agrikulturejo kaj la kampuloj ĉiuj fariĝis kamparanoj-laboristoj, kies infanoj de antaŭ lernaja aĝo, kiel tiuj en la urbo, eĉ eniris en infanĝardenojn kaj tie manĝis kaj dormis. Tiuj kelkaj virinoj en la infanĝardeno ofte proprigis al si parton de niaj manĝaĵoj kaj regis nin militiste. Okazis plejofte al ni malsato kaj lezado pro batado. Pro tio miaj gepatroj sendis min al lernejo, tiel ke mia porcio de greno povis esti alportita hejmen kaj kompreneble mi ankaŭ povis eskapi el fizika puno.

En la lernejo mi ankoraŭ surportis pantalonon kun fendita postaĵo de la pantalono. Mi emis plori kaj volis kuri hejmen tuj post lecionhoroj. En la klaso la aĝoj de lernantoj multe diferencis: la plej juna mi estis kaj la plej aĝa lernanto eĉ jam portis peĉnigrajn lipharojn.

La unua instruisto, kiu lasis impreson al mi, estis altkreska instruistino, freŝe okulplaĉa, kiu ofte surhavis bluan veston blankiĝintan pro lavado kaj naztikle odoris je speciala aroma sapo tra la korpo. Ŝi nomiĝis Meng Xianhui aŭ Meng Xianghui. La kialo, ke mi povas memori ŝin, rilatis al tre skandala afero. Okazis, ke ĉiuj instruistoj kaj lernantoj de la lernejo aŭskultis al longa raportado de la lernejestro sur la lerneja tereno. Mi staris tuj ĉe lia fronto kaj mi devis levi la kapon por povi rigardi lian vizaĝon. Tiutage mi suferis diareon. Kiam mi venis al la rando de lakso, mi volis iri necesejen sed ne kuraĝis, tordante mian korpon. Ne plu eltenante, mi diris: “Mi volas iri necesejen, via lernejestra moŝto...” Sed li donis nenian atenton al mi, kvazaŭ ne aŭdante kion mi diris. Poste vere ne povante reteni lakson, mi ekkuris al necesejo kun laŭtvoĉa ploro, kriante; “Ĝi jam fluas en mian pantalonon...” Nature mi ne sciis pri la rezulto pro mia konduto. Poste iu diris al mi, ke la instruistoj kaj lernantoj skuigis de ridego pro mia konduto, kaj eĉ la seriozmiena lernejestro eksplodis per ridego. Mi nur sciis, ke instruistino Meng eltrovis min en necesejo kaj ŝovinte stakon da bildoj plene skribitaj per literoj en mian pantalonforkon, ŝi lasis min hejmeniri. Post pli ol dek jaroj mi eksciis, ke ŝi loĝis en la sama vilaĝo kun mia edzino. Mia edzino diris, ke ni devas saluti ŝin per “onjo”. Mi demandis al mia edzino, ĉu ŝi klaĉis kontraŭ mi. Ŝi respondis, ke nia onjo eĉ laŭdis min. Mi demandis, kio estis ŝia laŭdo, kaj mia edzino serioze diris, ke ŝi laŭdis, ke vi estas ne nur inteligenta kaj sagaca, sed ankaŭ tre atentema pri persona higieno.

La dua instruisto, kiu lasis profundan impreson al mi, ankaŭ estis virino. Ŝi, malaltkreska, nomiĝis Yu Xihui. Ŝi parolis kun akĉento de alia loko. Ŝi instruis min de la unuajara klaso ĝis la la triajara—mi jam ne povas scii, kiomfoje mi lernis en la unuajara klaso—komencante de alfabeto ĝis rekonado de ideogramoj per bildoj. Pli ol tridek jaroj forpasis, tamen mi ankoraŭ rememoras pri la sceno, kie ŝi trenvoĉe instruis al ni literojn. Ke hodiaŭ mi povas verki per komputilo per literoj anstataŭ per metodo de formado de strekoj, tio tute dependas de la bazaj scioj, kiujn ŝi instruis

al mi. La edzo de instruistino Yu servis en aviada kompanio de la Respubliko de Ĉinio, kiu ŝajne impresis kiel minaca monstro, sed fakte li estis afabla kaj akordiĝema maljunulo. Li instruis mian pliaĝan fraton. Ni nomis lin instruisto Li kaj la vilaĝanoj lin respektis. Dum Kultura Revolucio*, furoris skribado de citaĵoj sur la muro per ruĝa farbo. Tiuj instruistoj, kiuj ribelis por la revolucio, desegnis liniojn kaj skizis ideogramojn per liniilo kaj peniko, sed ne sukcesis elskribi eĉ unu ideogramon dum longa tempo. Poste oni venigis instruiston Li kaj petis lin skribi. Li ekprenis penikon kaj skribis senprepare. Sub lia peniko netaj kaj dikaj ideogramoj riveliĝis, altirante eĉ la admiron de tiuj tiel nomataj revoluciuloj. La plej juna filo de instruistino Yu estis preskaŭ samaĝa kiel mi. Post lecionhoroj mi ofte iri al lia hejmo ludi kun li, kaj mi kovis specialan intiman senton al lia familio. Poste mi estis senigita je la rajto viziti lernejon kaj mi hontis iri al lia hejmo. Post kelkdekoj da jaroj instruistino Yu kaj ŝia plejjuna filo, kiu jam fariĝis la plej elstara kuracisto en la gubernis hospitalo, loĝis en la ĉefurbo de la gubernio. Mi havus ŝancon viziti ŝin, sed mi ĉiam prokrastis mian viziton. Sekve de tio, kiam mi iris viziti ŝin, ŝi jam forpasis pli frue. Ŝia filo diris al mi, ke kiam ŝi vivis, ŝi vidis miajn foton kaj manuskripton aperigitajn en la gazeto *Monatgazeto de romanoj*. Tiam ŝi jam dronis en malsano dum longa tempo. Kvankam ŝi ne estis tre sobra, ŝi tamen rekonis min je la unua ekvido al mia foto. La filo demandis al ŝi, kiel mi kaligrafias. Ŝi respondis: “Li kaligrafias pli bone ol vi!”

La tria instruisto, kiun mi ne forgesas dum la tuta vivo, estis viro. Fakte li instruis nin en fizika ekzercado nur duonan semestron. Li ne estis kalkulita kiel mia “kara” instruisto, sed li pledis por mi dum mi kondukis plej malbone. Li nomiĝis Wang Zhaochong. Li havis bonan devenon, ŝajne de la familio, kies ano martiriĝis. Tia deveno tiuepoke ja brilis kiel oro. Kiu havis tian devenon, tiu certe sin montris arogante fieraĉa kaj tenis la nazon supren, sed instruisto Wang ĉiam aspektis modesta, diskreta kaj neniom montriĝema. Malalta, li havis fortikan konstitucion. Li povis kuri rapide kaj salti alte. Mi memoras, ke li transsaltis la horizontalan stangon altan je 1.7 metroj, kio ne estis facila en la kampara bazlernejo. Ĉar mi diris antaŭ la vizaĝo de lernanto, ke la lernejo similas al prizono, la instruistoj estas posedantoj de sklavoj kaj la lernantoj sklavoj, la lerneja instanco donis al mi punon de averto. Oni diris, ke komence oni volis sendi min al la policejo, sed mi feliĉe eskapis pro mia malgranda aĝo. Pro tiu okazintaĵo mi fariĝis fame malbona lernanto en la lernejo. Oni konsideris, ke mi estas reakcia en penso kaj malmorala, tial mi estas nesavebla. Kiam io malbona okazis, mi estis la unua, kiun oni suspektis. Por restarigi mian bonan nomon mi penadis fari bonajn aferojn: bruligi stovon por instruistoj en vintro, helpi al instruistoj manĝigi kuniklojn somere kaj helpi al malriĉaj kamparanoj vektoporti akvon anstataŭ fari miajn proprajn hejmaferojn post lernejaĵoj, sed tio,

kion mi penis fari, rikoltis preskaŭ neniom da efiko. La lerneja instanco kaj instruistoj konsideris, ke mi ŝajnis min progresema en bonfarado.

Tagmeze en somero—tiam la lernejo postulis, ke la lernantoj devu siesti en klasĉambro post tagmanĝo, el kiuj grandaj lernantoj dormu sur la pupitroj kaj la malgrandaj sur benkoj, kun librosakoj aŭ ŝuoj kiel kapkusenoj. Tiujare en la vilaĝo furoris lignaj sandaloj, kiuj sonis laŭte dum irado, kaj mia patro faris paron. Kiam mi iris, kun lignaj sandaloj, al la pordo de la klasĉambro, kunlernantoj jam endormiĝis. Mi instinkte dematis la sandalojn kaj tenis ilin en la mano, kaj eniris la klasĉambro kun nudaj piedoj. Instruisto Wang vidis min kaj sekvante min en la klasĉambro. Eliriginte min el la klasĉambro, li demandis al mi, kial mi demetis la sandalojn. Mi respondis, ke mi timas vekti la kunlernantojn. Ĵetinte al mi ekrigardon, li foriris senparole. Poste mi aŭdis, ke instruisto Wang parolis pri tio en la kunveno de instruado kaj li diris, ke fakte mi estas lernanto kun tre bona kvalito. Ĉiuj aliaj instruistoj konsideris min nesavebla, dum li trovis min bonkora pere de unu incidento. Kiam ajn mi ekpensis pri tio, mi ekstreme emoviĝis. Poste mi ĉesigis mian lernadon kaj fariĝis knabopaŝtisto. Kiam mi kondukis ŝafojn kaj bovojn preter la vojon antaŭ la pordego de la lernejo kaj renkontis instruiston Wang, mi ekhavis miksitaĵajn sentojn en la koro. Ruĝiĝante, mi salutis lin kaj haste preteriris kun mallevita kapo. Poste instruisto Wang transposteniĝis al la gubernia urbo, kaj mi dungiĝis kiel provizora laboristo pere de nepotisma rilato.

Iufoje sur la revena vojo de la gubernia urbo mi renkontis instruiston Wang sur biciklo. La malantaŭa pneŭo de lia biciklo jam fariĝis tiel plata, ke ĝi preskaŭ ne povis sunteni lin, sed li rajdigiĝis min sur la malantaŭan sidlokon kaj bicklis pli ol dek liojn. Tiam la bicklo estis tre valora posedaĵo kaj oni amis ĝin kiel siajn okulojn. Instruisto Wang, en tia alta statuso, eĉ riskis premrompi la pneŭon kaj veturigis min la malnoblulon pli ol dek liojn, kion ne ordinaruloj povis fari. Ekde tiam mi ne vidis lin, sed en mia cerbo ofte aperas lia ridetanta vizaĝo kaj vigla silueto transsaltanta la horizontalan stangon altan je 1.7 metro.

* *“Kultura Revolucio” (1968-1978) estis lanĉita de antipartia kliko, kiu plagis la landon kaj la popolon.*

elĉinigi Yang Fang (Ĉinio)

Chiung Yao



En Profunda Korto (3)

Elĉinigiĝis Veĵdo

3

Aŭdiĝis malpezaj frapetoj sur la pordo.

“Envenu!” kriis Fang Siying, levante sian kapo el sur la librotablo.

Puŝmalfermiĝis la pordo. Bai Tingting envenis kun librosako sur la dorso, kaj fermis la pordon post si. Kun dolĉa rideto, ŝi mallaŭte diris, “Mi venas, instruistino.”

“Bone. Sidiĝu, Tingting.” Fang alŝovis kanseĝon al ŝi kaj sidigis ŝin. Poste, okule ekzamenante ŝin, ŝi ridete diris, “Ĉu vi scias, ke vi jam multe progresis post unu monato de lecionriparado. Videble, vi ne povas ne fari bone, sed ne volantas fari bone, ne volantas fari bone kun zorgemo.”

Mallevente siajn brovojn, Tingting eligis suspiron.

“Jen vi suspiras denove,” Fang priŝerce diris, “De kiu vi lernas pri suspiremado? De viaj gepatroj?”

“De mia patro — ah!” La knabino ekpensis pri io. Ŝi eltiris koverton el la librosako kaj transdonis ĝin al Fang, ridante, “Mi preskaŭ forgesis tion. Mia patro volas min doni al vi ĉi tion.”

“Kio estas tio?” Fang perplekse ricevis la koverton kaj malfermis ĝin. Troviĝis en ĝi staketo da dek 100-dolaraj monbiletoj. La rideto vanuis el ŝia vizaĝo. Rigardante al Bai Tingting, ŝi demandis, “Por kio estas ĉi tio?”

“Mia patro diris, ke vi ne senpage riparu miajn lecionojn. Ĉi tio estas dankesprimio, la pago por lecionoj.”

“La pago por lecionoj?” Fang ne povis reteni rideton. Ŝi enmetis la monbiletojn en la koverton kaj redonis ĝin al la knabino, dirante, “Redonu ĝin al via patro, ĉu bone? Diru al via patro, ke mi riparas viajn lecionojn ne por pago. Ne mankas al mi mono. Se vi pagas, ĉio iras nenature. Ĉu vi komprenas? Prenu ĝin hejmen!”

“Sed...” La knabino urĝeme diris, “Mia patro volis min transdoni ĝin al vi. Se mi reportas hejmen, mia patro koleriĝos.”

Fang ekstuporigiĝis. “Via patro...” ŝi heziteme demandis, “ofte koleriĝas kontraŭ vi?”

“Ne, ne!” La knabino laŭtvoĉe kriis, “Mia patro neniam koleriĝas kontraŭ mi, neniam! Li amas min, ĉu vi scias?” Ŝi eligis spiron kaj fikse rigardis al Fang. Kaj ŝi abrupte ŝanĝis sian tonon kaj diris softe, milde kaj infanece, “Hieraŭ estis mia naskiĝtago.”

“Ĉu jes?” Fang falis en alian stuporon, ne sciante, kion la knabino volas esprimi.

“Jes, mi mem forgesis pri tio.” La knabino rigardis al ŝi per paro da rondigitaj okuloj, honestaj kaj naivaj. “Kiam mi hejmenrevenis post lerneja kurso, mi vidis grandan tritavolan torton, kandelojn kaj florojn en la ĉambro, kaj mi ŝtoniĝis pro miro. Mia patro eklevis min en la aero kaj diris ‘Feliĉan naskiĝtagon, mia etulino!’” Eliginte alian spiron, la knabino montris senlimajn kontentecon kaj ĝojon. “Mia patro ĉiam nomas min etulino. La kaŭzo kial li nomas min tia, mi pensas, estas tio, ke li ne povas vidi mian altecon pro sia blindeco. Poste panjo metis en mian sinon tre belan skatolon ligitan per ruĝa silka banto. Instruistino Fang, divenu,” ekbrilis la okuloj de la knabino, “kio troviĝis en ĝi?”

“Do kio troviĝis ene?” Fang koncentriĝis en aŭskultado.

“Granda pupo!” diris la knabino anhelante. “Ĝi havas orajn longajn harojn, malfermeblajn kaj fermeblajn okulojn, blankan gazan jupegon. Ho, instruistino, vi ne povas imagi, kiel bela ĝi estas. Venontfoje, mi alportos ĝin al vi por pririgardi, ĉu bone? Ĝin mia panjo aĉetis persone en Taibei, ĉar ŝi scias, ke mi ŝatas pupojn. De mia infanaĝo, ŝi aĉetas multajn diverspecajn pupojn. Mi havas ŝrankon speciale kiel deponejon de miaj pupoj. Mi donas nomon al ĉiu pupo. Mi nomis nigran pupon karbeto kaj malbelan pupon pajaco. Nun divenu, kian nomon mi donis al tiu nova pupo.”

“Kian nomon?”

“Orbuklo. Ĉu la nomo estas bona? Se vi vidus ĝiajn orbuklon kaj platanon!”

“Bona nomo,” diris, Fang, gapante al ŝia vizaĝo plena je infaneco. Dum tiu momento, sur ŝia infaneca vizaĝo troviĝis neniom da plenkreskula melankolio, kiun ŝi legis antaŭe.

“Ĉar vi jam havas multe da pupoj, kial via panjo ankoraŭ donacis al vi pupon?”

“Kial!” La knabino alte levis siajn brovojn. “Se estas nur sola pupo, ĝi certe enuas. Ju pli multe, des pli bone, kompreneble. Tiel, ili povas ludi kune, manĝi kune kaj dormi kune kaj ne plu enuas.”

Fang kompateme rigardis al la knabino. Tio estas la ĉagreno de solnaskitaj infanoj!

“Ĉu vi ordinare sentas enuon, Tingting?” ŝi softe demandis.

“Ho, ne!” la knabino tuj respondis. “Mi ne sentas enuon. Panjo ĉiumomente

restas ĉe mi. Matene ŝi kombas kaj plektas al mi la harojn. Kvankam Yazhu ankaŭ povas helpi min kun harplektado, mia panjo mem faras tion, timante, ke ŝi dolorigas min. Poste ŝi akompanas min matenmanĝi, okule sekvas min ekster la pordon por iri al la lernejo. Nokte ŝi sidas ĉe mi, kiam mi faras hejmtaskojn, kaj zorgeme enlitigas min. Post mia endormiĝo, ŝi ankoraŭ zumas lulkanton...ho,” ŝi direktis sian ravitan rigardon eksteren de la fenestro. La brilo de feliĉo lumigis ŝian vizaĝon. “Ŝi estas la plej bona panjo en la mondo!”

“Ho,” kunmetinte sian atenton, Fang diris, “Estas via feliĉo havi tian panjon. Do, ni ne babilu pri via panjo. Elprenu vian lernolibron de aritmatiko!”

“Aj!” suspirinte, la knabino bedaŭreme eltiris sian rigardon el ekstere de la fenestro. Kvazaŭ petege, ŝi rigardis al Fang, dirante, “Ĉu necesas elpreni la libron? Ĉu vi ne ŝatas aŭskulti min?”

“Ho, mi ŝatas, Tingting,” tuj diris Fang, prenante ŝiajn manojn en la siajn. “Tamen, Tingting, lernado ankaŭ estas grava...” abrupte haltinte en parolado, ŝi gapis la ŝia paro da manoj. Ŝi surprizite kaj ekscitite vokis laŭtevoĉe, “Tingting!”

Bai Tingting subite surpriziĝis, kaj volis tuj eltiris siajn manojn, sed Fang jam firme prenis ilin, ne lasante liberiĝon de ŝiaj manoj.

“Tingting!” Fang anhelis, “Kio okazis al vi? Diru al mi, kio okazis.” Sur la palmoj, dorsoj kaj pojnoj de ŝiaj manetoj pleniĝis blurpurpuraj sangkovritaj kaj ŝveliĝintaj vundoj, videble kaŭzitaj de batado de io tia, kia punvergo. Nun, pro la firma prenado de Fang, ŝi sentis tian doloron, ke ŝi senĉese faris enspirojn, sed ŝi eltenis kaj brave rigardis al Fang. Ŝi klare diris, “Mi... stumble falis.”

“Stumble falis?” Fang ekkriis, ekscitite ekster si. “Ĉu stumblado povas kaŭzi tiajn vundojn? Tingting, vi prefere diru la mi la veron, alie mi kondukos vin al via patro. Mi volas scii, kio okazis!”

“Ne, instruistino!” La knabino surpriziĝis panike. Kaptante la instruistinojn, ŝi streĉe kaj petege kriis, “Ne, instruistino! Ne diru tion al mia patro! Mi petas! Instruistino, neniel faru tion!”

“Sed kio okazis al vi? Diru, diru al mi!” Fang, prenante ŝiajn ŝultrojn, skuis ŝin. “Ĉu iu batis vin? Ĉu iu malbone kondutis al vi? Diru!”

“Instruistino!” La knabino kolapsis psike. Ĉiuj kamuflaĵoj forlasis ŝin dum momento. Ŝi ekkriis triste, kaj larmoj rapide svarmis en ŝiajn okulkavojn. Kun pala vizaĝo kaj tremantaj lipoj, ŝi skuigis kiel falanta folio en frosta vento. Per voĉo petega kaj trista, ŝi kriis, “Mi petas, ke vi ne demandu plu! Ne demandu plu, mi petas, instruistino!”

“Ni iru!” Stariĝinte, Fang kaptis la knabinon. “Ni iru al via hejmo. Mi volas paroli kun viaj gepatroj!”

“Ne!” Kriante, la knabino ĉirkaŭbrakumis Fang-on. Kun sia larmokovrita

vizaĝeto en ŝia sino, ŝi diris plorsingultante, “Ne diru al mia patro, mi petas! Bona instruistino, mi petas vin! Mia patro scias nenion, li nenion scias. Li estas blinda kaj vidas nenion. Ne diru al li, alie li koleriĝos kaj ne povas elteni. La kuracisto diris, ke li ne povas koleriĝi, ĉu vi scias? Instruistino, mi petas, ke li ne sciiĝu pri tio. Panjo faris tion ĝuste por kolerigi lin... Ho, instruistino!” Ŝi firme enŝovis sian kapon en ŝian sinon, sufokiĝinte de plorsingultoj.

La koro de Fang krampiĝis. “Ĉu vi diris... vi diris...” ŝi haste spiradis, “ke via panjo faris tion? Ĉu ŝi batis vin?” ŝi demandis malfacile kaj nekredeme.

“Em, instruistino, nepre ne diru tion al mia patro! Ne diru al li, ĉu? Instruistino!” la knabino daŭre plorsingultis kaj petegis.

“Ho, Tingting.” Fang faris englutan de salivo kaj ekpalpebrumis: ŝi devas kvietigi sin unue. Levante ŝian mentonon, ŝi okule ekzamenis ŝian larmokovritan magran vizaĝon. Kiu scias, kiel granda ŝarĝo pezas sur la koro de ĉi tiu infaneto! “Diru al mi la veron. Mi promesas, ke mi ne diros al via patro,” ŝi diris, “Kiu batis vin? Ĉu via panjo?”

La knabino balancetis sian kapon.

Fang eksentis korpremon. Ŝi firme ekfermis siajn okulojn kaj forturnis la kapon. Post longa momento, ŝi returnis sian kapon kun larmoplenaj okuloj. “Tamen, vi ĵus diris, ke via panjo tre amas vin kaj ŝi estas la plej bona panjo en la mondo!”

“Instruistino!” petegis la knabino, kompatinde rigardante la instruistinon.

“Ĉion vi teksis, ĉu ne?”

La knabino refoje kapjesis.

“Ĉu via naskiĝtago?” Fang daŭre demandis, “Ankaŭ vi teksis, ĉu ne? Hieraŭ tute ne estis via naskiĝtago, ĉu?”

La infano honteme mallevis la kapon.

“Kial vi teksis ĉion ĉi tion?”

La infano restis senparola.

“Pro kio?”

Ŝia kapo kliniĝis pli malalten.

“Mi ne volas vin kredi, ke mia panjo ne amas min.” Ŝia voĉo flustre mallaŭtis. “Mi timas, ke vi diros tion al mia patro.”

“Ĉu via panjo ofte batas vin? Kial?”

La knabino levis siajn okulharojn. En la paro da okulplenaj pupiloj troviĝis melankolio de plenkreskulo. Dum momento, ŝia vizaĝeto, jam ne plu naiva nek infaneca, fariĝis prudenta, saĝa kaj matura.

“Vi certe scias, ke ŝi ne estas mia propra panjo,” ŝi diris malforte. Ŝia voĉo kvietigiĝis sen plendo, sen malamo. “Mi ne povas postuli al ŝi ami min kiel mia propra panjo, ĉu? Plie, mia patro malbone traktas ŝin kaj pro tio ŝi koleriĝas. Ŝi elverŝas

sian koleron sur min, tiel ke ŝi provokas koleron ĉe mia patro.” Skuinte sian kapon, ŝi, kun aminda kaj tolerema mieno, rigardis al Fang. “Mi ne donas al ŝi ŝancon. Mi ne lasas mian patron sciigi pri tio. Instruistino, gardu la sekreton por mi, ĉu bone?” La koro de Fang tordiĝis pro tio, kion la knabino rakontis, kaj ŝi sentis acidecon en la nazo. Kiel mizera infano! Kian pekon ŝiaj gepatroj faris, tiel ke la magra infano eltenas turmentojn korpe kaj psike! Ŝi zorgeme okulekzamenis la knabinon por longa tempo. Poste, ŝi firme altiris ŝin al sia sino kaj karesis ŝiajn suprajn harojn. Kun tremeto, ŝi diris, “Bone, Tingting, mi konsentas, ke mi ne diros tion al via patro, sed vi devas promesi, ke vi neniam mensogu al mi kaj diru ĉion al mi, ĉu?”

“Bone.”

“Kaj krome,” Fang sentis fridan tremon, “ne incitu vian panjon. Se ŝi volos bati vin, forfuĝu, forfuĝu foren, forfuĝu ĉe min. Ĉu vi komprenas? Stulta etulino! Ne lasu ŝin tuŝi vin, eĉ je unu fingro! Ĉu vi scias, Tingting?” La knabino kapleve rigardis al ŝi, kun okuloj plenaj de adoremo kaj amemo. Ĉar infanoj ĉiuj estas sensivaj kreitaĵoj, ili scias, kiu vere tenere amas ilin.

“Bone, instruistino,” ŝi diris. Per hezitema kaj malrapidema tono, ŝi daŭrigis, “Ne vin turnu al mia panjo, ĉu bone? Sciu, mia panjo ne estas malbona. Ŝi nur havas malbonan humoron. Ŝi ne meritas riproĉon, vi scias. Kelktempe paĉjo kverelegis kun ŝi, kaj li insultis ŝin,” fiera brilo montriĝis en ŝiaj okuloj, “ke ŝi ne estas milone bona ol mia propra patrino. Ve, se mia propra patrino ne mortus!” ŝi profunde suspiris kaj eksilentis.

Fang perplekse rigardis al la knabino. Kian familion ŝi havas? Ŝi ne volis profundigi en pripensado. Sed, kia infano ŝi estas?

“Instruistino!” Envenis Tingting, puŝmalfeminte la pordon de Fang. Dum la tagmeza tempdaŭro por ripozo, la instruistino dronis en kontemplado, kuŝante oblikve sur la lito.

“Por kio, Tingting?”

“Mia patro invitas vin al vespermanĝo ĉe ni ĉivespere. Li petas, ke mi irigu vin al nia hejmo, ĉu bone, instruistino?”

“Al vespermanĝo.” Fang stuporiĝis. “Kian aferon li havas por renkonti min? Ĉu estas speciala dato hodiaŭ?”

“Ne. Mia patro nur diris, ke li invitas vin al vespermanĝo.”

“Do, kial?” Fang enpense ridetis. “Kion vi diris al via patro pri mi?”

“Mi nur diris al mia patro, ke vi ŝatas min. Li pridemandis al mi multon, kaj mi diris ĉion al li.”

“Kion li pridemandis?”

“Li demandis, ĉu vi estas afabla, ĉu vi havas bonan temperamenton, kaj ĉu vi estas bela.”

“Kion vi diris?” demandis Fang ridetante.

“Mi diris,” la knabino, kun dolĉa rideto sur la vizaĝo, aliris al la litrando kaj ameme apogis sin al ŝi. “Mi diris, ke vi estas la plej bona, la plej afabla kaj la plej bela instruistino en la mondo!”

“Ho,” Fang nereteneble ridetis. “Kia infano!”

“Jen iru ĉe nin! Ĉu bone?” ŝi petis, skuante la brakon de Fang. “Iru, ĉu bone? Mia patrino ne estos hejme ĉivespere.”

“Ĉu via patrino ne estos hejme?” demandis Fang atenteme.

“Ŝi iris al Taizhong kaj revenos post tri tagoj.”

“Ĉu ŝi ofte forestas hejme?”

“Jes.”

Post momenta enpenŝiĝo, ŝi kapjesis, dirante, “Bone, mi iros.”

“Bonege!” hurais Tingting, montrante ĝojan kaj plezuritan mienon al Fang. Poste, ŝi abrupte ekhavis longan vizaĝon kaj singardeme diris, “Vi ne diskonigu la sekreton inter ni.”

“Kompreneble ne!” Fang diris, “Libera de zorgoj!”

“Bone. Do mi iros al vi ĉe irpozejo por instruistoj post lerneja kurso! Ni piediru rehejmen, nur kelkajn paŝojn fore.”

“Mi scias.”

La knabino ekridetis, ekscitita. Sin turninte, ŝi rapide elkuris. Longe post ŝia elkurado, Fang ankoraŭ sentis, ke en la ĉambro tintile ĉiŝ ŝia rida parolo: “Vi estas la plej bona, la plej afabla kaj la plej bela instruisto!”

Ekskuinte sian kapon, ŝi stariĝis el la lito kaj iris al la tualettablo. En la spegulo aperis enpenŝiganta kaj iome ĉagreniĝanta vizaĝo kaj paro da perplekaj kaj ĝenataj okuloj. Ekzamenante sin en la spegulo, ŝi nodiĝis siajn longajn harojn sur la verto per malnovtipa hartubero, surportis la okulvitrojn kaj delikate ruĝumis siajn lipojn... Ŝia mano ekhaltis en la aero. Alvizaĝe al la spegulo, ŝi maltrankvile kaj mokeme murmuris, “Kion vi faras nun, Fang Siying? Li estas blindulo! Li tute ne povas vidi vin!” Forĵetinte lipruĝigilon, ŝi peze sidiĝis en la seĝon kaj falis en deprimitan pripensadon.

(daŭrigota)



Fratoj Grimm (1785-1863, 1786-1859)



Fratoj Grimm

Ranoreĝo aŭ fera Henriko

En la malnovaj tempoj, kiam la deziroj ankoraŭ helpis, vivis reĝo, kies filinoj ĉiuj estis belaj, sed la plej juna estis tiel bela, ke la suno mem, kiu ja jam vidis tiom multe, miris ĉiufoje, kiam ĝi radiis sur ŝian vizaĝon. Proksime de la reĝa kastelo troviĝis granda malhela arbaro, kaj en la arbaro sub malnova tilio estis puto: se la tago estis tre varma, la reĝa infano iris eksteren en la arbaron kaj sidiĝis al la rando de la malvarmeta puto: kaj se ŝi

enuis, ŝi prenis oran kuglon, ĵetis ĝin en la ĉielon kaj rekaptis ĝin, kaj tio estis ŝia plej kara ludilo.“

Iam okazis, ke la ora kuglo de la reĝidino ne falis sur la manon, kiun ŝi tenis alte, sed apud ŝi trafis la teron kaj rekte ruliĝis en la akvon. La reĝidino sekvis ŝin per la okuloj, sed la kuglo malaperis, kaj la puto estis profunda, tiom profunda, ke oni ne vidis fundon. Jen ŝi komencis plori, kaj ŝi ploris pli kaj pli laŭte kaj tute ne povis konsoliĝi. Kaj kiel ŝi tiel lamentis, vokis iu al ŝi: „Kion vi intencas fari, reĝidino, vi ja krias tiel, ke ŝtono ekkompatas vin.“ Ŝi ĉirkaŭrigardis, de kie la voĉo aŭdigas sin, jen ŝi ekvidis ranon, kiu etendis sian grandan malbelan kapon el la akvo.

„Aĥ, estas vi, maljuna akvotretadulo“, ŝi diris, „mi ploras pri mia ora kuglo, kiun mi faligis en la puton.“

„Estu kvieta kaj ne ploru“, respondis la rano, „mi ja povas helpi al vi per konsilo, sed kion vi donos al mi, se mi eligos vian ludilon?“

„Tio, kion vi volas havi, kara rano“, ŝi diris, „miajn vestojn, miajn perlojn kaj juvelojn, aldone eĉ la oran kronon, kiun mi surhavas.“

La rano respondis: „Viajn vestojn, viajn perlojn kaj juvelojn kaj vian oran kronon mi ne ŝatas, sed, se vi amus min, kaj se mi estus via kunulo kaj ludkamarado kaj sidus ĉe via tablo apud vi, se mi manĝus de via ora telereto, se mi trinkus el via pokaletto, se mi dormus en via liteto; se vi tion promesos al mi, mi grimpos en la puton kaj reportos la oran kuglon.“

„Nu, jes“, ŝi diris, „mi promesas al vi ĉion, kion vi bezonas, se vi reportos la oran kuglon.“ Sed ŝi pensis: „Ja kion babilaĉas la ŝtipkapa rano? Ĝi sidas en la akvo ĉe

siaj samspecanoj kaj kvakas kaj ne povas esti la kunulo de homo.“

La rano, ricevinte la konsenton, enakvigis siajn kapon kaj korpon kaj sinkis malsupren, kaj post certa tempo ĝi kvazaŭ remante moviĝis supren, ĝi havis la kuglon en la buŝo kaj jetis ĝin sur la herbejon. La reĝidino estis plena de ĝojo, kiam ŝi revidis sian belan ludilon, ŝi levis ĝin kaj forsaltis kun ĝi. „Atendu, atendu“, vokis la rano, „kunprenu min, mi ne povas kuri tiel rapide kiel vi.“ Sed tio tute ne helpis al ĝi, ke ĝi postkriis al ŝi sian „kvak kvak“, tiom laŭte, kiom ĝi povis! Ŝi ne atentis ĝin, rapide kuris hejmen kaj baldaŭ forgesis la kompatindan ranon, kiu en la puto denove devis grimpi malsupren.

Je la alia tago, kiam ŝi sidiĝis kun la reĝo kaj ĉiuj korteganoj ĉe la tablo kaj manĝis de sia ora telereto, io grimpis sur marmorŝtuparo alten, klak plaŭ, klak plaŭ, kaj kiam ĝi alvenis supren, ĝi frapis la pordon kaj vokis: „Reĝidino plej juna, malfermu por mi.“ Ŝi kuris tien kaj volis vidi, kiu staras ekstere, sed kiam ŝi malfermis la pordon, sidis la rano antaŭ ĝi. Jen ŝi haste klakfermis la pordon, sidiĝis denove al la tablo kaj estis plena de timo. La reĝo evidente vidis, ke ŝia koro tre frapas kaj parolis: „Infano mia, kial vi timas, ĉu eble staras giganto antaŭ la pordo kaj volas kunpreni vin?“

„Ho ne“, ŝi diris, „ne estas giganto, sed abomena rano.“

„Kial la rano venis al vi?“

„Aĥ, kara patro, kiam mi sidis hieraŭ en la arbaro ĉe la puto kaj ludis, falis mia ora kuglo en la akvon. Kaj ĉar mi tiom ploris, la rano eligis ĝin de la puto, kaj ĉar ĝi fakte postulis tion, mi promesis al ĝi, ke ĝi fariĝu mia kunulo, sed mi tute ne pensis, ke ĝi povas foriri de sia akvo. Nun ĝi estas ekstere kaj volas eniri al mi.“



Reĝidino plej juna,
malfermu por mi.“

Jen diris la reĝo: „Tion, kion vi promesis, vi devas plenumi; iru do, kaj malfermu por ĝi.“ Ŝi foriris kaj malfermis la pordon, jen la rano saltis internen, ĉiam sekvante

Dum tio la rano

frapis duan fojon kaj
vokis:

„Reĝidino plej juna,
malfermu al mi,
ĉu vi ne plu scias,
kion hieraŭ vi diris
al mi
ĉe la malvarmeta
puta akvo?“

ŝin, ĝis ŝia seĝo. Tie li eksidis kaj vokis: „Levu min supren al vi.“

Ŝi hezitis, ĝis fine la reĝo ordonis ĝin. Kiam la rano jam estis sur la seĝo, ĝi volis esti sur la tablo. Kaj kiam ĝi sidis tie, ĝi parolis: „Ŝovu nun vian oran telere-ton pli proksimen al mi, por ke ni manĝu kune.“

Tion ŝi ja faris, sed oni vidis, ke ŝi ne faris tion volonte. La rano manĝis kun apetito, sed al ŝi preskaŭ ĉiu mordetaĵo firmkroĉiĝis en la kolo.

Finfine ĝi parolis: „Mi satmanĝis kaj estas laca, portu min nun en vian ĉambregon kaj pretigu vian silkan liteton, jen ni kuŝigu por dormi.“

La reĝa filino komencis plori kaj timis pro la malvarma rano, kiun ŝi ne kuraĝis tuŝi, kaj kiu nun volis dormi en ŝia bela pura liteto. Sed la reĝo ekkoleriĝis kaj parolis: „Tiun, kiu helpis al vi, kiam vi estis en mizero, ne malestimu poste.“

Jen ŝi kaptis ĝin per du fingroj, portis ĝin supren kaj sidigis ĝin en angulon. Sed, kiam ŝi kuŝis en la lito, ĝi rampis al ŝi kaj parolis: „Mi estas laca, mi volas dormi tiel bone, kiel vi. Levu min aŭ mi diros tion al via patro.“

Jen ŝi fariĝis tre malica, levis ĝin kaj jetis ĝin per ĉiuj fortoj kontraŭ muron: „Nu vi havos pacon, abomena rano.“

Sed kiam ĝi falis malsupren, ĝi ne plu estis rano, sed reĝofilo kun belaj kaj afablaj okuloj. Tiu nun estis laŭ la volo de ŝia patro ŝia kunulo kaj edzo. Tiam li rakontis al ŝi, ke malica sorĉistino ensorĉis lin, kaj neniu krom ŝi povis savi lin el la puto, kaj je la sekva mateno ili volis iri en lian regnon. Poste ili endormiĝis kaj je la sekva mateno, kiam la suno vekis ilin, estis veturigata kaleŝo al ili, kun ok blankaj jungitaj ĉevaloj, kiuj havis blankajn strutajn plumajn tufojn sur la kapo kaj iris en ora ĉena jungilaro, kaj malantaŭe staris la servisto de la juna reĝo, tiu estis la fidela Henriko. Kiam lia mastro estis transformita en ranon, la fidela Henriko tiom afliktiĝis, ke li devis meti tri ferajn bendojn ĉirkaŭ sian koron, por ke ĝi ne dissaltu pro doloro kaj malĝojo. La kaleŝa veturigisto havis la taskon veturigi la junan reĝon en ties regnon; la fidela Henriko ambaŭ levis en la kaleŝon, denove malantaŭe starigis sin kaj estis plena de ĝojo pri tiu savo. Kaj kiam ili estis veturintaj certan vojdistancon, aŭdis la juna reĝo, ke io krakas post li, kvazaŭ io rompiĝus. Jen li turniĝis kaj vokis:

„Henrik', la kaleŝ' rompiĝas!“

„Ne, sinjor', ĝi plu moviĝas!“

Falis nur bend' de mia koro

post sufero en doloro,

kiam vi en puto restis,

ĉar vi tiam rano estis.“

Krakis ankoraŭfoje kaj ankoraŭfoje survoje, kaj la juna reĝo ĉiam pensis, ke rompiĝas la kaleŝo. Kaj tamen estis nur la bendoj, kiuj saltis de la koro de la fidela Henriko, ĉar lia mastro estis savita kaj feliĉa.

Kato kaj muso kiel kunuloj

Kato konatiĝis kun muso kaj antaŭ ĝi babilis tiom multe pri sia granda amo kaj amikceco, kiun ĝi laŭdire sentas pri ĝi, ke la muso fine konsentis vivi kun la kato en la sama domo en komuna mastrumado.

Kato konatiĝis kun muso kaj antaŭ ĝi babilis tiom multe pri sia granda amo kaj amikceco, kiun ĝi laŭdire sentas pri ĝi, ke la muso fine konsentis vivi kun la kato en la sama domo en komuna mastrumado.

„Sed por la vintro ni devos prepari nin, alie ni suferos malsaton“, diris la kato, „vi, museto, ne povus kuraĝi iri ĉien, ĉar fine vi kurus en muskaptilon.“

Pro tiu bona konsilo ili aĉetis poteton plenon de graso. Sed ili ne sciis, kien meti ĝin. Lastfine, post longa pripensado, diris la kato: „Mi ne scias iun alian lokon, kie ĝi pli bone konserveblus ol en la preĝejo, tie neniu kuraĝas forpreni ion: „Ni metos ĝin sub la altaron kaj ne tuŝos ĝin, ĝis kiam ni estos en bezono.“



La poteto do estis sekurigita, sed ne daŭris longan tempon, ĝis kiam la kato ekhavis apetiton je ĝi kaj ĝi parolis al la muso: „Kion mi volas diri al vi, museto, mi estas petita de mia kuzino kiel baptopatro, ĝi naskis filon,

blankan kun brunaj makuloj, mi tenu la idon super la baptujo. Lasu eliri min hodiaŭ kaj zorgu sola pri la domo.“

„Jes, jes“, respondis la muso, en la nomo de Dio, foriru, se vi manĝos ion bonan, pensu pri mi: de la dolĉa ruĝa vino por la juna patrino, kiu post la nasko ankoraŭ ripozas en la infan-lito, mi volonte trinkus guteton.“

Sed ĉio ĉi estis mensogo. La kato ne havis kuzinon kaj ne estis petita veni kiel baptopatro. Ĝi iris rekte al la preĝejo, ŝteliris al la grasopoteto, komencis leki kaj forlekis la grasan haŭton. Poste ĝi promenis sur la tegmentoj de la urbo kaj pripensis la bonŝancan aferon, poste ĝi etendiĝis en la suno kaj viŝadis sian barbon, tiom ofte, kiom ĝi pensis pri la grasopoteto. Nur kiam estis vespero, ĝi revenis hejmen.

„Nu, jen vi ja estas denove“, diris la muso, „vi certe havis gajan tagon.“

„Estis sukceso“, respondis la kato.

„Kaj kiun nomon ricevis la infano?“ demandis la muso.

„Haŭtofor“, diris la kato tute seke.

„Haŭtofor“, vokis la muso, „tio estas ja miriga kaj stranga nomo, ĉu ĝi estas kutima

en via familio?“

„Ja kio ĝenas vin pri ĝi?“ diris la kato, „ĝi ne estas pli malbona ol paneroŝtelisto, jen tiel, kiel nomiĝas via baptopatro.“

Ne longe poste la kato denove ekhavis apetiton. Ĝi parolis al la muso: „Vi devas ankoraŭfoje fari grandan komplezon al mi kaj sole mastrumadi la domon, mi estas je dua fojo petita iri kiel baptopatro, kaj ĉar la infano havas blankan ringon ĉirkaŭ la kolo, mi ne povas rifuzi tion.“

La bonkora muso konsentis, sed la kato ŝteliris post la urbomuro al la preĝejo kaj je duono manĝis la enhavon de la grasopoteto. „Nenio gustas pli bone ol tio“, ĝi diris, „kion oni mem manĝas.“ Kaj ĝi estis tute kontenta pri sia taga agado. Kiam ĝi revenis hejmen, demandis la muso: „Kiun nomon ricevis la infano dum la baptado?“



„Duonfor“, respondis la kato.

„Duonfor, ĉu?! Neimageble, la nomon mi ankoraŭ neniam aŭdis, mi vetas, ke ĝi ne legeblas en kalendaroj.“

La buŝo de la kato baldaŭ denove plenigis sin per salivo pro la frandaĵo. „Ĉiuj bonaj aĵoj triopas“, ĝi parolis al la muso, „tial mi denove helpu kiel baptopatro, la infano estas tute nigra kaj havas nur blankajn piedojn, krome neniun blankan haron sur la tuta korpo, tio okazas dum kelkaj jaroj nur unufoje, vi ja lasos eliri min, ĉu?“

„Haŭtofor! Duonfor!“ respondis la muso, „jen tre kuriozaj nomoj, ili faras min tute pripensema.“

„Nu, vi sidas hejme en via malhele griza felvesto kaj kun via longa vostornamo“, parolis la kato, „kaj tial vi fariĝas kaprica: jen la sekvo de tio, se oni ne eliradas dum helaj tagoj.“

La muso dum la malĉeesto de la kato reordigis la domon kaj repurigis ĝin, sed la frandema kato elmanĝis la tutan grasopoteton. „Se iam ĉio estas manĝita, oni ekhavas trankvilon“, ĝi diris al si mem kaj malfrue nokte revenis sata kaj dika hejmen.

La muso tuj demandis pro la nomo, kiun ricevis la tria infano.

„Certe ankaŭ tiu ne plaĉos al vi“, diris la kato, „ĝi nomiĝas Tutefor.“

„Tutefor“, kriis la muso, tio estas la plej suspektiga nomo, presite ĝi ankoraŭ ne aperis al mi, Tutefor, kion tio signifu?“ Ĝi skuis la kapon, kunruliĝis, kaj sternis sin por dormi.

De tiam neniŭ plu volis peti, ke la kato venu kal baptopatro. Sed kiam komenciĝis la vintro kaj ekstere nenio plu estis trovebla, la muso pensis pri ilia provizo kaj parolis: „Venu, kato, ni iru al nia poteto kun graso, kiun ni ŝparadis, ĝi bongustos al ni.“

„Jes ja“, respondis la kato, „ĝi gustos al vi kvazaŭ vi elpendigus vian delikatan langon el la fenestro.“

Ili survojiĝis, kaj kiam ili atingis la poteton, ĝi, estas vere, estis ankoraŭ je sia loko, sed ĝi estis malplena.

„Aĥ“, diris la muso, „nun mi rimarkas, kio okazis, nun la kaŝita montriĝas enlume, vi estas ja vere amikema! Vi ĉion forman-ĝis, jen kiel vi agis kiel baptopatro: Unue la haŭton for, poste duonon for, tiam...“

„Silentu“, kriis la kato, „ankoraŭ unu plian vorton kaj mi manĝos vin.“

„Tutefor“, havis la muso jam sur sia lango, kaj apenaŭ ĝi elestis, la kato saltis al ĝi, kaj formanĝis ĝin. Tion sciŭ, tiel iras en la mondo.

Originalo: Katze und Maus in Gesellschaft

Fonto: Jakobo kaj Vilhelmo Grimm: Infan-kaj domfabeloj, Eldono lastmana, eldonejo Reclam tradukis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser

kontrolis Vladimir Türk



elgermanigis Dorothea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio)

Anonima

Stranga songŝvendanta aŭtomato

Reverkis **Lin Bin** laŭ interreta materialo

Kun malplena cerbo mi sidis antaŭ la komputilo. Inspiro abrupte fulmas tra mia cerbo. Apenaŭ mi pretis alklaki la klavaron, aŭdiĝis senpaciencaj frapoj sur la pordo. Mi ekhavis malbonaŭguran senton.

Vere, kiel mi atendis, la domposedanto staris ĉe la pordo kolere kaj senhelpe. Li intence trenis la voĉon, “Kiam diable vi pagos al mi renton?”

“Baldaŭ. Ĝis kiam mia honorario de ĉi monato estos sendita al mi...” Kun trudita rideto mi forpuŝis lin eksteren. Sed kiam mi denove sidiĝis antaŭ la komputilo, la malfacile akirita inspiro jam malaperis.

Anstataŭ ĝenite sidi antaŭ la komputino en stuporo, mi volis promenis eskter la apartamento.

Enpenseme mi malrapide malsupreniris laŭ la ŝtuparo. La momenton, kiam mi iris al la pordo, min trafis nigra ombro. Mi levis la kapon kaj vidis aŭtomaton oni ne scias kiam ĝi staris antaŭ la pordo.

Hazarde mi soifis. Mi elpoŝigis monbileton kaj ŝovis ĝin en la maŝinon. Tiam mi trovis, ke troviĝas neniam prembutoj sur ĝi. Tuj kiam mi volis repreni la bankbileton, mi trovis linion da nigraj vortoj sur ĝi: Vi estas bonvena uzi songŝvendantan aŭtomaton; ŝovu bankbileton kaj faru voton.

“Kia trompaĉo! Mi reprenu la monon!” Kvankam mi pensis tiel, mi tamen ne reprenis la monon. Dirinte “Se mi ne pagus la renton!” mi turnis min al mia ĉambro.

Mi estis verkemulo, vivante de inspiro kaj nokto.

Tiun nokton mi dronis en profunda dormo kaj subite vekigis de hastemaj pordfrapoj.

“Kiu tio estas?” Mi malkontente malfermis la pordon kaj tuj ŝtoniĝis. La najbaro staris ĉe la pordo konfuzite, “Malbone, fajrego ekestas sub la etaĝo!”

Kiam ni atingis tien, ni trovis multajn apudrigardantojn. El la serioze bruligita ĉambro oni elportis nigre karbigitan kadavron.

“Hej, frato, kiu ĉambro bruliĝis? mi demandis apudstaranton.

“Ĉu vi ne scias? Estas Maljuna Liu. La supra ĉambro ankaŭ apartenas al li!”

Mi kaŝe surpriziĝis. Jen li estas domposedanto! Mi tuj ekpensis pri la stranga songvendanta aŭtomato. Mi ĵetis ekrigardon al la pordo, sed tie troviĝis nenio.

Eble tio estas koincido, mi konsolis min. Tamen pro la morto de la domposedanto mi vere liberiĝis de la renta ĝeno dum la mallonga tempo. Ĉu tiu aŭtomato vere realigus la revon?

Nokte mi jam ne havis humoron verki. Tuj post la dekdua, kiel hieraŭ nokte, mi ŝtele eliris la apartementon laŭ la ŝtuparo. Ĉe la voĵturniĝo mi denove vidis la misteran aŭtomaton. Senhezite mi elpoŝigis bankbileton kaj ĝin enŝovis, esperante, ke inspiroj fontos senĉese ĉiunokte.

Reveninte la ĉambron, mi senprokraste sidiĝis antaŭ la komputilo. Apenaŭ mi metis la manojn sur la klavaron, unu rakonto post alia disvolviĝis en mia cerbo. Kun ekscito mi verkis tra la tuta nokto kaj sendis miajn verkojn al la redaktoro.

“Hej, ĉu vi mem verkis ilin?” La duan tagon mi ricevis la mesaĝon de la redakcio.

“Jes, kio okazis?” Mi eksentis streĉitecon en la koro. Ekster mia atendo la redaktoro agitite sciigis al mi, ke tiuj verkoj, kiujn mi verkis lastnokte, ĉiuj estas akceptitaj, kaj krome la ĉefredaktoro laŭdis pro mia bona stilo kaj pretis malfermi rubrikon speciale por mi.

Retenante mian ekscitecon mi finis la interparolon per kelkaj modestaj vortoj. Tiam mia amiko Azhen telefonis al mi, “Ayu, ni drinku ekstere ĉinokte. Mi pagos.” Ankaŭ Azhen estis verkemulo kiel mi, sed lia sorto estis malpli bona ol la mia. Informiĝinte el la redakcio, ke miaj verkoj estas sinsekve akceptitaj, li regaligis min por peti la arkanon, kiel miajn verkojn akceptis la redakcio.

“Kiel mi povus havi arkanon? Nur bonŝanco min kaptas!” mi sputis malzorgeme.

“Hehe, vi povas trompi la aliajn nur per via povraj scioj. Ĉu vi povus sukcesi trompi min? Estu trankvila. Ni estas la homoj de la sama speco. Mi ne malkaŝos ĝin al la aliaj!” Videblis petemo en liaj okuloj.

Mi volus teni la sekreton, sed mi ne scias kial mi malkaŝis al li la sekreton de songvendanta aŭtomato.

Kiam mi revenis al la apartamento, jam regis nepenetrebla mallumo. Mi ŝancelpaŝe suriris la ŝtuparon, kaj subite mi ekhavis la premantan senton de gvatito. Turninte la kapon, mi preskaŭ stumbe falis teren pro timego... Nigra ombro sin apogis sur la balustradon kaj elŝovis duonon de sia vizaĝo tra fendo inter kolonetoj, min gvitante sen palpebrumi.

“Kion vi faras? Vi timigas min terure!” mi plendis kun mano premante sur la brusto.

Li eliris el la mallumo, vestite en luksa nigra eŭropstila kostumo, kiu ne kongruis kun la kaduka ŝtupara irejo.

“Sinjoro, ĉu vi jam uzis nian produkton — la songvendantan aŭtomaton?”

“Jes ja,” mi estis iom nervoza.

“Pro tio, ke la maŝino troviĝis en la testa stadio, via dufoja uzado de ĝi estas senpaga. Sed de ĉinokte, se vi ree uzos ĝin, ni pagigos vin per kelka mono.”

Li diris al mi, ke oni pagigos min per du manieroj: la unua estas pagi laŭ la proporcio de la realigita deziro kaj la dua... Antaŭ ol li finos la duan, mi jam krie forpelis lin.

Nun al mi mankas nenio. Probable mi ne plu uzos tiun strangan maŝinon.

Tamen la ŝanĝiĝo de la afero estas malpli simpla ol ke mi imagas. En la mondo neniam disponeblas senpaga tagmanĝo.

Tiun tagon mi alklakis la klavaron tra la tuta nokto. Mi apenaŭ enlitiĝis por dormi, kiam telefonvoko alvenis. Estis Azhen, kiu turnis sin al mi. Mi supozis, ke li diros dankon al mi pro mia helpo. Sed sonis lia panika kaj malespera voĉo, “Ayu, kia estas umo, kiun vi priparolis?”

Mi ekstuporis, “Kio? Ĉu vi ne trovis la sonĝvendantan aŭtomaton?”

“Jes, mi jam ĝin trovis, sed... lasu do. Venu al mia hejmo post kelka tempo.”

Post duonhoro mi atingis lian hejmon. La pordo estis duone malfermita. Mi zorgeme donis frapojn al la pordo. Lia raŭka voĉo aŭdiĝis en la mallumo, “Eniru.”

Ĉe la pordo min atakis ondo da sangaodoro.

“Kie vi troviĝas?”

Ombro envolviĝis en la sofo ĉe murangulo. Li senforte svingis la manon, signante, ke mi ŝaltu la lampon.

La momenton, kiam la lamplumo verŝis super la kapon, mi preskaŭ eskapis pro timego el lia hejmo... Lia korpo plenis je falantaj kavoj, lia haŭto sekiĝis, kvazaŭ muskoloj perdiĝus el sub la haŭto kaj nur tavolo da haŭto alkrociĝus al la ostoj. Des pli, ke liaj okuloj sin kaŝis en la profunde falantaj okulkavoj, donante la impreson, ke li estas vivanta skeleto.

“Kiu estas vi?” mi demandis viglatenteme.

“Mi ja estas Azhen!” Okazis, ke li, laŭ mia indiko, malsupre de etaĝo promenis post la nula horo kaj vere trovis la strangan sonĝvendantan aŭtomaton oni ne scias de kie. Lia voto same realiĝis, sed estis strange, ke lia korpo rapide malfortiĝis kaj post nur kelkaj tagoj li fariĝis tia, kia li estas nun.

“Tiu maŝino funkcias fantomece!” li diris malfacile. Subite li eligis dolorplenajn ĝemojn kaj tuj poste tristajn kriojn.

Mi ne eltenis tiun scenon plu kaj forkuris de la terura loko. La sonĝvendanta aŭtomato solece briletis sube de la apartamento. Post iom da hezitemo mi faris decidon.

Elpoŝiginte bankbileton kaj enŝoviginte ĝin, mi mallaŭte diris, “Mortigu Azhen!” Antaŭ ol mia diro malaperis, mi subite eksentis fortan doloron malantaŭ mia kapo kaj mi falis teren molaĉa.

Antaŭ miajn okulojn sin trudis maldika kaj velkinta figuro. Kun surprizo mi trovis, ke li estas Azhen, kiu ĵus ŝajnas mortanto pli ol la vivanto.

“Estas vere, ke vi volas mortigi min,” li diris triumfe, kun stranga rideto flosanta sur la osteca vizaĝo.

“Ne, ne miskomprenu. Mi volas fari tion nur por liberigi vin el la sufero,” mi penis klarigi.

“Hm, ne afektu. Fakte mi fariĝis tia tute ne pro la sonĝvendanta aŭtomato. Neniu kredas viajn mensogojn. Ĉu la damnda maŝino povus realigia mian sonĝon?”

Nun mi surpriziĝis, “Do... kiel vi...”

“Fakte mi grave malsanas jam sen espero kaj tuj mortos. Mi tre envias vin pro viaj atingoj, kaj samtempe mi tre timas vin. Ĉar mi plagiatis viajn inspirojn, alie vi jam frue vivus bone pli ol mi. Komence mi nur volis sondi vin, mi ne imagis, ke vi vere volas min mortigi. Se tiel, mi preferas bati vin la unua...”

“Ne, mi jam frue forgesis tion!”

Vidinte, ke li levprenis brikon el la tero, mi eksentis ondon da timo.

Li jam donis nenian atenton al mi. Li, kun briko en la mano, preme alproksimiĝis al mi. Ĝuste dum tiu momento li abrupte dolore kovris la bruston per la mano, kaj lia korpo komencis tordiĝi. Akompanate de la bruo de la osta rompiĝo, liaj kvar membroj kurbigis forte ĝis lia korpo ŝrumpiĝis al ronda bulo.

Vidinte, ke li ne plu moviĝas, mi eligis faciligitan spiron.

“Saluton, sinjoro,” alŝvebis frida kaj iom sarkasma voĉo de malantaŭe. Mi turnis min kaj vidis tiun homon en eŭropstila kostumo.

“Ĉu vi havas aferon?” mi ŝajnis min trankvila.

“Sinjoro, dankon pro via refoja uzo de nia maŝino. Nun vi devas pagi respondantan koston. Per kiu maniero vi elektas pagi?”

“Ah? Kiom mi devas pagi?”

“Li maksimume havas unu jaron da vivo. Do vi devas pagi laŭ la dekonon de liaj ekzistantaj tagoj. Ni bezonas depreni tridek ses tagoj el via vivo...”

Nur tridek ses tagojn! Tuj kiam mi malstreĉiĝis, mi aŭdis lin diri, “Sume dek kvar jarojn el via vivo.”

“Kio? Kial tiom multajn?” mi surpriziĝis.

“Ĉar li volis mortigi vin per la sonĝvendanta aŭtomato specialan por vi, sed li nun jam mortis, tial ni devas kalkuli ĉi tiun konton kaj ŝuldiĝi ĝin al vi. Vi ankoraŭ povas vivi ĉirkaŭ sep dek jarojn. Laŭ la ĵusas kalkulado vi devas pagi duoble, t.e. la sumo estas dek kvar jaroj da vivo.”

Kia absurdaĵo! Mi kolere min turnis por foriri.

“Do, vi rifuzas pagi laŭ la unua maniero?” La viro malice ekridetis, “Ŝajnas, ke vi volas elekti la duan manieron por pagi?”

Antaŭ ol li finis la eldiron, mi jam sentis, ke mia korpo rapide dilatiĝas kaj miaj okuloj nigriĝas, kaj mi tuj perdis konscion.

Kiam mi vekigis, mi trovis, ke mi jam fariĝis pezega sonĝvendanta aŭtomato staranta solece antaŭ antikveca apartamento. Se vi atenteme rigardas mian maldekstre supran angulon, vi trovas linion da malgrandaj vortoj: sepdek jaroj de uz-periodo.

Zhu Ziqing (1898-1948)



Ĉe la Vido de l' Patra Dorso

Pasis jam pli ol du jaroj post kiam mi lastfoje vidis mian patron, la vidon de ties dorso mi neniam povas forgesi. Tiun vintron forpasis mia avino kaj mia patro perdis sian laboron. Malfeliĉo neniam iras unuope. Mi veturis el Pekino rekte

aŭtoro, Zhu Ziqing

Xuzhou-on por alrapidi hejmen por la funebraĵoj kune kun la patro. Kiam mi vidis lin en Xuzhou kaj la malordon en la korto, mi ekpensis pri la avino kaj ne povis min deteni de larmoj. La patro diris, “Nun kiam la afero estas tiela, ne estu tiel afliktita. Feliĉe la ĉielo neniam fermos al ni ĉiujn elirejojn!”

Hejmen reveninte, la patro forvendis siajn posedaĵojn al la lombardejo kaj pagis sian ŝuldon. Li ankaŭ pruntis monon bezonatan de la funebraĵoj. Tiujn tagojn la vivo en la familio estis tre malfacila, duone pro la funebraĵoj kaj duone pro la senokupeco de la patro. Li volis veturi al Nankino por serĉi laboron tie post la funebraĵoj kaj mi estis revenonta al Pekino por studado, tial ni kune ekiris.

Kiam ni atingis Nankinon, kelkaj amikoj invitis min promeni kun ili en la urbo la tutan tagon. En la sekvanta antaŭtagmezo mi devis prame transiri trans la riveron Jangzi al Pukou kaj veturi norden posttagmeze. Mia patro diris, ke li estas tro okupita por adiaŭi min en la fervoja stacidomo, sed anstataŭe, li petis kelneron, kiun li bone konas, akompani min tien. Li postulis la kelneron fojfoje, eĉ zorgeme, ke li prizorgu min, sed ĉiamaniere la patro ne povis esti trankvila kaj timis, ke tio ne taŭgos. Li ja hezitis por momento. Efektive, nenio min gravis, ĉar tiun jaron mi estis jam 20-jara kaj jam plurfoje veturis inter Pekino kaj hejmloko. La patro daŭre hezitis kaj finfine decidis, ke li mem akompanu min tien. Mi plurfoje konsilis al li tion ne fari, li tamen nur diris, “Tio ne gravas. Ili ne taŭgos por tien iri!”

Transirinte Jangzion, ni eniris en la fervojan stacidomon. Dum mi aĉetis la bileton, la patro zorgis pri miaj pakajoj. Estis tro da pakajoj, ke li devu doni al la portistoj dankmonon kaj eĉ marĉandis kun ili. Min kredante saĝa, mi ne aprobis lian manieron marĉandi, sed nepre devis intermeti miajn vortojn. Poste la prezo estis interkonsentita, la patro akompanis min en la vagonon. Li elektis por mi seĝon apud la pordo. Mi pretigis la sidlokon per purpura pelta palto, kiun li petis tajloron fari

por mi. Li rekomendis al mi esti singarda dumvoje kaj zorgema dumnokte por ne esti trafita de malvarmumo. Li ankaŭ petis stevardon bone prizorgi min. Mi subridis je lia pedanteco, ĉar estis tutvane konfidi min al tiuj stevaroj, kiuj zorgas nur pri mono! Krome, ĉu tiu, kiu estas samaĝa kiel mi, ne povis sin prizorgi? Ho, kiam mi ekpensas tion hodiaŭ, mi tuj konscias, kiom tromemfida mi estis tiam!

Mi diris, “Paĉjo, vi povus reiri.” Li rigardis eksteren tra la fenestro, dirante, “Mi iru aĉeti kelkajn mandarinojn. Restu ĉi tie kaj ne moviĝu ĉirkaŭen.” Mi rimarkis kelkajn vendistojn atendantajn klientojn ekster la palisaro de la platformo. Tiuj, kiuj volas atingi la platformon, devas transiri la fervojojn, saltante malsupren kaj grimpante supren. Estis certe penige por la patro tion fari, ĉar li estis dika. Mi volis mem tion fari, sed li min haltigis. Tial mi povis fari nenion alian, ol lasi lin iri. Mi rigardis la patron, kiu portas vertoĉapon, nigratolan mandarenan jakon kaj malhele bluan vatitan robon, ŝancelpaŝe iri ĝis la fervojojn. Li ne multe sin ĝenis malsupreniri al la fervojoj, sed pli multe sin ĝenis suprengrimpi sur la platformon. Li tenis la supraĵon de la platformo per siaj manoj kaj suprentiris siajn krurojn. Lia dikventra korpo kliniĝis iomete liven, evidente farante al li penegon. Ĉe la vido de lia dorso larmoj elverŝiĝis el miaj okuloj. Mi rapide ilin forviŝis, pro timo ke la patro kaj aliaj tion rimarku. Kiam mi refoje rigardis eksteren tra la fenestro, la patro jam revenis portante ruĝajn mandarinojn en la manoj. Kiam li transiris la fervojojn, li unue metis la mandarinojn sur la teron, lante malsuprengrimpis al la fervojoj, prenis denove la mandarinojn kaj ekiris. Kiam li alproksimiĝis al la trajno, mi rapidis por subteni lin per miaj manoj. Envagoniĝinte kun mi, li metis ĉiujn mandarinojn sur mian palton. Frapforigante la polvon de sur sia vesto, li ŝajne sentis sin iom malstreĉita kaj diris poste, “Mi devas foriri do. Memoru, ke vi skribu al mi de Pekino!” Mi rigardis al lia dorso kiam li elvagoniĝis. Moviĝinte kelkajn paŝojn, li sin turnis al mi kaj diris, “Reiru al via sidloko. Neniu tie prizorgas viajn posedaĵojn.” Mi ne reiris al mia sidloko antaŭ ol lia figuro malaperis en la homamaso iranta tien kaj reen kaj ne plu videblis. Larmoj restaris en miaj okuloj.

En la lastaj kelkaj jaroj, mia patro kaj mi ambaŭ nin pelis pro peco da pano, sed la cirkonstancoj de nia familio pli kaj pli malboniĝis. La patro forlasis la hejmon por perlabori vivrimedojn en sia frua juneco kaj plenumis nemalmultajn gravajn taskojn per si mem. Kiu do povus atendi, ke li fariĝis tiel deprimita en sia maljuneco! Je la eksento de sia malĝojo li nature ne povis sin regi. Lia emocio ŝtopita certe devis elverŝiĝi; tial kialis, ke mastrumaj bagateloj ofte lin koleris kaj li ne traktis min tiel bone kiel antaŭe. La disiĝo en la lastaj du jaroj pardonigis al li miajn kulpojn. Li nur pensis pri mi kaj mia filo. Post kiam mi atingis Pekinon, li sendis al mi leteron, en kiu li skribis,

“Mi fartas bone krom tio, ke mia brako min severe doloras. Mi uzas manĝbastonetojn aŭ penikon eĉ kun ĝeno. Eble jam ne malproksima estas la tago kiam mi forlasos tiun mondon.”

Brilaj larmoj, kiujn tiuj vortoj alportis al miaj okuloj, vidigis al mi denove la dikan dorson kun blua vatita robo kaj nigratola mandarena jako. Ho, mi ne estas certa, kiam mi povus lin denove vidi!

En Pekino, oktobre 1925

Printempo

Post longa sopirado kaj atendado, la orienta venteto alvenas, anoncanta la alproksimiĝon de la printempaj paŝoj.

Ŝajnas, ke ĉio ĵus vekigis, malfermante siajn okulojn kun plezuro. Klariĝas kaj malsekiĝas la montoj, leviĝas la akvo kaj ekradias la vizaĝo de la suno.

Herbetoj elŝoviĝis el la tero preteratendite, delikataj kaj smeraldaj. Ili etendiĝas ĉie en la ĝardenoj kaj sur la kampoj se vi rigardas ĉirkaŭen. Oni tie sidas, kuŝas, aŭ de tempo al tempo sin rulas, piedludas pilkon, vetkuras kaj ĝuas kaŝludon. La brizo trapasas senbrue kaj la herbetoj estas molaj.

Persikarboj, abrikotarboj, pirarboj — ĉiuj konkuras inter si por havi plenan floradon. Iuj el tiuj floroj estas ruĝaj kiel fajro, aliaj rozaj kiel krepuskruĝo kaj ankoraŭ aliaj blankaj kiel neĝeroj. La floroj dolĉe gustas; kaj se vi fermas la okulojn, vi sentas, kvazaŭ tiuj arboj jam pleniĝus de persikoj, abrikotoj kaj piroj! Sub la floroj zumas centoj da miloj da abeloj, kaj flugas tien kaj reen diversspecaj papilioj. Ĉie videblas sovaĝaj floroj kiuj, diversaspektaj, kun aŭ sen nomoj, kreskas disjetite en la densaj herboj, palpebrumante kiel okuloj aŭ steloj.

“Estas malvarmete, kiam la vizaĝon karesas la printempa zefiro”, ĝuste kiel la patrino karesas vin permane. La vento alportas la guston de nove plugita tero, miksiĝanta kun la aromo de verdaj herbetoj kaj ankaŭ kun la agrablaodoro de diversaj floroj — ĉio ĉi fermentas en la humideta aero. Birdoj metas siajn nestojn inter diverskoloraj floroj kaj delikataj folioj kaj, ekĝojinte, invitas siajn amikojn por parademe elflui el siaj kristalaj voĉoj belajn melodiojn, kiuj respondas al la facila venteto kaj fluanta akvo. Tiam ankaŭ laŭte sonas tuttage la fluteto de la knabo sidanta surdorse de la bovo.

Oftas tiutempe de la jaro pluvfalo, kiu daŭras du aŭ tri tagojn. Sed vi ne devu ĉagreniĝi. Vidu! La pluveroj falas aŭ kiel bovharetoj aŭ kiel pintoj de porbrodadaĵ

kudriloj aŭ kiel maldikaj fadenoj dense, oblikve trikitaj. La tegmentojn de loĝdomoj vualas maldikaj fumo. La folioj tamen estas brilete verdaj kaj herbejoj okulfrape smeraldaj. Ĉe vesperiĝo eklumiĝas la lampoj, kaj iomete da ties lumo reliefigas nokton kvietan kaj trankvilan. En la kamparo vilaĝanoj tenantaj ombrelojn promenas sur vojetoj aŭ apud ŝtonaj pontetoj; estas ankaŭ tiuj, kiuj laboras en la kampoj, portante pajlajn pluvmantelojn sur siaj ŝultroj aŭ bambuĉapelojn sur siaj kapoj. Kvietas iliaj kabanaj kun pajlotegmento dise starantaj en la pluvo.

Iom post iom multiĝas kajtoj sur la ĉielo kaj ankaŭ kolektiĝas geknaboj sur la tero. Kaj en la urboj kaj sur la kamparo, ĉiuj, ĉu junaj ĉu maljunaj, eliris el siaj domoj kvazaŭ por konkure sin amuzi. Ili sin ekzercas kaj vigligas; ĉiu faras sian propran aferon. “Printempo gravas por la tutjara laboro.” Ĉe la ĵusa komenco troviĝas sufiĉe da tempo kaj espero.

Printempo estas kvazaŭ nove naskita bebo, kiu kreskas, kun noveco de la kapo ĝis la piedoj.

Printempo estas kvazaŭ belvestita knabineto, kiu iras, ridetante.

Printempo estas kvazaŭ fortika junulo, kiu, kun fereskaj brakoj, talio kaj piedoj, gvidas nin antaŭen.

julie 1933



elĉinigi **Liu Hongyuan** (Ĉinio)

Tiberio Madonna (Italio)



poeto Tiberio Madonna

Via kaŝita amo

Mia neĝa
arida
fajra dezerto
ne havas sablon
nek blankon
nek ion tuŝeblan
pri kio mi povus skribi, verki, paroli
fantazii...
kaj do mi rakontas
flugojn sen birdoj
paŝojn sen piedoj
ĉielarkojn sen koloroj
en mia libro
sen paĝoj.



En la centro de mia universo

brilas obskura
via animo avara
via figuro fora
kiu lumigas per siaj sentoj
ĉiujn aferojn neekzistantajn
kuŝantajn
en miaj dezirplenaj revoj.
Kaj ĉiu el tiuj aferoj
tute senmove
rondiras
ĉirkaŭ vi
superversite
de la lumo nigra
kaj montrante
en ĉiu direkto
sian tristan ĝojon.
Senkompate min tremigas
la lontana varmo apuda
de via animo.
Malproksimo kaj proksimo
perfekte kunfandiĝas.
Nokto kaj tago
estas nur unu afero.
Mia miranta koro
ebriiĝas de l' odoro
de via riĉa
kolora bukedo
sen floroj.
Mia gorgo soifa
trinkas
la pluvon sekan
falantan
el la nuboj dancantaj
de via animo,
kaj miaj okuloj melankoliaj
pasigas sian tempon legante
en tiu senesprimo
de l' animo
la vortojn sen literoj
skribitajn de via mano.

Lily (Ĉinio)

Nokta pejzaĝo de monturbo

I

Ha, urbo sidas bele sur monteto,
kun domoj super domoj konstruitaj,
kaj du riveroj ĉe l' montopiedo.

Alvenas grupoj kun scivol' vizitaj
por spekti l' urbon sur la montsitu'
formita de masivaj rokoj monolitaj.

Spegulaj bildoj en riveroj du
jen plaĉas al okuloj en muaro,
varie moviĝemas sur akv-flu'.

Ja strange! kial staras domegaro
vicante ĝisĉiele laŭ eskalo?
Jen vidu la montvojojn sen eraro:

leviĝas domoj supren de l' montvalo!



II

Vespere lampoj flagras kaj ekbrilas
orange, ruĝe, blanke, verde, blue,
aspekton belan tuje l' urb' akiras.

Rebriloj buntaj vibras riverflue
kaj plektas lumdesegnojn sub ondpele,
boatoj, ŝipoj tranĉas akvon skue,

ŝanĝante la lumbildojn de fabelo.
Variaj lumoj lulas buojn drive,
akverojn levas ŝpruce en ŝancelo.

Plezurboatoj ankaŭ iras vive
tien kaj reen glate per spotlumo,
konkure farbas bildon jen aktive.

Verŝajne ĉio viglas sub plenluno.

III

Surborde lampaj lumoj pompas plene:
neonaj lampoj blinkas buntkolore,
stratlampoj punktatas vojojn jen fadene.

Aŭtlampoj vagas vice nokto-bore,
zigzage de l' east' al okcidento,
surstrate ja navedas penlabore.

En bunta lumo pontoj en silento
sin montras per konturo sia
impona, dura kiel monumento,

fortika konstru-fram' tridimensia.
Nebul' leĝera ŝvebas kun vualo
super la montourbo kurbolinia,

la nokto des pli ĉarmas en malklaro.

Soleca arbo

Mi staras sur la monto nun izola,
folioj estas miaj okuletoj.
Rigardas ĉien mi sub la sunlumo
kaj serĉas vin okule senkonsola.

Ne pensu, ke mi firmas sur la tero.
Spionas mia koro vin en foro.
Mi timas nek mizerojn nek suferojn,
mi vin sopiras ĉiam kun sincero.

Kvankam mi staras de l' aliaj sola,
mi fakte estas torĉ' levita alte.
Ĉu vi en foro vidas efektive
fajrerojn ŝpruci el brulad' petola?

Sopiro

Jam longe mi ne aŭdas pri vi, kara,
Kalkulas mi l' distancon de sopiro:
Mi paŝas sur la pado nenifara,
hezite iras antaŭ l' arb-spaliro.

Kun kap' klinita mi meditas nune,
silente nombras tempon en la menso.
Sopiro mia jen naskiĝas kune
kun via belfigur' en mia penso.

Mallongas la sopir' en palpebrumo,
ĝi tamen longas tra la tuta jaro.
Mi foje drivas en nebula brumo,
kaj foje dronas en memora maro.

Forgesi vian nomon mi ne povas,
sur lipojn mi ĝin metas ĉiutage.
Mi kompreneble ĉiam pene trovas

informojn viajn real-vive vage.

Mi vere tenas vin en la animo,
sed ofte mi desperas de l' sopiro.
Vi estas ja en fremda malproksimo,
min kredu: mortos ne la aspiro.

Velkinta petalo

Blovas vent' ĉe aŭtunfino,
pluvo batas kun obstino.
Velkas florpetalo,
flirte en ŝvebfalo,
jen malsupren laŭ destino.

Ĝia korpo jam sen sango,
falas, falas en vent-tango,
ĝis malvarma tero,
tute sen espero,
mortos ja kun blanka vango.

Vipas pluv' kun energio,
ĝi jam kuŝas sen konscio
sur la tero frida
el la grund' humida,
jen sen ajna ĝema krio.

Vent' ne povas blove movi
ĝin, nek ĝian movon trovi.
La petal' malseka
jam fariĝis feka
aĵ', sen ŝanco freŝe novi.

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



poeto Yi Qiao

Jartempo

Nokto Silenta
sanktas pro enkarniĝo
de l' Eminentas.

Frujar' jubilas
en lanterna festo dum
plenkoro brilas.

Jartemp' prospera
impetas favorgloro
kun am' tenera.

Sezono bunta
ravante jubilas pro
rikolt' abunda.

Penso pri Pasko

Ĝojas la tero,
primavero revenas
plen-de espero.

Dank' al Sinjoro
ĉiuj vekigigas el dorm'
en mar' de floro.

Dum pask-konkero
mesio resurektas
post kruc-ofero.

Ĉiuj jubilas
pro resurekt' de Sinjor',
sanktlumo brilas.

Dio donacas
eternan vivon al ni,
dum gloro gracias.

Ne plu 'stas morto
nek sufero plorplena,
jen nova sorto!

Eterna vivo
estiĝos se ni fidas
en efektivo.

Paska fajro

Ĝojas jen ridante l' vasta tero,
revenante la printemp' jubilas.
Nova mondo plenas de espero,
paska fajro inspirante brilas.

Nin savanta grace la Sinjoro
ardoplenan vervon nun donacas.
Ni ebrias en la mar' de floro,
sankta amo glorsolene gracias.

Mastro vivofontas de prospero,
post la resurekto ne plu mortas.
Pro l' redempto per la kruc-ofero
la meritaj homoj jen novsortas.

Baldaŭ estos jam eterna vivo,
se fidelas ni en efektivo.

Honoré Sebuhero (Ugando)



Esperanto, mia ŝatata lingvo

Ho Esperanto, vi donas al mi tiom por vivi kaj esperi. Ĉiu tago alportas al mi novan senton de ekscito kaj miro. Mi sentas, kvazaŭ demeti la okulvitrojn kaj vidi la mondon en la tuta gloro.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

poeto Honoré Sebuhero

Ho Esperanto, nokte, antaŭ ol dormi, mi pensas pri via rideto esperante povi vidi vin en miaj sonĝoj. Ĉio komenciĝos denove la sekvan tagon.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, mi amas ĉion pri vi. Mi antaŭĝojas ĉiun tagon ĉar tio signifas alian tagon por pasigi kun vi kaj montri al vi kiom mi amas vin.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, via nomo estas speciala kaj mi amas diri ĝin. Mi sentas eksciton kiam iu mencias vian nomon, kaj mi ne povas ne rideti ĉiufoje, kiam mi renkontas iun kun la sama nomo kiel la via.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, mi atendis vin dum mia tuta vivo. Nun kiam vi estas ĉi tie, mi ne povas reiri al mia antaŭa vivo antaŭ ol mi renkontis vin.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, se vi ankoraŭ dubas pri mia amo al vi, nur memoru, ke vi reprezentas la mondon por mi. Estas nenio, kion mi ne povas fari por vi.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, ĉiu eta afero, kiun vi faras, plenigas mian koron per ĝojo. Vi inspiras min fariĝi pli bona homo kaj vi igas min aprezi ĉion en mia vivo, eĉ la malpli agrablajn aferojn.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, vi estas sendita el la ĉielo. Vi tute ne scias, kiom feliĉa vi faras min ĉiutage. Fojfoje mi devas pinĉi min nur por certigi, ke mi ne sonĝas.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, mi pasigos la reston de mia vivo por konstati, ke vi scias tion. Vi estas por mi la plej grava lingvo en la tuta mondo.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, vi ĉiam troviĝas en mia menso eĉ se mi havas tre okupatan tagon.
Pensoj pri vi trakuras mian kapon la tutan tagon.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, vi estas neimagebla lingvo, kiu alportis tiom da amo kaj lumo en nian ĉiutagan vivon.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, vi ne scias kiom via rideto heligas mian tagon. Vi simple ne scias kiom da fojoj mi enamiĝis al via rideto.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, mia lingvo kiu kompletigas mian gepatran lingvon, mi neniam forgesos vin en mia vivo. Ĉar vi estas paciga lingvo kaj jam repacigis kvar etnojn en antikva Pollando.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, vi firmigis mian amon al miaj tutmondaj geamikoj el la kvin kontinentoj de la mondo. Ni ĉiuj sentas nin kiel veraj geamikoj. Nia sincera kunlaboro estas ĉiam proksima. Dank' al vi, ni formas kompletan familion.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, mi amas vin, ĉar vi jam rompis la proverbon: “For de la okuloj, for de la koro”.

Mi restos ligita al vi por ĉiam.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, vi kreis kunligan ponton inter miaj diverskoloraj amikoj. Ni ĉiuj estas sur la sama egala bazo kaj ĝuas la samajn humanitarajn rajtojn. Kia ĝojo al la Esperantista mondo!

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!

Ho Esperanto, vi batalis por efika paco inter la mondo. Satano ĉiam estis ĵaluza, sed iom post iom, ni venkos lin.

Ho Esperanto, mia plej ŝatata lingvo!



Bedo de Ĉinesko

Veĵdo (Ĉinio)



aŭtoro, Veĵdo

Rakontoj pri Afanti

Mono kaj justeco

—laŭ ĉinesko Sorpir-al-sudo*

La reĝo
kun moka tono
ĉuis al Afanti:
“Jen justeco kaj mono,
laŭ via kono,

kiu pli
valoras al vi?”
Afanti tuj respondis:
“Monon ja preferas mi,
ĉar ĝi gravas pli.”

“Kia vir’,
Afanti!” vere
kriis la reĝ’ dubeme,
“Jen por diri sincere,
mi ja prefere

elektus
 justecon male,
 ĉar ĝi pleje valoras.”
 sed mon’ aspektas pale
 kaj triviale.”

Afanti
 replikis pike:
 “Homo volas nur kion
 li malhavas praktike,
 senartifike.”



Kvarpieda reĝo

—laŭ ĉinesko Sorpir-al-sudo*

Afanti
 pro okulinflam’
 ne povis vidi klare,
 sed la reĝ’ ordonis jam
 al li kun malam’

rigardi
 distinge tion
 kaj alion ruze por
 montri siajn envion
 kaj ironion.

Li moke
 ĉuis per voĉbru’:

“Afanti, je via vid’,
via azen’ nur unu
fariĝis du, ĉu?”

Ja vere
jam riĉiĝis vi!”
Afanti tuj respondis:
“Via moŝto, laŭdu mi
pri via magi’.

Vi vere,
laŭ vido mia,
fariĝis kvarpieda
azeno jam senscia
kaj apatia.”

Li nesubigebla

—laŭ ĉinesko Sorpir-al-sudo*

Iu reĝ’
opiniis sin
saĝa kaj multescia
kaj subigis kun obstin’
per ĉuoj sen fin’.

Afiŝis
la demandon li
“Kie troviĝas centro
de l’ mondo?” al la naci’
jen por opini’.

Laŭ ordon’,
respondos prave
la homo— premiita,
tiu eraros mave—
punita glave.

Multegaj
homoj foriris
post lego de l’ afiŝo,

ĉar ĉiuj ja deziris
sed vesuspiris.

Afanti
kun sia azen'
nur iris al la palac'
doni la respondon jen
kun memfid-mien'.

“Vi scias
do, ja memfide,
kie troviĝas centro
de l' mond'?” Reĝo mokride
ĉuis acide.

“Jes, via
moŝt', senerare
ĝi kuŝas tie, kie
mia azen' ja stare
sin trovas klare.”

“Ne kredas
mi! Deliras vi!”
la reĝ' replikis pike.
Memdefendis Afanti,
“Tie ĝuste ĝi

situas.
Mezuru vere
vi la tutan mondon, do.
Se malĝuste, severe
punu min infere!”

“Nu, tio...”
zumis voĉbrue
la reĝ' kaj nur post longe
lante demandis plue,
“Respondu due,

kiom da
steloj ĉiele?”
“Ili samnombras kiel
viaj haroj cifere
tutcerte vere.”

La reĝo
koleriĝis nun,
“Sensencaĵo! Trompaĵo!”
“Se eraras jen la sum’
tenu min per pun’!”

Afanti
diris altsone,
“Iru ĉielen, nombro
la stelojn ja persone,
memoru bone!”

“Do... al mi
diru detale,
kiom da haroj estas
sur mia vizaĝ’ totale?
Multege sable?”

Trankvile
Afanti per man’
levis sian azenan
voston kun buŝa rikan’,
montris al tiran’,

“Ha, vidu,
vidu ja klare!
Viaj vangharoj nombras
tiom, kiom, kompare
kaj senerare,

la haroj

de vosto ĝia!”
“Aĥ, kia absurdaĵo!”
Reĝ’ fariĝis rabia
kaj malracia.

Li kriis
kaj frapis forte
la tablon kaj insultis,
tordis sin malkomforte
kaj palis morte.

Kun aplomb’
Afanti kun saĝ’
aldonis, “Jen kalkulu
harojn sur via vizaĝ’
ja laŭ via plaĉ’,

kaj poste
tiujn sur la vost’
azena tre zorgeme,
vi trovos, je ajna kost’
mi pravas ĝis ost’.”



**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksfirma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x*=senrima).

Xue Fenggu (Ĉinio)



Elĉinigis Minosun (Ĉinio)

Revizito al Baguazhou

Tiun jaron en Baguazhou mi skribis al vi
 Ranidoj memvole proponis sin por fari
 skizon
 kaj eĉ plaŭde saltis en akvo
 La ondoŝaŭmo disŝprucis en la pupilon de
 poemo
 kaj kompreneble ankaŭ malsekigis la ŝrikon
 de turdo

poeto Xue Fenggu

Pri la afero krajontranĉileto ne malmulte babiladis
 Nun mi revizitas iam loĝitan lokon
 La koverta granda kiel okulopoŝo
 estas plene ŝtopita per skizo pri lunbrilo penetranta en akvon
 Kontraŭ ĉia atendo
 unu sola, kiu povas esti verso,
 estas peco da salika vergo rompita per si mem

Post kiam uziĝis vakcino de Sinovac, homoj deliras
 Zostero, kiun popolo nomas zono, erupcias unuavice
 “Donu la animon!” serpento diras,
 “Nur tiel vi povos miksi falson kun vero
 kaj venkos en la batalo de vivo.
 Dum mia vivo mi ja estas ponto kiun vi povas trapasi.”

Ĉi-momente viruso hantas min,
 kiu plu skribos al neniuj krom Avalokiteŝvaro
 Cigno flugas alte, tiam la universo malgrandiĝas
 Mi kronikas nur al mi mem kalvarian vojaĝon

eĉ se la eseo senakviĝas kaj maldikiĝas kiel plumo de ansero

Pluvo renkontita en kafejo

La tondro ankoraŭ profunde dormas, subita pluvo
kvazaŭ Avalokiteŝvaro aperas en vizio
Kun taso da laktokafo mi sidas en filistreco

Flugantaj birdoj ĉiuj foriĝis, spegulo disrompiĝis sur la planko
Tiu homoj sin lulantaj en paseo
kaj embarasiĝantaj en ombro,
kiel ajn bele vestitaj, estas nur stako da rustaĵoj

Mi estas revelaciita. Rivero baŭmas
kaj torentas kontraŭ vento, malgraŭ pluvo

Jen, dek mil nigraj ĉevaloj ekgalopas
Impeta kanto penetras rokojn kaj fendas nubojn
En tiu ĉi obskura mondo
de la pluvo mi transprenas fendon
kaj faras el ĝi akran glavon. En la frazo tondras kaj fulmas

Unu guto da akvo

En la unua tago de 2024, unu guto da akvo
kun la brila okulo malfermita
ridante paŝas al mi

Tremante mi iras renkonte al ŝi:
la ĉarmo odoras elinterne eksteren
kvazaŭ ĉe punce ŝminkita damo delonge nevidita

La guto scipovas paroli en la nankina dialekto
La voĉo vere raŭkas
Dum tempo de pipofumo ŝi timide forturniĝis

Ho, tiu ĉi guto, kiu malproksimiĝas de bruoplena urbo,
jam ŝanĝis sian nomon en la terminon: Roso

La guto sin liberigis de mia sino
ne plu dezirante eniri en la homan mondon
dum en mia menso delonge leviĝas la sono de ondoj

Rovere Emanuele (Italio)



tradukinto Rovere Emanuele

(kanttekstoj)

Vi restis sola

Nun vi restis tute sola, ploras kaj ĉion rememoras;
glitas larmoj sur via vizaĝo, malrapide, dolorige.
Nun vi restis tute sola, min serĉas inter homamasoj.
Eble, sur viaj manoj senfortaj, vi priploras vian pasintecon.

Venos baldaŭ la tempo, kiam vi pripentos min
kaj vi komprenos, ke posedis vi la tutan mondon.
Via vivo sencela utilos plu al nenio,
dum pli kaj pli malbela, senĝoja ŝajnos ĉio.

Nun vi restis tute sola, ploras kaj ĉion rememoras;
glitas larmoj sur via vizaĝo, malrapide, dolorige.

Muziko: Gianco Riki

Vortoj: Del Prete Miki

Pensu pri mi

Se neniu volas kredi, ke mi amas vin, estas nur ĉar mi neniam enamiĝis.
Mi mem surpriziĝas, kiam mi konstatas, ke vere tre profunde mi ŝanĝiĝis.
Celo mia estas nur apud vi resti kaj mi devas miajn emojn moderigi,
dum momentoj, kiam mia granda sento min igas jaluza pri l' viroj ĉirkaŭ vi.

Pensu pri mi, senhezite kaj intense, jen perkorpe, jen permense,
kvazaŭ estus mi kun vi; rigardu min, per okuloj viaj belaj
foje trompaj, amoŝtelaj, same mi ŝategas vin.
Amu min, forte kiel amantino,
kiu, ĝis la vivofino, tute oferdonas sin.
Kisu min! Kisu mian tutan haŭton!
Ĉar eblas tuŝi l' ĉielon, dirinte nur simple: JES!

Muziko / vortoj: Greber Maria

Nun aŭ neniam

Nun aŭ neniam, ĉirkaŭbraku min, donu viajn kisojn ĉar mi amas vin.
Jam morgaŭ ne estos tempo plu. Nun aŭ neniam, la ŝanco por ni du.

Kiam mi vin vidis la unuan fojon, tuj mi enamiĝis, vi kaptis mian koron.
Viaj varmaj lipoj jam deziras kisojn, do ne atendu havi novan ŝancon.

Nun aŭ neniam, ĉirkaŭbraku min, donu viajn kisojn, ĉar mi amas vin.
Jam morgaŭ ne estos tempo plu. Nun aŭ neniam, la ŝanco por ni du.

Kvazaŭ plorsalikoj, ploros ni dumvive, se ni perdos amon, dediĉon reciprokan.
Kaj, en ĉi momento, pligrandiĝas mia sento, ĉar realiĝas mia amorevo.

Nun aŭ neniam, ĉirkaŭbraku min, donu viajn kisojn, ĉar mi amas vin.
Jam morgaŭ ne estos tempo plu. Nun aŭ neniam, la ŝanco por ni du.

Muziko: Di Capua Eduardo

Vortoj: Capurro Giovanni

Manŭela

Ole! Famiĝas jam onidiro en Barcelono “ke estas Manŭela la plej bela knabino”.
Ole! Post kiam mi vidis ŝin el la katedralo, plorludas gitaro mia sub la lunlumo.

Manŭela, Manŭela! En domo belega kaj luksa vi vivas tre sola;
vi sola, Manŭela, ricevas de l'viroj sopirojn sed restas malvola.

Per amo, mi petas: komprenu, ke nur al vi donos mi la tutan koron;
Manŭela, ho Manŭela! En revo plej bela elstaras la nomo: Manŭela.

Ole! Ŝanĝiĝas nun l'onidiro en Barcelono “vi estas, Manŭela, la plej bela edzino”.
Ole! Post kiam vi diris “jes” en la katedralo, ĝojludas gitaro mia eĉ en mallumo.

Manŭela, Manŭela! Nun en mia domo modesta ne estas vi sola;
ne sola, Manŭela, infanon vi vartas kaj florojn kultivas bonvola.
Per amo, vi igas feliĉaj la tempon kaj spacon en kiuj mi vivas;
Manŭela, ho Manŭela! La vivon kun vi kunpartigi mi volas, Manŭela.

Muziko / vortoj: Granada Rocco

Ŝin mi amas

Al mia korvirin' ĉion mi donus
kaj, se vi konus ŝin, ankaŭ vi ŝin amus: ŝin mi amas.
Nur ŝin regalas mi per tenereco
kaj kisojn donas ŝi, kun ama eco: ŝin mi amas.

Jes, mia amo daŭros poreterne nur kondiĉe, ke restu ŝi kun mi.
La steloj el ĉiel' certigas min,
ke, ĉiam kun fidel', ŝi amos min sen lim': ŝin mi amas.

Jes mia amo vivos poreterne, nur sufiĉos, ke restu ŝi kun mi.
La steloj el ĉiel' certigas min,
ke, ĉiam kun fidel', ŝi amos min sen lim': ŝin mi amas.

Muziko / vortoj: Mccartney Paul / Lennon John



Gao Huaijun (1964-)



poeto, Gao Huaijun

Elĉinigiĝis Du La

ni elektas la printempon

masko de ĉiu sezono havas sian elekton
 sed kiam
 la vento ekscias pri tio
 la maskoj estos deŝiritaj
 la vento
 la printempa vento estos faranto

la kompleto kaŝita en la printempo
 estas diskutata
 herbeto donas al mi revon
 mi volas movi la terglobojn flanken
 lansante la venton blovi de alia direkto

la vorto “malproksimo”
 entenas nelimigitan flukvantan
 ĝi ŝajnas aminda bebo
 kiu senĉese rampas
 kaj kreskas kun variaj koloroj
 dum la tempdaŭro de kapturado
 via odoro ŝvebas en la vento

kondukante la venton
 ni piediras en la venta animo
 kantante tiaman junan kanton
 la ĵus leviĝanta suno...
 sur la pado konata de ni
 ni sidas kontraŭ la suno
 legante vian leteron

malsukcesoj en moviĝado
kolektis la semojn de diversaj sezonoj

la momenton kiam ni malfaldis la leteron
kelkaj semoj jam ĝermis
ni elektas la printempon
do, ni brakumu la printempon
ke la printempo ĉesos danci sur la fingropintoj

la printempo sekvas post la vintro

tio, kio mortis estas ekstera korpo
spirito estas sublimiĝo aŭ daŭrigo
lante degelas la neĝo amasigita ĉe l' vojo
tio estas la lasta barakto de l' vintro
arbo demetas la surtuton
ĝi ŝajnas multe alta pli ol lastjare
ventoj ripozetas ĉi tie
kaj kelkaj jam konstruis la neston

pepado de birdoj plaĉas al oreloj
ĝi diras al mi
ke ĝi loĝas longe en miaj oreloj

malferminte iun pordo la sunlumo
vokas vian nomon kaj mian familinomon
guto da pluvo malsekigas larmon de poeto
ekscitita herbo kuras kiel tajdo

verdigas la kampojn kaj la riverbordojn
hikfiŝistoj prenas tempon kiel logaĵon
kaj sukcesis ŝnurligi la tutan riveron

ankoraŭ ni fidas je la vento
kun fermitaj okuloj
herbetoj kaj floretoj deklamas
el la poezia gusto
en la birda pepado ni ekscias
pri la alportitaj salutoj

kiuj disvastiĝas en la vento

jam en la printempo

post la sezono de insekto-vekiĝo
kion ni devas fari estas
plugi teron kaj dissemi kelkajn semojn
sidiĝi por aŭskulti la venton
kaj babili super teo kun la vento

mi donis infanan nomon al la vento
tiamaj rememoroj kovras la montdeklivon
buterfloroj bloviĝis per eta spiro
jen venas la printempo

delikata elspiro ŝirmas korpfiguron
mi promenas longe en la printempo

okazaĵoj en la printempo
nur post kiam floroj ovriĝos
iliaj enigmoj malkaŝiĝos
Poemoj, poemoj en la printempo poezias

Ni iru foren
al la profundo de l' printempo
incitu nek florojn nek herbon
kiel poetoj en la antaŭa dinastio
eldiru rimitajn vortojn
palpu pulson de la vento per la printempo

ekde nun
la koro ne plu vundiĝos
ne plu ĉagreniĝu kun sentimento
rapide iru en venta dancado
zumante l' arion de l' zefiro
ĉe la vojturniĝo
faru sonorajn fajfon
la vera printempo
eliras el la koro al realeco *
* * *

Afonso Lopes Vieira (1879-1946)



poeto, Afonso Lopes Vieira

Ventodanco

La vent' estas dancartisto,
 dancas re kaj re fajfade,
 en turniĝoj kvazaŭrade,
 vento , kia dancfaristo!
 Diras al floroj timantaj:
 Dancu ĉiuj kun mi prove,
 ili komencas flirtanta ,
 daŭre pli kaj pli dancantaj,
 jam la branĉoj svingiĝantaj,

senpetalfloroj sintrove:
 Senvent' – Ili desperanta ,
 ho ve, ho ve!


La vent' estas dancartisto,
 dancas re kaj re fajfade,
 en turniĝoj kvazaŭrade,
 vento, kia dancfaristo!
 Al la kanopeoj diras:
 Dancu kun mi eĉ se prove,
 kaj jam kanopeoj giras,
 kun la ventego kirliras,
 la vento ne sin retiras,
 la kanopeoj svenantaj:
 Senvent' – Ili desperantaj,
 ho ve, ho ve!

La vent' estas dancartisto,
 dancas re kaj re fajfade,
 en turniĝoj kvazaŭrade,
 vento, kia dancfaristo!
 Diras al folioruloj:

Dancu kun mi plaĉe prove,
 la folioj, laŭaj uloj,
 dise iras, povraj buloj,
 folioj seksekaj, nuloj ,
 al redanco jam senpove,
 lastan spiron prenas lantaj:
 Senvent' – Ili desperantaj,
 ho ve, ho ve!

La vent' estas dancartisto,
 dancas re kaj re fajfade,
 en turniĝoj kvazaŭrade,
 vento, kia dancfaristo !
 Diras al l' ondoj defie:
 Tuj kun mi vi dancu prove,
 ili alten egfurie
 ĝin envolvas laŭte krie,
 la batalo
 fine vasta ŝaŭmobalo,
 l' ondoj l' venton reserĉantaj:
 Senvent' – Ili desperantaj,
 ho ve, ho ve!

La vent' estas dancartisto,
 dancas re kaj re fajfade,
 en turniĝoj kvazaŭrade:
 Vento, ĉi dancofaristo! ※



elportugalis

Wington Rocha (Brazilo)

Rudina Muharremi Beja (1976-)



poetino Rudina Muharremi Beja

Rudina estas albana ppoetino, naskiĝinta en Ishëm, de la distrikto Durrës, la 9-an de aprilo 1976. Ŝia beletra verkado ampleksas kelkajn librojn: “La kora mielĉelaro” (poemaro, 2019), “Florpreĝo” (poemaro, 2019), “La valso dancas sola” (poemaro, 2019), “Teraj horloĝoj” (poemaro, 2020), “Luno super la montetoj” (poemaro, 2020) “Kiam la roboj ŝanĝiĝas” (pemar, 2020), ‘Nostalgia rifuĝejo” (poemaro, 2021), “Per sia lingvo” (rakontoj, 2021), “Mia patro, ĉies kuracisto”, (publicistiko, biografio, 2019, “Volevo scrivere” (en la itala, poemaro, 2022), “Anima kandelo”, (poemaro, 2022), “Animaj kurtenoj” (poemaro, 2023).

La morgaŭo

La morgaŭo estas blanka papero preta por skribiĝi,
 La kanvaso kie la pentroeblaj estas senfinaj,
 Estas nova ĉapitro,
 Portanto de la revoj, de la esperoj...
 La morgaŭo portas per flugiloj novan tagiĝon,
 La eblon por lerni,
 Por kreski.

Ĝi estas la nekonata vojaĝo trans la revo
 Al la memo dezirata..
 La morgaŭo renversas la nokton,
 Ĝi vestas ĉiujn kolorojn
 Misterojn, necertecojn,
 Portas defiojn, kuraĝon por ilin venki
 Kaj kiam la suno intersanĝiĝas kun la steloj,
 Ĝi etendas la brakojn super la urbo,
 Por nova starto.

Mi iras

Mi iras kun la luno dum la malfrua krepusko profunde enspiranta,

Tien kie la revoj paliĝas,
Tien kie la vortoj maljuniĝas,
Kaj kie la memoroj, blankhariĝas silente...
Mi iras kiel la hirundoj kun la tristo sur la plumoj,
En la okuloj, la brilon perditan de la aŭtunoj,
Tra la ruinoj kiuj portas vivaj la memorojn,
Kiujn la vintro kovras per neĝo ĉiam.
Mi iras tra la animaj subetaĝoj...
For de la reflektiĝo de la falsaj radioj,
For de la fantomoj starigantaj kastelojn,
Por traserĉi en mia konfuzo.
Kaj poste vesti denove rideton

Mia pento

Ŝajnis min kvazaŭ mi perdis la sunon,
Perdinte la hejmon en mia patrio,
La lunon kiu ĉiam rigardis min defore
Kaj la deziron por denove reveni tie.
Enuigita, mi ankoraŭ foje pretigas la valizojn
Por la restinta pento, la tristo kiel memoraĵo
Kaj plonĝas denove en la nuban nebulon,
De la sopiroj, por adiaŭi al mia lando.
Ankoraŭ eĥadas ĉe mi la memoraj voĉoj,
La venta ĝemado, la akumulita dispneo,
La ĉirkaŭbrakumo de la patrino kaj proksimuloj,
Kaj la larmoj, ĉiam, enverŝitaj solece.
Vane mi enuas kiam mi demandas,
Kien mi iros postkiam mi revenos?!
Ĉie mi trovos la dolĉan amon,
Tiun kreskanta nur tie...la eternan.
Kaj silente mi kuras tra la nuba trombo
Tra la nokta sorĉeco, pendita en la krepusko
Tra la senfortiĝaj herbejoj, vekitaj en la printempo
Por atingi la animan sanktecon!

Venu Printempo

Venu Printempo,
Venu per via malrapida paŝo,
Kaj kun la okuloj al la lumo,
Tra la vojo ĉagrena de la silento,
Post vintro kiu malplenigas la ĉielon,
Kaj nun mordas lastajn tagojn.
Venu kun la floroj burĝoni mian rideton,
Kaj la animajn kornicojn,
Envolu per la aŭroraj kristaloj,
Venu, mi havas multon por diri...
Sur mi vi pentros alian cirklon,
Sed mi ne koloretas ...
Ni ne povas haltigi la tempon,
Mi apenaŭ atendas paroli kun la martaj birdoj pri la stela tristo,
Ili komprenas mian lingvon
La profundan bojadon de la silento,
Kaj mi, ilian pepadon,
Mi volas paroli ankaŭ kun la hirundoj,
Kiuj la sopiron portas sur la nostalgiaj flugiloj,
Revenante denove en la naskiĝlokon,
Kun la memoroj en beko de la lasta aŭtuno,
Sed ankaŭ la plorantaj mimozojn,
La ŝafflorojn kun ties sorĉeco,
La arbojn kiuj enfiksas siajn piedojn profunden en la tero,
Kaj burĝonas senkulpajn ĝermojn,
Kaj la rozojn rositajn kaŝantaj la pikojn,
Kaj enĵetas la radikojn en bonan teron.
La revojn por teksti la aŭroran radion.

Vi parolas nostalgie

Vi ĉiam parolas nostalgie,
Rakontante kio pasis, kio venos,
Mi raviĝas kun fermita buŝo,
Dum longa silento vin aŭskultas.
Vi absolute alvokas, laŭtvoĉe demandas:

“Ĉu vi aŭdas? Diru al mi vorton!
 Eble mi parolas al mi mem
 Vi igas min sentiĝi ĉiam stulta”
 “Ĉu vere vi ne sentas min?” mi murmuris,
 Ĉu vi ne sentas miajn fingrojn sur via hararo?
 La animon, ĉu vi ne sentas dum la blovego
 Kaj la kalkanojn kiuj ne premas surtere?
 Ĉu vi ne sentas mian enspiron,
 Brulanta kaj tutan vin envolvanta,
 Ĉu vi ne sentas la varmajn ĉirkaŭbrakojn,
 Semitajn sur via korpo?
 Ĉu vi ne vidas la stelojn trembrilantaj,
 Dum ili elfluigas la lumon al miaj okuloj,
 Kial vi ne sentas la maron perturbanta la ondojn,
 Dum mi alparolas vin?
 Kaj la pensojn kiuj implikiĝas,
 La suno ardas tute enflamiĝanta.
 Ĉu vi ne komprenas ke ĉi tiu bruneta mondo,
 Estas maljuniĝinta sen via voĉo?
 Rigardu kiel la senkulpaj branĉetoj ĝermas,
 Sur la brovoj, lipoj, viaj okuloj,
 La printempon pentranta akvarelon,
 Via voĉo, alvenanta ĉi tie...
 Por min trovi, mil jarojn mi atendis vin,
 Por ke vi parolu mi atendis aliajn miljarojn,
 Kaj se mia lumo ne sufiĉas al vi,
 Mi lumigos ankoraŭ pli multe ĉifoje. *



elalbanigis

Bardhyl Selimi (Albanio)

Du Fu (712-770)



Naŭ poemoj

*Du Fu estas fama realisma poeto de la Tang-dinastio
(618-907).*

elĉinigs Yanke

Ascendo al altaĵo

La vento furiozas sub ĉielo,
simioj triste hurlas,
super sablejo blanka ĉe l' rivero
la birdoj flugkonkuras.
Folioj flavaj en arbar' senlima
flirt-fale jen susuras,
akvfluo de l' Janzi-river' el foro
torente sin alrulas.
Mi vagas multajn jarojn en l' aŭtuno
kun miloj da ĉagren',
kun malsanema korp' mi kadukulo
staras sur alt-teren'.
Post suferado blankaj haroj rampas
kapen je mia ĝen'.
Mi ne plu drinkas, kiel povus, ho ve,
mildigi mia splen'?

Malĝojemulo ĉe la riverbordo

Sensone olda sovaĝ' el Shaoling* larmojn glutas,

sekrete iras al Rivero Kurba primavere.
 Envide mil ŝlositaj palac-pordoj jen sin trudas,
 por kies ĝu' ĉeborda salikaro verdas vere?
 Iame l' reĝaj flagoj al Sudkorto pave venis,
 aspektis ĉio ena tre kolore jen beleta.
 Unua Sinjorino el Palaco Zhaoyang prenis
 sidlokon en l' imperiestra ĉaro servopreta.
 Sagistoj inaj antaŭ l' ĉaro rajdis kun fiero
 sur la ĉevaloj blankaj kun orita bridrimeno.
 Sagistino levis kapon, sendis sagon al l' aero,
 du birdoj falis jam de la ĉielo pro vundsveno.
 Kie la brilaj okulpar' kaj dentoj nun forvagas?
 Fantom' sangmakulita** vagabondas sen reveno.
 Ĉiam roĝo Wei fluas, Jian'ge-vojoj ja zigzagas,
 Ne plu l' mortinto kaj vivant' mesaĝis kun kompreno.
 Per larmoj homoj ĉiam en la kor' sopiron kovas,
 kiel ĉe bord' revivas floroj, herboj energie.
 Krepuske la rajdantoj hunaj polvonubon movas,
 volante suden, norden mi direktas senkonscie.

**Du Fu aludas sin mem.*

***Tio signifas Yang Guifei, la plej amata konkubino de tiama imperiestro. Ŝi estis mortigita laŭ la ordono de la imperiestro, kiu faris tion sub la minaco de ribelantaj trupoj.*

La malsana ĉevalo

Mi longtempe rapidas vin kun fido,
 Nun ĉe landolim' tra vintra frido.
 Vian forton suĉis vojaĝpuno,
 paras vin malsano kaj maljuno.

Ordinara vi ĉevalo estas,
 kaj fidela, vi cedema restas.
 Nura brut', jes, kun humoro pia,
 indas je odado mia emocia.

Kiam rivero aspektas marsimila

Kun fermita karakter' mi ŝatas

elfari versojn de poemo,
mi ĝismorte absorbite ĉasas
mirigajn frazojn kun volemo.
Jen oldaĝe simplajn versojn bakas
mi laŭ natura flu' de memo,
eĉ printempaj birdoj ĉi tien falas,
ne sentas ĝenon kun timpremo.
Mi sur novan balustradon amas
apogi min en ĝoj-ekstremo
por fiŝhoki, kaj sur flos' mi gajas
anstataŭ en boat' kun ĝemo.
Grandajn la poetojn (kiel Tao kaj Xie)
akompanas
volonte mi kun verva temo,
verki versajn pecojn tree plaĉas
nin kunveture en ravemo.

Versaĝo farita survoje de la ĉefurbo al Fengxian- gubernio

Min vestas per katuno kruda mi,
oldaĝ' min obstinis en raci'.
Ke kun ministroj oldaj min kompari
mi volis, kiel malsaĝe tion fari!
Finfine mi min sentas nekonvena,
kaj turnas al penemo solecplena.
Escepte se alvokos min la morto,
ne l' ambicio falas en aborto.
Prizorgas mi l' popolon ĉiuhore,
la simpation naskas ja elkore.
Primokas kunlernantoj min je stulto,
mi dume dronas febre en kred-kulto.
Mi dezirus vivi kiel ermito,
kaj vidi l' sunon, lunon en ir-glito.
Ĉar regas la monarko kun merito,
malamas mi foriri por evito.
Amasas en korteg' nun talentuloj,

utilas ne la nanoj en ranguloj.
Senhelpe, ve, mi kiel helianto
ĉiame turnas min al sun-giganto.
Ĉar nure estas mi malgranda besto,
kiu nur kontentas pri la ŝirma nesto,
pro kio la balenon mi envias,
kiu furiozan maron ja defias?
El tio venas mi al la konkludo:
por-peta aŭdienc'—hontinda ludo.
Mi ĝis hodiaŭ restas senfaranto
kun polv' kaj kot' kovranta ĝis kolrando.
Vizaĝe al l' ermitoj sanktaj, noblaj,
mi plenas je hontinda sent' duobla.
Drinkante kaj kantante kun korĝemo,
malĝoja mi vivaĉas ĝis ekstremo.
Jarfine mil, mil herboj velkas morte,
montetoj krevus en ventego forte.
Ĉielaj stratoj grizis sub nub-pezo,
vaganto, mi ekiris en noktmezo.
Vestzonon romp'is prujn' deŝove
rigidaj fingroj nodis ĝin senpove.
Monton Li frumatene trapasinte,
mi vidis reĝpalacon surmontpinte.
Nebulo densis sur ĉielo frida,
stumble iris mi en val' humida.
Surmonta banbasen' vaporis nube,
soldatoj reĝaj gardis amas-trupe.
Monark' kaj dukoj ĝuis sin diboĉe,
muzik' de flutoj sonis tondravoĉe.
Banantoj—senescepte korteganoj,
Ĝuantoj—neniele popolanoj.
Jen donaciĝis en palac' silkrujoj,
produktis ilin inaj malriĉuloj,
kies edzoj ilin sendis sub vip-pelo
kiel tributon al palaca kelo.
Imperiestra graco per donaco
alcelas regi l' landon en viv-paco.
Se donacitoj tretas la intencon,

ĉu la regnestr' ricevus rekompencon?
El funkciuloj en korteg' disponaj
humilas antaŭ dev' nur la sindonaj.
Malgraŭe donacaĵoj falas sur
parencojn reĝajn laŭ ties plezur'.
Knabinoj dancas tie fein-similaj
kun diafanaj roboj svingfacilaj;
spektantojn varmas peltaj la surtutoj
en softa la muzik' de kordoj, flutoj;
manĝtablon pezas kaĉo kamelkruraj,
citronoj, mandarinoj plenmaturaj.
Ve! Vin', viando stinkas enpalacaj,
surstrate kuŝas homoj mort-grimacaj!
Diboĉon mort' alfrontas tuj proksime,
malĝojas mi enkore tre senlime.
La ĉaron mi direktas norden lante,
pramejon vane serĉas mi trovante.
Torentas fluoj la deokcidentaj,
tre agresemaj, danĝeroprezentaj,
kvazaŭ alpremus mont' giganta
kaj rompus fostojn de ĉiel' kovranta.
Feliĉe l' pont' ankoraŭ traireblas,
kvankam kaduka, knaras, feblas,
sur kiu kroĉas unu la alian
irantoj trans akv-vaston la muĝ-krian.
Edzinon, idojn miajn en fremdloko
neĝŝtormo baras de mi en sufoko.
Kiu vole sin izoli deziras?
Kuniĝon familian mi aspiras.
Renkontis min ploreg' ĉe porde, ĉar
malsate mortis l' id' en juna jar'.
Eligis laŭtan ŝrikon mi ĝissate,
najbaroj singultploris kunkomplete.
La patro taŭga mi ne indas esti,
mi povis ne lin nutri por vivresti.
Kiu imagas, tempe de aŭtuna
rikolt', pro povr' subitis morto juna.
Dumvive senigita je imposto,

livre', konskript' pro mia fama kosto,
suferas ankaŭ mi jen de ĉagrenoj,
ordinarulojn certe hantas ĝenoj.
Ekpense je la uloj senrimedaj
k' soldatoj ĉe landlimo gard-pikedaj,
mi naskas tuj malĝojon la senhaltan
kiu senbride voras monton l' altan.

Alven' de gasto

Super akv' printempa ĉirkaŭ mia domo,
jen frekventas birdaj grupoj en ŝvebado.
Ne ankoraŭ balaitas por vi l' pado,
barilpordon mi malfermas, mia homo.
Hejmo mia distas de la bazarloko,
vin regalu povre mi per vin' malklara.
Ĉu vin-akompane la oldul' najbara?
Lin kondukos por plezuro nur alvoko.

Pluvo en printempa nokto

Bona pluvo konas la sezonon,
falas ofte ĝi en primavero.
Ĝi kun vento kaŝe iras nokte,
ĉion ĝi humidas sen son-elo.
Nigras nuboj super la kamp-pado,
lumas la boato sur rivero.
Ĉe tagiĝ' vidiĝas ruĝ' kun roso,
urbe floroj pompas en prospero.

Lamento pri mia pajlkabano damaĝita de l' aŭtuna vento

Aŭgusta vento muĝas en aŭtuna la vetero,
forblovas pajlojn de l' tegmento de kabano mia.
Jen ili flirtas al la suda bordo trans rivero,
sur arbopintoj alte pendas kelkaj pajlaj tigoj,
aliaj sur malaltajn kampojn falas kun leĝero.

La buboj de l' vilaĝo suda venas kun defio
al mia malfortig' kaj rolon de rabisto ludas,
forportas pajlojn en bambuojn eĉ sen simpatio.
Mi ne reteni ilin povas per vokad' raŭkiga,
mi devas min apogi al bastono kun ĝemkrio.

Momente post ventado svarmas peĉe nigraj nuboj,
tuj la ĉiel' aŭtuna nebuliĝas en malhelo.
La litkovril' trupleonas pro endorma piedpuŝoj
de filĉjo kaj pro uz' multjara fridas kvazaŭ fero.
Pluvakvo likas el tegmento tie kaj ĉi tie,
neniu loko sekas pro senĉesa pluv-kruelo.
De la ribel-tumulto mi malmulte dormas pace,
kiel mi povus dormi tra la nokto en sufero?

Mi volus, ke mil kaj mil altaj domoj jen stariĝu
por ŝirmi ĉiujn povrajn la plebanojn en la mondo,
ke ili ĝoju en la domoj firmaj kiel monto.
Ho ve!
Se mia kabanaĉo tuj fariĝu domo tia,
preferus morti mi en frosto vere tragedia !

Belulino

Belulino sen rivalo
loĝas sola en profunda valo.
De rangulo alta
ŝi devenas en la stat' bonfarta,
tamen ŝi nun sen plezuro
vivas inter herboj de la ruo.
En milito de ribelo
mortis ŝia frato sub glavpelo.
Spite al altranguleco
la kadavr' traktiĝis ne laŭ deco.
En vulgara la hommondo
ĉio flosas blinde sur la ondo.
Ŝia edzo dandas fole,
li sin turnas al belin' frivole.
Floro konas tempon flori,

la ambirdoj ne deziras soli.
 Ridas li al novedzino,
 ploras ja malnova la virino.
 Klaras akvo el montfonto,
 sed sordidas ekstere de l' monto.
 Ŝi elvendas por vivteno
 la juvelojn pro la viva premo.
 Por ripari la kabanon
 ŝi nur emas uzi la lianon.
 Ŝi deŝiris floron vole
 ne por kapon dekori petole.
 Ŝi derompas kun prefero
 cipresbranĉojn al si kun fiero.
 Jen en frosta la vetero
 ŝia vest' tro mincas por la gelo.
 ŝi nur staras ĉe vespero,
 dorse kontraŭ la bambu' sen celo. ※



el interreto

Hu San (Ĉinio)

Rekuniĝo

unuakta komedio

Personoj: Perantino por geedziĝo (P)

Klientino A (A)

Kliento B (B)

Sceno: la oficejo de geedziĝagentejo, kie staras tablo kaj du sofoj kaj kelkaj simplaj mebloj.

(Kiam la kurteno leviĝas, la perantino sidante antaŭ tablo foliumas paperojn.)

(Klientino eniras kaj frapas je la pordo de la oficejo. Aŭdinte la frapojn, Perantino stariĝas kaj iras malfermi la pordon de la oficejo.)

P (*entuziasme*): Saluton. Bonvole eniru. Unue sidigu en la sofo. Mi alportos tason da akvo por vi.

(A sidiĝas sur la sofo kaj ĉirkaŭrigardas la oficejon. P alportas la akvon.)

A (*prenas la akvotason*): Dankon.

P (*ankaŭ sidiĝas sur la alia sofo*): Nedankinde. Ĉu mi povus vin helpi?

A (*dankeme*): Jes, mi volas, ke vi prezentu al mi estontan edzon konvenan al mi.

P: Ĉu vi bonvolus doni al mi viajn rilatajn informojn pri viaj personaj detaloj? Per tiuj detaloj mi povos serĉi la konvenan personon en la dateno de komputilo.

A (*heziteme*): Ha jes. Antaŭ tri jaroj mi divorcis kun mia edzo kaj nun mi vivas kune kun mia filineto. Ĉijare mi aĝas tridek kvar jarojn. Mia gepatroj estas sanaj, sed ili vivas en la hejmloko. Mi laboras en superbazaro ok horojn ĉiutage. Pro mia laboro mi devas konfidi mian filineton al najbara maljunulino bonkora, zorgema kaj akordiĝema. Kompreneble mi devas pagi al ŝi mil juanojn por ŝia vartado al mia filineto. Kiam mi revenas el la laboro, mi prenas mian filineton hejmen kaj manĝis kune kun ŝi. Unuvorte mi vivas solece kaj seninterese.

P: Do, vi venas ĉi tien trovi la alian duonon de la estonta vivo, ĉu ne? Momenton, mi notu vian staton en la komputilo. *(Ŝi stariĝas kaj iras al la tablo. Ŝi enmetas kion ŝi ĵus diris en la komputilon. Post du-tri minutoj ŝi sidiĝas en la sofo kontraŭ A.)*

P (*fervore*): Nu, kian postulon vi havas de li? Donu al mi detaloj pri li, ekzemple, liaj aspekto, karaktero, salajro, domo, aŭto, profesio.

A (*ekpensas iome*): Mi ne esperas, ke li havas luksajn domon kaj aŭton, malde pli, ke li estas milionulo. Mi estas ordinara virino. Mi nur volas ke li pasigos tagojn harmonie kun mi kaj mia filineto. Fakte mia antaŭa edzino estas fidinda viro. Nur pro bagatelo ni kverelis kaj mi senracie proponis eksgeedziĝon. Sed nun, kiam mi

ekpensas pri li, mi sentas grandan penton. Kvankam li ne belaspekta, li estas bonkora, sincera kaj simpatia, precipe tre zorgema pri mi kaj mia filineto. Ĉiudimanĉe li venas al mia hejmo kaj ludas kun la filineto du aŭ tri horojn. La filineto tre domaĝas lian foriron kaj vole-ne-vole diras adiaŭ al li. Ankaŭ mi tre hontas konfesi mian eraron. Kiel absurde mi faris senprudentan eraron. Mi ĉiam tenas liajn bonojn en la koro. Nun mi volas, ke mia estonta edzo havu lian karakteron: fidinda, bonkora, simpatia kaj zorgema.

P (*laŭde*): Jes, via antaŭa edzo estas modela edzo en ĉi-tempa vivo. (*meditas momenton*) Antaŭ tri tagoj mi akceptis klienton, kiu venis trovi sian vivkompanion. Momenton, lasu min konsulti la komputilon. (*stariĝas kaj iras al la komputilo.*)

P (*post kelkaj minutoj revenas al la sofo*): Kia koincido! Li estas du jarojn pli aĝa ol vi. Lia aĝo konvenas al vi. Li laboras en kompanio de la urbo. Nun li vivas en luita ĉambro. Laŭ lia memprezento, li estas bonkora, sincere, simpatia kaj zorgema viro. Li divorcis ankaŭ antaŭ tri monatoj. Ĉu vi volantas vidi lin en ĉi oficejo?

A (*agitiĝe*): Se eble, jes.

P (*preskaŭ elsaltas pro ĝojo*): Nun mi telefone kontaktu lin. (*iras al la tablo kaj levas aŭdilon, turnas la ciferplaton*) Ho la, ĉu vi estas sinjoro Li? Mi estas geedziĝagentejo C. Ĉi tie ni havas klientinon. Ŝia postulo al la estonta edzo ĝuste kongruas al viaj kondiĉoj. Ĉu vi bonvolus veni ĉi tien? Bone, ni atendu... (*revenas al la sofo*) (*Post pli ol dek minutoj aŭdiĝas frapoj sur la pordo. P tuj stariĝas kaj malfermas la pordon.*)

P (*verve*): Saluton, sinjoro Li! Rapide envenu!

(*Envenas alta kaj maldika viro, vestita en nete okcidentstila kostumo. Li ĝentile balancas la kapon al P kaj A. Je ekvido de li, A surpriziĝas kaj anhelas pro emocio. Ankaŭ B ŝtoniĝas.*)

P (*mire*): Ĉu vi konas unu la alian?

A (*honteme*): Li estis mia antaŭa edzo...

(*Vidante ilin amabŭ en embaraso, P hasteme sidigas B en la sofon.*)

P (*proponas*): Mi plibone retiriĝu kaj vi du bone babilu. (*eliras el la oficejo*)

A (*eksplozas per ploro*): Em...em... Kial vi troviĝas ĉi tie? Mi tre pentas... ke ni divorcis. Nia filineto vin bezonas... ankaŭ mi. Tiutage mi ne devus...

B (*konsole*): Ne ploru. Nun ĉio estas en ordo. La pasinta jam forpasis. Fakte mi ĉiutage sopiras al vi kaj nia filineto. (*stariĝas el la sofo kaj aliras ŝin. B firme brakumas A kaj donas al ŝi kison*)

(La kurteno lante falas.)

Lin Long (Ĉinio)

Rakonto pri pluvombrelo

unuakta dramo

Personoj: studento A
studento B
studentino

Sceno:

Pluvegas. Malserena ĉielo.

Starante ĉe la pordego de la biblioteko, bela kaj delikata studentino gapas al la pluvego. Vidinte tion, Studento A ekprenas pluvomrelon el la deponejo kaj donas ĝin al ŝi.

Studento A (al ŝi): Prenu ĉi tiun pluvomrelon kontraŭ la pluvo.

Studentino (kun ĝojo): Bone. (Kun malĝojo) Sed... sed kion vi farus sen ombrelo?

Studento A: Ne zorgu pri mi. Mi havas alian ombrelon.

Studentino: Sinceran dankon al vi!

Studento A: Ni estas kunstudentoj en la sama lernejo. Kial vi estas tiel ceremonia?

Studentino: Kiel mi povos redoni ĝin al vi?

Studento A (ridas): Se ni estas destinitaj renkontiĝi, vi povos revidiĝi kun mi.

Studentino (dankeme): Do, mi foriru!

Studento A: Bonorde!

Ŝia dorsfiguro iom post iom malaperas en pluva nebulo.

Studento A prenas sian propran ombrelo kaj pretas reiri.

Studento B freneze elkuras el la biblioteko kaj laŭtvoĉe krias, "Kiu forprenis mian ombrelon? Kiu diable forprenis mian ombrelon?" Ĵetinte ekrigardon al li, Studento A sin turnas kaj foriras.

Sur la vojo kondukanta al domo por studado de studentoj, Studentino malrapide iras levinte ombrelon en pluvo.

Irante, ŝi ridas penseme.

Studento B, kiel malsekigita koko, kolere kuratingas ŝin.

Studento B (anhelante ĉe Studentino): De kie vi prenis ĉi tiun ombrelon?

Studentino (vekiĝinte al pensemo kun rideto ankoraŭ sur la vizaĝo): Kion vi diris?

Studento B: Mi diris, ke la ombrelo estas la mia.

Studentino: Ke ĉi tiu ombrelo estas la via? (skuas la kapon) Neeble, neeble!

Studento B: Ĉu mi ne povus rekoni mian ombrelon? Mia nomo estas skribita sur ĝi.

Se vi ne kredas, serĉu sur ĝi.

Studentino: Kiel vi nomiĝas? (*mallevinte la ombrelon, serĉas zorgeme*).

Studento B: Johano. Serĉu bone.

Studentino (*murmuras dum serĉado*): Jo-ha-no. Jes, jen Johano sur ĝi!

Studento B: Mi ĵus certis, ke ĝi estas mia ombrelo.

Studentino: Sed, sed ĝi estas donacita al mi de alia studento!

Studento B: Tamen li donacis al vi mian ombrelon, sed la lian!

Studento A dronas en la sentoplana rememoro pri la studentino, al kiu li donacis la ombrelon.

Lia pensfadeno estas interrompita de la disputo inter Studentino kaj Studento B. Kun koleremo

li iras antaŭen pacigi ilin.

Studento A: Vi du estas tro... (*turnas la kapon al ili, li ege surpriziĝas*)

Studentino: Jen estas li. Li donacis al mi la ombrelon (*montras sian fingron al Studento A*)!

Studento A: Pardonon al mi pro mia ĝeno (*tuj sin turnas por foriri*).

Studento B (*ekkaptas lian ŝuktron*): Ĉu vi donis ĉi tiun ombrelon al ŝi?

Studento A: Kion vi diris? Mi ne komprenas.

Studentino: Estas vere, ke vi donacis ĝin al mi. Kial vi ne konfesas?

Studento A: Fraŭlino, mi ne konas vin!

Studento B: Ŝajne, se mi ne pugnobatus vin, vi ne dirus la veron! (*donas pugnobaton en lian vizaĝon. Li tuj falas sur la teron.*)

Studentino: Mi donu piedbaton al li (*iras antaŭen doni al li piedbaton*).

Studento B: Sufiĉe! Estas mia vico (*tiras lin supren kaj donas alian pugnobaton al lia ventro, kaj li falas teren denove.*)

Studentino: Nun estas mia vico (*iras antaŭen piedbati lin*).

Studento A (*feble kuŝas sur la tero*): Vi ambaŭ estas tro... tro krudaj!

Studento B: Kio? Ĉu vi ankoraŭ ne submetiĝas? (*volas iri antaŭen doni al li alian baton, sed ŝi retenas lin.*)

Studentino: Bone, bone, li jam ricevis indan punon. Lasu lin for!

Studento B (*kolere rigardante lin*): Se vi petus pardonon anstataŭ li, mi nepre tanu al li la haŭton!

Studentino (*honteme*): Pardonon! Mi prenis vian ombrelon.

Studento B: Ne gravas. Tio kaŭzas miskomprenon. Ĝuste pro li ni miskompreniĝas (*volas iri antaŭen bati lin kaj ŝi retenas lin denove*).

Studentino (*mallevas la kapon kun hontemo*): Ĉu vi povus akompani min hejmen?

Studento B (*ekscitite*): Grandan honoron por mi! Grandan honoron por mi! (*sub la sama ombrelo ili ambaŭ laŭgrade malaperas en pluva vualo.*)

Studento A (*ankoraŭ malforta kuŝas sur la tero*): Ne, ne forlasu min...

(La kurteno malrapide falas.)

Laimundas Abromas (Litovio)



Iomete el la vivo de mia familio

Antaŭ nelonge mi tralegis libron “Nia diligenta kolegaro”. Tamen pri mia avo Paŭlo mi trovis nenion skribita. En la fino de la libro iu per kraĵono alskribis “tre interesa libro”.

Nun pri esperantistoj oni ne plu volas eldoni librojn. Esperantistoj ne estas konsiderataj kiel ekzemplo al aliaj. Hodiaŭ tio ne plu modas. Esperantistojn oni eĉ

aŭtoro Laimundas Abromas

priridas hodiaŭ. Sekve, al ili ĉio mankas. Ili mem ne scias, kion ili volas. Ili multe vojaĝas, sed nenion vidas. Kaj vojaĝinte ili interkomunikiĝas kun similaj al si mem, kiuj ankaŭ nenion vidas. Pro tio ili parolas nur pri internacia lingvo, problemoj de interkomunikado. Kion ili legas? Sed kiun tio interesas?

Kiam en la junaĝo, pro neniu kaŭzo, subite ŝanceliĝis, eklamis ĉe mia avo Paŭlo lia konscienco kaj honoro, li diris al si mem: “Mi devas plenumi mian mision, sed mi ne scias, kio ĝi estas. Tamen la tempo kuras kaj forportas ĉion la plej bonan. Mi jam maltrankviliĝas. Do, mi iros por ekkoni la mondon”. Kaj li eksentis sin la civitano de la mondo. Multaj gesamideanoj pensis, ke li malaperis sencie. Tio ne veras! Kiam ĉio enuigis lin, ĉio tedis, mia avo forvojaĝis eksterlanden. Restigante patrujon, mia avo pensis: “... sed pro kio mi devus vojaĝi al Londono, Parizo aŭ Romo? Pro kio tiuj urboj estas pli valoraj ol aliaj?” Rifuzante la tradicion, mia avo decidis vojaĝi al Istanbul.

Dum lia vojaĝo, konstante lin haltigadis la policistoj, limgardistoj, doganistoj. Al ili ŝajnis, ke mia avo portas kontrabandon. Sed avo mia ne koleris kontraŭ ili. Tia estis lia vizaĝo: kripla, suspektinda. Dum longa vojaĝo mia avo laciĝis kaj jam ne plu volis iri. Tamen sciis li: ion ĉesi - facilas, sed komenci denove - malfacilas. Avo mia stringis la pugnoj kaj iris pluen, “...nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan..., obstine antaŭen!..., ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita ĝi estas, la voj’ elektita.” - li kuraĝiĝis sin. Avo mia rememoris Simeonon, la kluban gvidanton. Kun li mia avo ofte konfliktis. Disputi kun la homo, al kiu ĉiam ĉio klaras, neniam indas. Al tiu, kiel homoj diras, prefere oni lasu la vojon. Sendube tio pruvis, ke io estis malbona. Tamen pri tio li indiferentis. Li nur pensis, “Kio okazos al Esperanto?...Jes, neniu nin venkos... Esperanto estis, estas kaj estos. Ni scias nian vojon kaj iros ĝis la fino... Jam ne malproksimas.” Esperantisto – kio li estas? Ĉu

vivmaniero, nacienco aŭ profesio?” cerbumis mia avo. “Esperantistoj nun tre multe parolas. Tamen ĉio jam estas dirita, ĉion diris nia majstro Zamenhofo. Kion aldoni pli?” pensis la avo. Tiel pensante kaj cerbumante mia avo finfine sukcese atingis Istanbulon. En Emirgan korusu li decidis halti por ripozo. Kaj tiu lia ripozo iĝis al li fatala kaj lian vivon ŝanĝis por eterne, esence. Tie en la arbareto li renkontis indiĝenan belulinon Antus. Li prenis ŝian manon, kaj ŝi lasis ĝin ridetante kaj okulumante per tiaj okuloj..., per tiaj bluaj okuloj... Ŝiaj okuloj vokis lin kaj li sekvis ŝin, prefere vi ne demandu. Mia avo dronis en la profundo de ŝiaj okuloj. Li enamiĝis kaj baldaŭ ŝin edzinigis. Ili vivis longe kaj bele. Kaj al ili naskiĝis filo Saŭlo, kiu estis denaska esperantisto. Kaj Saŭlo kreskis kiel forta, belstatura, scivolema kaj aktiva knabo. Maturiĝinte li ankaŭ ne longe restis hejme, forlasis gepatran domon kaj vojaĝis al Ĉinio. Tie en urbo Ŝanhajo, sur la bordo de Yangzi- rivero, li konatiĝis kun loka ĉarmulino Shanshan Hong. Ŝi estis belstatura, nigrahara, belvoĉa kaj afabla. Ŝia voĉo lulis Saŭlon kaj li perdis la kapon. Shanshan ravis lin. Saŭlo ekamis Shanshan kaj baldaŭ ŝin edzinigis kaj ili vivis longe kaj feliĉe. Kaj en ilia familio naskiĝis mi - Lai Mondo. Vi demandos, kion oni konkludu el tio ?

Nun, kiam mi legas la verkaron de mia avo, mi vidas, ke li skribis prave. Kaj homoj tion taksis. Tia estis la tempo. Kaj vi hodiaŭ provu skribi la veron... Kiu legos? Hodiaŭ ĉiu havas sian propran veron. Kaj el tio sekvas, ke vero ne plu restis. Al mi ŝajnas, ke vero estas tio..., ke vero devas esti nur unu. Kaj tiam sciis ĝin nur unu homo. Vere, mi estas rekta posteulo kaj mi scias veron. Tamen kio postsekvas el tio, se mi anoncos: “Unu mondo – unu lingvo”. Ĉiuj nur ridos.

Por ke mi komprenu, kio mi estas, mi provas percepti min influantajn ligojn de miaj prauloj. Ja ni alvenas en tiun ĉi mondon kun praula animo, spirito, ilia sperto, sufero, streboj. Mi ekcerbumas profunde kaj enhave, pri la homo inter la homoj. Mi longe pesis la faktojn kaj finfine kaptis la veron: la sorto estas kruela. Ĝi regas la pulson de la vivo. Al unuj ĝi malvarmas, al aliaj - ne.

Hodiaŭ la vojoj al ĉiuj estas malfermitaj, liberaj. Kiu ne timas defiojn, tiu iras malproksimen kaj multon atingas. Sed mi estas terura, plena mallertulo. Estas homoj kun malagrabra aspekto, sed - afablaj, bonkoraj. Sed mia aspekto estas malbela kaj la karaktero mia – tiel same malbonas. Ĉiuj atendas, kiam malfermiĝos mia interna beleco. Tamen mia interna beleco des pli malbelas.

Venas tagoj, kiam mi rigardas transhorizonten... La vojo... Kaj survoje okazas aventuroj, renkontiĝoj... Ĉu ne? Sed de kie vi tion scias? Ĉu vi legis en la libroj aŭ spektis en televido? Se vin logas vojaĝo, tio signifas, ke viaj proksimuloj estas enuigaj, tedaj. Sed kiaj estas viaj proksimuloj, tia estas vi mem. Kiu volos konatiĝi kun tia? Vi ĉiujn nur turmentas. Via loko - en la sako. Pro tio mi ne kuraĝas vojaĝi kaj restas hejme. *

Vejdo (Ĉinio)

Ĉinesko el la Ĉina Saĝo

(prelega teksto)

1. Difino de ĉinesko

En Esperanta poezio, troviĝas kategorio de fiksfarmaj poemoj, interalie, soneto, rondelo, robaĵo, limeriko kaj japaneskaj hajko kaj utao estas konataj kaj ŝatataj de diverslandaj esperantistoj. Ĉinesko devas esti grupigita al ĉi tiu kategorio. La komuna trajto de tiuj poemoj estas, ke ili havas sian fiksitajn skemon: nombro de silaboj, nombro de verslinioj kaj rimado. Ekzemple, rondelo, tre fama pro la kolekto 'rimportreto' far Kalocsay, havas 13 versliniojn kaj rimaranĝon de ABba, abAB, abba, A, kaj ripetadon de kelkaj verslinioj. Alia ekzemplo estas hajko, la plej simpla fiksfarma poemo, kiu havas la skemon kun tri verslinioj de 5,7,5 silaboj, kun aŭ sen rimado. Do, ni ĉinoj ankaŭ havas niajn fiksfarmajn poemojn. Ni nomas ilin ĉinesko. Ĉinio estas lando de poemoj, kies poemspecoj kaj skoloj de poemoj superas tiujn de ĉiuj aliaj landoj. Ĉinesko nur inkludas *Ci*-on verkitan de poetoj dum Tang- (618-907 p.K.) kaj Song- (960-1279 p.K.) dinastioj.

Kiam temas pri ĉinesko, oni devas paroli pri *Ci*, grava branĉo de ĉina antikva poezio, ĉar ĉinesko fakte estas esperantigo de *Ci* preskaŭ en ĉiuj flankoj. *Ci* havas historion de ĉirkaŭ 1300 jaroj. Kun tempopaso, ĝi plene disvolviĝis kaj iom post iom formiĝis pli ol du mil skemoj. Ĝis nuna tempo multe da homoj ankoraŭ emas verki per tiuj skemoj. La trajtoj de *Ci* konsistas el nombro de verslinioj, nombro de silaboj en ĉiu verslinio, rimado kaj tonado de ĉiuj ĉinaj ideogramoj (ekzemple: mā má mǎ mà). Kompreneble tiuj trajtoj iel katenas la penson de verkantoj, tial kelkaj proponas reformadon de *Ci* en moderna ĉinlingvo, i.a. ili forigas tonadon de ĉinaj ideogramoj. Ŝajnas al mi, ke la reformita *Ci* ankoraŭ konservas sian belecon en sonoj kaj formo. Koincide estas, ke, en sia libro 'Esperanta Metriko', s-ro Guozhu, kiu estas la iniciatinto de ĉinesko, enkondukis la koncepton de *Ci* en Esperanta vesto, kaj forigas ankaŭ tonadon de ĉinaj ideogramoj, ĉar en Esperanto mankas tonado de vortoj.

En 1973, s-ro Guozhu aperigis kelkajn ĉineskajn poemojn en 'El Ĉinaj Esperantistoj' (presita mimeografe) laŭ la skemo *sopir-al-sudo*, kaj de tiam startigis verkadon kaj kreadon de ĉineskaj poemoj.

Ĉu fajro

sovaĝa povas

forleki herbojn? Ho ne!

Jen vent' printempa blovas,

kaj herb' jam novas!

En pluvet'
dorse sur azen'
veturante la poet'
lulis sin per rava tem'
taŭga por poem'.

(la skemo konsistas el 5 verslinioj de 35,77,5 kun rimaranĝo xa,xa,a)

Tiu iniciato markas la pioniran inaŭguron de ĉinesko en Esperantujo. Kompare kun aliaj fiksfarmaj poemoj, ĉinesko havas siajn proprajn trajtojn, kiujn difinas s-ro Guozhu en sia libro 'Ŝlosilo de Ĉinesko'. La skemoj de ĉinesko ĝenerale konsistas el fiksitaj nombro de strofoj, verslinioj, silaboj en ĉiu verslinio, kaj rimaranĝo. S-ro Guozhu reformis 82 skemojn el pli ol 2000 ĉinaj antikvaj *Ci*-ojn, nur foriginte la tonadon de ĉinaj ideogramoj. Pro tia strikta difinado de diversspecaj skemoj, ĉinesko jam estis preta por praktika kreado.

Fakte la vorto ĉinesko estas elmetita de Esperanto-poeto Edwin de Kock (1930-) el Sud-Afriko, kiam li verkis poemon laŭ la formo de ĉina antikva poemo. Evidente li volis per ĉi tiu vorto esprimi, ke, tio, kion li verkis, estas ĉinstila poemo. Mi supozas, ke s-ro Guozhu pruntis tiun vorton kiel kolektivitan nomon de esperantigitaj *Ci*-oj (ĉinaj fiksfarmaj poemoj).

2. Estetikaj valoroj de ĉinesko

Ĝenerale ĉineskaj poemoj prezentas belecon en tri flankoj pro siaj unikaj strukturo kaj rimaranĝo: beleco en formo, beleco de sonoj kaj beleco de artisma ideo.

a. Beleco en formo:

Pro malsamaj longecoj de verslinioj (en Ĉinio oni alinomas *Ci*-on poemo kun longaj kaj mallongaj frazoj), la ĉineskaj poemoj montras sian naturan geometrian belecon en formo, se oni aranĝas ilin dekstren, maldekstren aŭ mezen de la paperpaĝo.

Omaĝe al Zamenhofa Tago

malfacile
forpasis
jam jarcento
plena je
brava, spita
prominento
plenkreskas nia lingvo
ja per via talento

surbaze
de Fundamenta
idento

ĉe festa
momento
en sankta
silento
ni adeptoj firmaj
kun konsento
omaĝas benojn belajn
vide al firmamento
respekte
al vi, kun pia
am-sento

Omaĝe al Zamenhofa Tago

malfacile
forpasis
jam jarcento
plena je
brava, spita
prominento
plenkreskas nia lingvo
ja per via talento
surbaze
de Fundamenta
idento

ĉe festa
momento
en sankta
silento
ni adeptoj firmaj
kun konsento
omaĝas benojn belajn
vide al firmamento
respekte
al vi, kun pia
am-sento

Omaĝe al Zamenhofa Tago

malfacile
 forpasis
 jam jarcento
 plena je
 brava, spita
 prominento
 plenkreskas nia lingvo
 ja per via talento
 surbaze
 de Fundamenta
 idento
 ĉe festa
 momento
 en sankta
 silento
 ni adeptoj firmaj
 kun konsento
 omaĝas benojn belajn
 vide al firmamento
 respekte
 al vi, kun pia
 am-sento

Tiuj neregulaj formoj ĉiam plaĉas al okuloj de legantoj.

b. Beleco de muzikaj sonoj:

Origine *Ci* povis esti kantata laŭ ario (skemo), t.e. ĝiaj versoj povas adaptiĝi al melodio por kantado. Nature la rimado estas postulata de tiuj difinitaj melodioj. Pro longa tempopaso, tiuj melodioj perdiĝis, sed la strukturo de kantteksto konserviĝas. En unu skemo la sama rimo ripetas kelkfoje. La legantoj povas aŭdi la ripetatajn muzikajn rim-sonojn.

Ni sentas bedaŭron, ke ni ne povas aŭskulti la antikvajn melodiojn de ĉinesko, sed nuntempe, ni povas aprezi la kanttekston de *Ci* komponitan de moderna muzikisto.

Su Shi (1036-1101) (**Guozhu** elĉinigis)

Demando sub la Luno

— laŭ ĉinesko Shuidiaogetou*

Kiam ekestas/ la luna helo?

kun ĝlas'mi demandas/ al la ĉielo.
 Kiujare, mi ne/ scias, nun estas en/ ĉiel-kastelo?
 ĉu tie, alte,/ nun regas gelo?

Ho, kiom/ sorĉas la/ lunhelo!
 Mi flugu al/ la palac'de fabelo!
 sed mi ankaŭ timas/ ke min turmentas la/ frosta kruelo.
 Restu mi tere/ Dancu sub stelo!

En la poemo la rimo –elo ripetiĝas kaj donas la efikon de muzikaj sonoj.

c. Beleco de artisma ideo

Bonaj poemoj ĝenerale havas belecon de artisma ideo. Oni ankaŭ povas trovi multege da bonaj ĉineskaj poemoj kun beleco de artisma ideo. Mi citu nur kelkajn ekzemplojn por ilustru ĉi tiun trajton de ĉineskaĵoj.

S. Asta (Svedio)

Ĉi

—laŭ ĉinesko *Dekses-Silabo*

Ĉi

arda ĉirkaŭbrak' de vi,

ja por mi

estas poezi'.

Kial ĉirkaŭbrak(um)o estas poezio? Tio ja estas pensiga.

Maŭnan (Ĉinio)

Nokte

—laŭ ĉinesko *Silk-lava roĵo*

Nova lun' sur firmament',

reve mi jam sur krescent'

vagas tra la stel-torent'

Ĉu vi dolĉe dormas nun?

Mi do remas en silent'

vian sonĝon post moment'.

Tiu ĉi poemo prezentas trankvilan sonĝan bildon kaj senfinan sopiron de geamantoj.

Cindy Mckee (Usono)

Sonĝo de akvoguto

—laŭ ĉinesko *Genglouzi*

Guteto

scintilas,

silente oscilas
 sur sojlo.
 Sinnulo,
 nur mondspegulo.

Gutego
 graveda
 de bildo hereda,
 hezitas
 ĉe falo—
 ties realo.

La supra poemo estas tre bela en ideo. Tra akvoguto oni povas imagi multon el la poemo.

Ni ne havas sufiĉan tempon por aprezi ĉiujn gemojn el ĉineskaj poemoj. Tio facete pruvas, ke ĉineskaj poemoj same vekas la artisman inspiron de poetoj.

3. Esprimiveco de ĉinesko

Kiel alispecaj poemoj, ĉineskaj poemoj ankaŭ povas esprimi libere momentajn sentojn, pensojn kaj naturajn fenomenojn. Krome, oni povas trovi fablojn, fabelojn kaj rakontojn verkitaĵojn per ĉineskaj versoj. La esprimiveco de ĉineskaj poemoj ankaŭ videblas en adaptado de aliformaj poemoj. La plej rimarkinda kontribuo estas adaptado de “Ezopa Saĝo” verkita de K. Kalocsay. Vejdo adaptis la tutan libron per diversspecaj skemoj de ĉinesko. Tio almenaŭ manifestas, ke ĉineskaj poemoj povas esprimi la samajn eventojn kaj sentojn kiel aliaj poemoj. Inter tiuj adaptitaj poemoj troviĝas la plej longa ĉineska poemo *Ezopo* adaptita de Vejdo el *Ezopa Saĝo* entenas 176 pecojn de la ĉineska skemo *Sopir-al-sudo*, entute 850 versliniojn. Tio signifas, ke ĉinesko povas rakonti anekdotojn kaj historietojn, ĉu longajn ĉu mallongajn. Ekzemple, en kolektoj de ĉinesko ni povas trovi kelkajn interesajn rakontojn kiaj “*Knabino kun alumetoj*”, “*Nova vesto de la reĝo*”, “*Princino sur la pizo*” (adaptitaj el Andersen), “*S-ro Dongĝo kaj lupo*” (ĉina fablo) kaj aliaj.

Aliflanke ĉineskaj poemoj ankaŭ povas bone prezenti samajn ideojn de aliaj poemoj per delikataj tuŝoj. La interesa ekzemplo estas la esperantaj tradukoj de irlanda poeto de Yeats “*When you are old*”. Oni elangligis tiun poemon per du skemoj de ĉinesko ‘*Sopir-al-sudo*’ kaj ‘*Qinyuanchun*’ respektive kaj fidele prezentis la saman senton de la poeto.

William Butler Yeats (1865~1939)

(When you are old and grey and full of sleep,
 And nodding by the fire, take down this book,

And slowly read, and dream of the soft look
Your eyes had once, and of their shadows deep;
How many loved your moments of glad grace,
And loved your beauty with love false or true,
But one man loved the pilgrim Soul in you,
And loved the sorrows of your changing face;
And bending down beside the glowing bars,
Murmur, a little sadly, how Love fled
And paced upon the mountains overhead
And hid his face amid a crowd of stars.)

Kiam Vi Oldos

— laŭ ĉinesko sopir-al-sudo

kiam vi
oldos en futur'
plenplena je grizo kaj
dormemo sen ajn plezur'
kapklinante nur

ĉe fajro
legu bonvole
ĉi libron de poemar'
lante kaj senparole
legu senfole

prisonĝu
ekrigardojn de
via pasinteco kaj
profundan ombraron ĉe
la okulmuze'

prisonĝu
kiom da homoj
ŝatis gracilajn movojn
viajn kaj kun sindonoj
kaj kun korbonoj

kaj ŝatis
vian belon jam
ĉu el hipokrita mav'
aŭ el la korfunda am'
kun softa akklam'

sed estis
unu sola vir'
li amis pilgriman en
vi animon kun sopir'
kaj ama aspir'

li arde
amis elkore
la ĉagrenojn de via
vangoj ŝanĝemaj hore
kvazaŭ aktore

klinu sin
ĉe fajro pie
murmuru kun pentdolor'
ke fuĝis amo strie
kaj senkonscie

en montojn
kaj kaŝis ŝtele
sian ĉarman vizaĝon
inter steloj malhele
flagraj ŝancele

Kiam Vi Oldos
—laŭ ĉinesko Qinyuanchun
I.
kiam oldos
vi grizeta
kun dormem-plen'
kapklinemante
ĉe la fajro

ĉi libreton
per la manpren'
legu lante
kaj prisonĝu
la intan rigardon sen
malĝojo
kaj densajn ombrojn
profundajn en

via okuleden'
kiom da
homoj jen sen ĝen'
ŝatis momentojn
de gracila
via ĝojad'
kaj la bonven'
ŝatis vian
belon aŭ el
vera koro kun kompren'
aŭ el sent'
hipokrita kun
malvera ben'

II.

sed nur unu
en la mondo
fortika vir'
amis animon
pilgrimantan
vian kun pi'
kaj kun admir'
amis ĝenon
kaj ĉagrenon
sur viaj vangoj de bril'
ŝanĝemaj
ĉiam plenplenaj
je viv-aspir'

Kaj kapklinu sen dir'
 murmure
 kun eta suspir'
 ĉe flamanta fajr'
 kiel Amo
 fuĝis foren
 sen manakir'
 en la montojn
 superkapajn
 kaj kaŝis sin kiel glir'
 inter grup'
 da steloj brilaj
 sen ajna spir'

Kompreneble ni ne havas tempon ĉi tie analizi la tradukojn. Mi nur volas ilustrati per tiuj tradukoj, ke ĉineskaj poemoj povas esprimive eligi sent-nuancojn de poetoj. Mi estas certa, ke se necese, oni povas traduki ĉi tiun poemon per diversaj skemoj de ĉinesko.

Aliflanke kelkaj skemoj de ĉinesko helpas esprimi diversajn tonojn (tristan, ĝojan, sarkasman k.a.). Mi nur citu kelkajn ekzemplojn:

Guozhu (Ĉinio)

AMO

—laŭ ĉinesko *Chaitoufeng*

Dolĉa am',
 juna flam'
 lulis nin feliĉa gam'.
 Ni ja tre
 dubis ke
 kiuj folis
 pli ol ni ge?
 Ne,
 ne,
 ne!

Kurta am'
 pasis jam.
 Estingiĝis juna flam'.
 Min ja tre
 ĝenis ke

ĉio iĝis
morta pase'.
Ve,
ve,
ve!

En ĉi tiu poemo videblas unue ĝoja kaj poste desaporanta sentoj.

Miĉino (Ĉinio)

Malĉipa Pugo
—laŭ ĉinesko Flirta Kanto
Pugo, pugo,
eĉ en ofic-flugo
ankaŭ rangojn havi
ne forgesis pavi.
Vipa, vipa
draŝ' al luks' malĉipa.

Oni povas senti sarkasman kaj abomenan sentojn de la poeto.

Ankaŭ menciindaj estas poemoj kun erotika enhavo. Por ne ofendi la okulojn de iuj aŭskultantoj, mi ne aperigos konkretajn poemojn, sed mi nur montras du librojn kun erotikaj ĉineskaj poemoj. La unua estas *Sekretaj Ĉineskoj* de Lily kun pli ol cent pecoj de erotikaj ĉineskaj poemoj, kaj la alia *Ovra Burĝono* de Sceto kun 20 pecoj.

Por ilustrati esprimivecon de ĉinesko, ni havas multajn ekzemplojn. Estas evidente, ke ĉinesko havas grandan spacon por poetoj (ĉineskistoj) disvolvi iliajn imagpovon kaj subtilajn tuŝojn de sentoj. Kompreneble pro limigo de nombro de silaboj kaj rimado, oni ne povas laŭplaĉe esprimi siajn pensojn sen konsideri tiujn elementojn. Tial iom malfacilas verki ĉineskajn poemojn por ordinaraĵ esperantistoj.

4. Disvolviĝo de ĉinesko

Jam forpasis preskaŭ 40 jaroj, kiam la unuaj ĉineskaj poemoj kreiĝis. En 2007, ni kunvokis la unuan seminarion pri ĉinesko en Kantono, Ĉinio, kadre de la 7-a Ĉina Esperanto-Kongreso. En mia raporto, mi malprecize dividis la disvolviĝon de ĉinesko en du etapojn. La unua etapo iras de 1973, kiam aperis unuaj ĉineskaj poemoj, al 1999. Laŭ takso, en monata beletra revueto *Penseo* pli ol dudek aŭtoroj (inkluzive de tri eŭropanoj) aperigis ĉirkaŭ 200 ĉineskajn poemojn kaj 68 ĉineskaj skemoj estas uzitaj. Sed de 1999 al junio de 2006, verkado de ĉineskaj poemoj tute stagnis. Unuvorte la unua etapo eligis brilan sparkon, sed malfortan. La dua etapo komenĉiĝis je junio de 2006, kiam s-ro Vejdo lanĉis rubrikon 'Verkado de ĉineskaj poemoj' en la retejo *Lernado de Esperanto*. Kuraĝigite de s-ro Guozhu, nova ondo de verkado de ĉineskaj poemoj okazis. Kompare kun la unua etapo, evidente

multiĝas la ĉineskaĵoj kreitaj de ĉinaj kaj alilandaj samideanoj. La totala sumo atingas pli ol 1400 titolojn kaj pli ol 2000 pecojn (kalkulitaj laŭ skemoj), kaj ĉirkaŭ 90 skemoj estas uzitaj. En la unua etapo, oni ofte uzis pli mallongajn skemojn por verki poemojn, dum en la dua oni uzas pli longajn. Kaj krome la enhavo de poemoj de la dua etapo multe ŝanĝiĝis. Kompare kun la poemoj de la unua etapo, tiuj de la dua ne nur prezentas priskribadon de hazardaj ideoj kaj naturaj fenomenoj, sed ankaŭ longajn rakontojn. Tiuj poemoj, kiujn verkis ĉinaj kaj neĉinaj ĉineskistoj, estas kompilitaj en 20 kajeroj kun nomo *Ĉineske*. Tio kompreneble estas granda paŝo antaŭen en disvolviĝo de ĉinesko.

Okaze de la unua seminario pri ĉinesko, Guangdong-a Esperanto-Asocio eldonis 5 librojn de ĉinesko inkluzive de “*Ŝlosilo de Ĉinesko*”, “*Sekretaj Ĉineskoj*”, “*300 Sopir-al-sudoj*”, “*Ezopa Saĝo (Ĉineske)*”, “*Ĉineske (1973-2007.10)*”. Tio estas sukcesa resumo de kreado de ĉineskaĵoj post 37 jaroj ekde debutado de ĉinesko. Post la unua seminario, verkado plue daŭras, ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ internacie. En majo de 2009, en la franca retejo Ipernity, oni establis grupon ‘*Ĉinesko en Esperanto*’, ĝis nun jam varbis 66 membrojn el diversaj landoj. En la grupo la plej elstara verkanto estas usona esperantistino Cindy Mckee, kiu verkis pli ol 100 ĉineskajn poemoj laŭ dekoj da skemoj. Poste la redakcio de la retejo ‘Lernado de Esperanto’ kolektis ŝiajn ĉineskaĵojn kaj eldonis e-libron ‘Cindy Mackee Ĉineskas’. En la grupo multaj neĉinoj montras sian talenton en verkado de ĉineskaj poemoj. Ekzemple, en stafeta ĉeno de la skemo *Dekses-Silabo*, hungara esperantistino Erzsebet Tuboly ĉineskis mature:

am'
por maljunul' vera dram'
amiloj
ve, senutilas jam

am'
fajrero naskita flam'
frostiĝis
cindro estas jam

am'
korpa anima balzam'
doni ĝin
neniu venas jam

am'

bruligis korpon mian
sed kiam?
ĉu vere iam?

am'
maljunula epigram'
pri pasint'
beliga ornam'

Tiuj pecoj vere brilas en esprimoj en tiel limigita spaco. Ni ankaŭ povas trovi faman poeton de Esperanto, kiaj hungaro Imre Szabo kaj ĉino Mao Zifu, kiuj ankaŭ prezentis brilajn poemojn. Ni povas iugrade certi, ke ĉinesko jam estas konata kaj akceptata de pli da neĉinoj ol en la komenca periodo.

5. Perspektivo de ĉinesko

Kiel ĉinesko disvolviĝos? Sendube ĉinesko jam eniris en Esperantan Parnason, ĉu papere ĉu enrete. Kvanto de ĉineskaj poemoj jam superas tiun de kelkaj fiksfarmaj poemspecoj enkondukitajn en Esperanto. Ĝi jam fariĝis neignorenda poemspeco en Esperanto. Leginte ĉineskajn poemojn, la granda poeto William Auld estis tiel entuziasmigita ke li verkis favoran recenzon *Ekjuku la poeta mano* kaj esprimis sian bondeziron ke “Mi esperas, ke la tria eldono de Esperanta Antologio enhavu originalajn *Ci*-ojn ankaŭ de poetoj ne-ĉinaj.” (Fonto 175, p.29) Fakte, ĉineskajn poemojn aperigis neĉinaj revuoj, kiaj japana ‘Preludo’, ‘IPR’, la organo de ILEI, influhava beletra revuo ‘Fonto’, prestiĝa ‘Heroldo de Esperanto’, ‘Sennaciulo’, organo de SAT, kaj La Gazeto. Per klopodado de ĉinaj esperantistoj, ĉinesko vere disvolviĝas glate, kvankam iom malfacile.

Do, ĉu nenia problemo ekzistas en disvastigo de ĉinesko? Ĉio havas du flankojn. Kompreneble ĉinesko havas negativan flankon. Nun oni verve diskonigas al Esperantujo ĉineskon kun tiom da skemoj. Tio vere estas la plendo de kelkaj verkantoj kaj amantoj. Ĉu oni vere bezonas tiom da skemoj por prezenti ĉinstilajn poemojn? Fakte krom tiuj, kiuj studas kaj esploras ĉineskon, malmultaj povas akcepti ĉiujn ties skemojn. En praktiko, oni korinklinas al mallongaj kaj facilaj skemoj, kiaj *Dekses-Silabo*, *Sopir-al-sudo*, *Santaici*, *Busuanzi* k.a. Ni prenu *Dekses-Silabon* kiel ekzemplon. Se oni havas tri vortojn kun sama rimo, oni povas facile verki ĝin:

Kor'
Ĝojas kiel bunta flor'
Vi kara
Sopiras en for'

Por verki tian poemeton oni nur elspezas kelkajn minutojn. Kiel simpla afero! Pro tio, *Dekses-Silaboj* fariĝas la plej populara el ĉiuj skemoj de ĉinesko. En nuntempa socio, oni ne havas sufiĉan tempon por verki longajn kaj kompleksajn poemojn kun multaj limigoj. En praktiko, mi provis alvoki kelkajn neĉinajn esperantistojn por verki ĉineske, kaj ili respondis fervore al facilaj skemoj, sed langvore al la kompleksaj. Mi proponas, ke aŭtoritataj ĉineskistoj zorgeme elektu nur ĉirkaŭ dek skemojn, kiuj plej reprezentas la trajtojn de ĉinesko, por disvastigi. Tiel la ĉineskverkantoj povas koncentri sian atenton al la simplaj skemoj kaj ŝpari energion el la malsimplaj. Tio kompreneble utilas al disvolviĝo de ĉinesko.

La komenco estas ĉiam malfacila. Ankaŭ la starto de ĉinesko spertis malfacilan situacion. Nun, kiam ni retrorigardas la progreson de ĉinesko, mi devas mencii s-ron Gouzhu, la pioniro de ĉinesko, kies merito en saĝa iniciatado de unuaj ĉineskaj poemoj devas esti enskribita en la historio de Esperanta poezio. Ĝis nun, ni jam havas grandan kvanton da ĉineskaj poemoj prezentitaj de aŭtoroj ĉinaj kaj neĉinaj, kaj ni tute rajtas kredi, ke la perspektivo de ĉinesko estos brila kaj promesplena.

La fidela abio de cent jaroj

Je la tagiĝo, subite, mi vidis lian malhelan figuron en la fundo de ĝardeno, memorigante lin al mi! Li estas ĉi tie! Li reaperas fine malantaŭ la nudaj branĉoj! Kiel mi povas klarigi mian pacon vidante lin denove, sed ankaŭ mian doloron imagante la mankon de li!

Somero kaj aŭtuno foriris, kiuj distris nin per ilia abundo de parfumoj kaj koloroj. Diskrete starante apude, li rigardis, kun pacienco kaj memfido, la ĝojan paradon de fruktoj kaj floroj.

Nun la ĝardeno estas numure griza, la naturo ekdormis. Tamen li rezistas kaj trankviligas nin: la vivo daŭras! Pluvo, vento kaj neĝo povas defii lin senĉese, sed nenio ĝenas lin. Kiel lia modesta kaj konstanta verdeco dolĉas al niaj okuloj kaj al niaj spiritoj!

Liaj viglaj branĉoj ŝajne prenas el aero la energion, kiu lin tiel fortigas. Li estis ĉi tie cent jarojn, firma kunulo dum tiom da okazoj, fidela kunulo pri miaj mornoj kaj esperoj.

Kion ankoraŭ li diras al ni, kiam li etendas, kiel avo, la brakojn kovritajn per brileta neĝo al la mirigitaj infanoj? Ĝojo kaj konfido celas kreskigi feliĉon! Ne necesas, ke Kristnasko brilu!

Serene la centjara abio scias en la fundo de vintro, ke la printempo jam preparas la novan komencon. *(esperantigis Yi Qiao el la franca)*